




LITERATURA VIVO



Numero 004

Oktobro 2025

Enhavo

Noto: Ruĝa estas prozo, verda estas poezio

Erika Godó kaj John Huang: Vortoj al la legantoj p.4
Wally du Temple: Frato Mortas dum Kanua Sagao p.5
Laimundas Abromas: El mia taglibro p.11
Erika Godó: Rompita koro p.15
Maria Nazaré Laroca: Foresto p.16
Elena Popova: Ĉu la amo estas peko? p.17
Elena Popova: Aŭtuno, mi vin atendas! p.21
Elena Popova: Floroj por Kálmán Kalocsay p.22
Lilaketo: Verkoj de Lilaketo p.23
Moissey Bronshteyn: La fino de la somero p.24
Elizabeta Tuboly: Hajkoj p.25
Stanislao Esposito: En la falo de flava folio p.26
Curzio Malaparte: Febo (Trad. Roland Platteau) p.27
Li Weilun: La kvar sezonoj p.30
Lilaketo: Brilu p.31
Jimmy Osborne: Memora vojo (Trad. Ardo) p.32
Yin Jiaxin: Ario de juneco p.33
Yi Qiao: Aŭtuna impresio p.39
Yin Jiaxin: Printema Festo p.40
Yunior Nuñez Proenza: La malĝoja rozo (Trad. Erika Godó) p.44
Szamborski Paweł: La okupata abelo (Trad. Ryszarda Kwiatkowska) p.45
GONG Xiaofeng: Nerevenonta Reĝino p.46
Jadranka Miric: Leontodo p.50
Jadranka Miric: Malfrua aŭgusto p.51
Ĉielismo: Zamenhof la Orienta p.52
Pearl S Buck: Vento orienta – Vento okcidenta (6) (Trad. Detlef Karthaus) p.57
Ferenc Baranyi: Al vi donacus mi (Trad. Erika Godó) p.65
John Huang: Budapeŝto p.66
Aldo Palazzeschi: Ĉu eble mi estas poeto? (Trad. Erika Godó) p.67
Sulejman Salihu: Hipokratoj kaj hipokritoj (Trad. Bardhyl Adem Selimi) p.68
Maksim Bočkarev: Jaga (6) (Trad. Sergei Isakov) p.69
Jarina Ĉornohuz: Poemoj de Jarina Ĉornohuz (Trad. Petro Palivoda) p.72
Jan Twardowski: Kaptito de amo (Trad. Ryszarda Kwiatkowska) p.74
Ivanička Maĝarova: Hajkaro p.75
Tiberio Madonna: Aŭtuno p.76
Tiberio Madonna: Aŭtuno verda p.77
Lusin: Neĝo (Trad. Laoyuan) p.79
HORI Jasuo: Libelo p.81

HORI Jasuo: Mateno, kiu komenciĝas kun papiliono p.82
 Elizabeth Bishop: Unu arto (Trad. Anonima) p.84
 Sonja Lang: Sonja, ĉu ĝi havas titolon? p.85
 Yohanes Manhitu: Belsono el la ĉielo p.86
 Yohanes Manhitu: Intervjuo (kun Erika Godó) p.87
 He Weijia: Kuraĝe Trapasu la Yan-yu-Strandon (Trad. Batalanto) p.89
 Liu Weijie: Riza Reva Mirlando (Trad. Batalanto) p.91
 Fortego: Ebriulo p.93
 Arbsemo: Arkpafisto Houyi kaj la Dek Sunoj p.95
 Viktoria: Post Esti Ĉirkaŭbrakita de Eta Vaganta Kato p.96
 Luo Shuigen: Momenteto p.100
 Angel: Ŝi ĉiam solas p.104
 Luo Zha-a: La fratino en la luno (Trad. John Huang) p.105
 Taoyuan-Mastro: Rozon sorĉis pist-il' (Trad. Lu Jixin) p.106
 Sabin Maruhe: Godo p.107
 Ranja Zafinifotsy: La sorto de Aina p.108
 Honoré SEBUHORO: Pardono, amo kaj paco p.112
 Honoré SEBUHORO: Intervjuo (kun Erika Godó) p.113
 Helga Plötner: Intervjuo (kun Erika Godó) p.116
 Julianna Vas-Szegedi: Memore al Sino Lan p.120
 Erika Godó: Forpasis Raita Pyhälä (Saliko) p.122
 Kelly Muteke: En mia koro p.123
 Kelly Muteke: Silenta bruo p.124
 Malekera Bonne Idée: Ne mi sen vi p.125
 Hu Mengying kaj Yin Jiaxin: Esplorvojaĝa Taglibro p.126
 John Huang: Karikaturó p.131
 Gajo: Prave, Pipi! p.132
 John Huang: Karikaturó p.132
 Gajo: Satiro kaj humuro p.133
 John Huang: Karikaturó p.133
 Erika Godó: Premioj de la 91-a Itala Kongreso de Esperanto p.134
 Erika Godó: Anonco por Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay p.135

Kovril foto: Budapeŝto (foto de John Huang, poemo je p.66)

La bildoj kiuj akompanas la tekstojn en ĉi tiu numero, estis inspiritaj kaj prilaboritaj de John Huang pere de AI.

ISSN 2819-4861

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada

Vortoj al la legantoj



Erika Godo



John Huang

Karaj legantoj!

Kun ĝojo kaj dankemo ni prezentas al vi la kvaran numeron de *Literatura Vivo*. La revuo ekestis kun la celo krei komunan spacon kaj voĉon por ĉiuj, kiuj amas literaturon – sendepende de lando, kulturo aŭ aĝo. En ĝiaj paĝoj vi renkontos ne nur novajn poemojn, novelojn kaj eseojn, sed ankaŭ tradukojn el diversaj lingvoj, intervjuojn kun verkistoj, kaj retrospektivojn pri klasikaj aŭtoroj.

Jam tra la unuaj numeroj ni konstatis, ke *Literatura Vivo* fariĝas ponto: trans kontinentoj, inter generacioj, inter la sonĝoj de kreantoj kaj la sentoj de legantoj. Des pli ĝojas nin la fakto, ke hodiaŭ nia revuo allogas la atenton de ĉiam pli multaj esperantaj literatur-ŝatantoj, kaj ke la rondo de aktivaj kontribuantoj konstante kreskas. Inter ili troviĝas ankaŭ konataj aŭtoroj de la esperanta lingvo kaj literaturo, ekzemple Wally du Temple, Laimundas Abromas, Moissey Bronshteyn kaj aliaj. Ilia ĉeesto ne nur altigas la reputacion de la revuo, sed ankaŭ pliriĉigas nian literaturan vidkampon kaj donas al ĝi pli profundan enhavon.

Samtempe ni jam pretigas la unuan **Literaturan Konkurson Kálmán Kalocsay**, al kiu ni kore invitas ĉiujn aŭtorojn kaj legantojn partopreni. Ni esperas, ke tiu konkurso fariĝos nova paŝo en la vojo de esperanta literaturo, kiun ni kune verkas.

Ni deziras, ke ĉi tiu revuo ne estu nur pasiva legado, sed ankaŭ aktiva dialogo. Viaj opinioj, komentoj kaj proponoj ĉiam estos bonvenaj; ĉiu via vorto helpos nin plibonigi la kvaliton, plivastigi la enhavon kaj igi nian komunan vojaĝon ankoraŭ pli fruktodona.

Literatura Vivo estas ankaŭ via hejmo. Ni kuraĝigas ĉiujn poetojn, prozistojn, tradukistojn kaj legantojn partopreni, sendante verkojn aŭ reagojn. Ni kune krei spacon, kie la internacia lingvo montras sian plej profundan forton: la kapablon kunligi homojn per belarto kaj penso.

Kompreneble, pro niaj limigitaj scioj kaj kapabloj, eraroj kaj mankoj estas neeviteblaj. Tial ni humile petas vin ne heziti doni konsilojn, kritikojn kaj korektojn.

Ni invitas vin ĝui la paĝojn de ĉi tiu numero, sperti la riĉecon de la internacia literaturo, kaj kune kun ni kultivi ĝardenon kulturajn, kiu floras en Esperanto.

Kun amikecaj salutoj,

Erika Godo

John Huang

Retejo: www.literaturavivo.com


Retpoŝta adreso: info@literaturavivo.com

Erika Godo: goderika@gmail.com

John Huang: 4882588@outlook.com

Frato Mortas dum Kanua Sagao

Wally du Temple



Pandemio paralizis Kanadon komence de 2020. Mia frato kaj mi komencis surporti maskojn, kaj obei la ordonojn de la Ministerio de Sano pri homa distancigo, pri lavado de manoj, kaj evito de homamasoj. La magazenoj estis fermitaj, kaj restaŭracioj, eĉ bier-trinkejoj!

Foje ni rigardis unu la alian silente. Kvankam mi ĉesis fumi pipon antaŭ jaroj mi prenis pipon enmane, malfermis ujeton da tobako, la aromriĉa 'Erinmore', fingrumis la foliojn ĝuante la parfumon, plenigis la pipon, ekflamigis la enhavon kaj malrapide suĉis la fumon en miajn pulmojn.

"Mi lastfoje fumis ĉi-pipon kiam ni kanotis la riveron 'Nahanni' ", mi diris al mia frato Bari. "Tre sukcesa vojaĝo. Sed mi memoras ke ni planis pli danĝeran, pli defian ekspedicion sed ni ne faris tion. Sed nun kion fari? Pasis multe da jaroj. Ni ambaŭ estas pensiuloj. Kial ne plenumi tiun planon. Vivo aĉas pro la pandemio."

"Jes, vi pravas," Respondis mia frato." La variantoj de la 'Kovid19' ekinfektigas homamasojn en nia regiono. Mi preferas la defiajn danĝerojn de la rivero 'Liard' ol atendi pasive ĉi-tie por malsaniĝi, sufoki pro manko de oksigeno, morti kiel tutsenpovulo, senhelpa en ŝtopita koridoro de tro okupita malsanulejo."

Ni du fratoj, pensiitaj instruistoj de historio, estis perdintaj lastan uncon da optimismo pri la estonta bonfarto de la natura medio, de la daŭripovo de civilizado pro klimat-ŝanĝ-neantoj, pro la malsatigoj en Yemen, pro la etnaj genocidoj, pro la senpovenco de U.N., kaj la kreskanta rasismo. Kiajn mondskalajn apokalipsojn ni atendu?

Ni konsciis ke alfronti la defion de la 'Kanjono de la Diablo' de la rivero 'Liard' estas kiel ĵet-endanĝerigi niajn korpojn kiel montgrimpantoj de 'Everest', aŭ kiel solaj ĉirkaŭ-mondigaj velboatistoj.

La brita kompanio, 'HBC', kiu aĉetis kaj kolektis kastorajn peltojn de la indiĝenoj en norda Kanado navigis tiun kanjonon por tridek jaroj, en nordaj kanuoj tridek futaj, ĝis kiam mortis naŭ viroj, kaj perdiĝis du kanotoj, kun granda ŝarĝo de kastoraj peltoj. Post tiu tragedio oni elektis eviti la kanjonon per longa ter-transportado.

Ni decidis alfronti novan defion kanuan.

Pretige, ni tage iris kanui en la rivero 'Kouïčan' ĉe insulo Vankuvera.

Niaj muskoloj plendis sed persiste ni dresis nin aĉetante frotŝirmaĵojn, vitaminojn kaj testosteronan hormonon fortigilon.

Estis jam fin-aŭtune kiam ni decidis defii la timigindajn akvojn de la rivero 'Liard'. Pro la varmega kaj senpluva vetero arbaraj incendioj estis okazintaj en nia Kanada provinco. Malpli da akvo en riveroj ŝanĝas la agmanieron de river-fluado. Kion anticipi?

Nian dek-ok futan kanuon el kanvaso kaj ligno Bari nomis 'Nur Min. Li lernis Esperanton de mi. Mia filo, Evan, denaska Esperantisto konsentis kontraŭ sia propra sento veturigi nin norden per kamiono. Li opiniis ke ni estas malfort-mensaj maljunuloj iel suferantaj de pandemia deprimio. Tamen, lia kontraŭstaro ne sukcesis. Li promesis reveni por kolekti nin ĉe la gastejo 'Bufo' kie la rivero 'Bufo' atingas la ŝoseon 'Alaska'.

Nia plano estis progresi nordorienten per la rivero 'Liard' kun la fluo, kaj poste sudokcidenten per la rivero 'Bufo' kontraŭ la fluo al la renkontiĝa gastejo. La rivero 'Bufo' estas alfluanto de la 'Liard'.

Ni veturis al mejlo 497 de la 'Alaska Aŭtovojo' kie ponto transiras la riveron 'Liard'. Tie situas turistan gastejon kiu nomiĝas 'La Varmaj Fontoj de Rivero Liard' ĉe 59 ° 25'40 " Norde 126 ° 06'15 " Okcidente. Provincan parkon oni establis tie en 1957 pro tio ke la komplekso de termofontoj havas nacian ekologian signifon kaj estas konata por sia natura ĉirkaŭaĵo en la abunda norda picea arbaro. La parko estis fermita tial mia filo decidis ripozi en la gastejo sed ni kontraŭleĝe iris en la parkon por malstreĉiĝi antaŭ ol ekendangerigi niajn vivojn venont-tage. Ni sekvis flosantan ligno-padon, kiu kondukis al la termofontaj naĝejoj, kaj trairis varman akvan marĉon. Alkojn manĝantajn ni preterpasis. Ni senvestiĝis kaj nude naĝis en la varmfonto 'Tropika Valo' kie dek-kvar specioj de orkideoj abunde kreskas en tia varma etoso. Alfiksita al stango avertis turistojn jena afiŝo, 'Rekomendo: Cedu la varmfonton al ursoj.'

"Mi ne sciis ke ursoj ŝatas orkideojn ŝercis mia frato. Malfeliĉe mi lasis mian pafilon en la kamiono."

Ni tranoktis en la gastejo kaj matene adiaŭis kaj dankis al mia filo lanĉante nian kanuon apudponte. De tie ni iris sep mejlojn kaj albordiĝis kie estas enir-komenco de transporta tervoĵeto por eviti ne-navigeblan, ne-trapaseblan lokon kie la akvoj de la 'Liard' estas pelataj perforte tra etan breĉon de granita montmuro. Nenio, eĉ alkoj aŭ pumoj, povas travivi en tiuj akvoj.

La monteca vojeto, neuzita por multaj jaroj, devigis nin uzi maĉetojn, hakilojn kaj svedajn man-segilojn por fari ĝin trapasebla. Ĉiunokte ni dormis sub oraj arboj betulaj. Ni sentis, ke ni dormas en katedralo. La mondo mem estas preĝejo. Sunradioj ĉe tagiĝo kaj je krepusko kreis magiajn ŝablonojn sur la falintaj kaj falantaj flavaj folioj. Ni povus aŭdi la riveron ŝveli, fajfi kaj turniĝi en amaskirlejoj, kaj ekspodi tumulte supren per bruegoj de malbonaŭguraj perturboj, kiuj tondre avertis pri la malfacilaĵoj, kiujn ni devis poste alfronti. Descendinte en ovalan valon la akvoj subite silentis kaj vagis en lagunon, kie ili ekkuŝis en multflueca meditado.

Ni kampadis tie dum kelkaj noktoj, ravitaj de sentoj de paco kaj pasio. Ni naĝis lagune, fiŝkaptis arktajn timalojn kaj ĝuis kuiri ilin per tenduma fajro kies flamoj estis reflektitaj en nigra akvo sub nokta ĉielo de briletantaj steloj de nia galaksio. Mi sentis min kiel eta interdependa parto de la fragila fadeno de la biosfera vivo.

Matene de nia intencita foriro unu kanada ansero faris gigantajn kirliĝantaj spiralojn malsuprenirante de la ĉielo por ripozi lagune. Kiel strange? Unuopa birdo, kvazaŭ perdita de migranta aro. 'Ĉu ĝi estas malsana,' mi pensis? En tiu momento mia frato pafis ĝin per sia 22-kalibra fusilo. Sed li nur vundis ĝin. La birdon nun kripligita li pafis denove. "Mi kaptis vespermanĝon", li kriis, sed la mortantan anseron nun kaptis la riverkurento kaj ekspedis la kadavron funebre orienten laŭ la fluo tien, kien post ne longe, ni estus devintaj sekvi.

Superstiĉa psika febzo kaptis mian koron kaj mi kriaĉis al mia frato. "Damninde ĉu vi estas analfabeto; ĉu vi neniam legis la poemon, 'La Rimo de la Antikva Maristo' de 'Coleridge'.

Tia pafado de senkulpa, libera kaj sovaĝa birdo kiel albatroso povus kaŭzi al ni penadon eĉ tragedion kaj postuli pentofaron laŭ la balado. "Al diablo kun tio", li diris.

Matene ni metis nian kanuon en la lagunon kaj sekvis la birdan kadavron. Variaj ekblovoj de seka vento. Post ne longe nia kanuo estis tirita orienten per la ĉefa fluo. Baldaŭ ĝi kaptiĝis en larĝa kirliĝanta vortico kiu suĉis la kanuon flanken kaj malsupren tiel, ke la kanuo estis turnita naŭdek gradoj. Amasiĝinta akvomonto levis nin kaj ĵetis nian kanuon vivoriske al rivera bordo. La ligna pruo de la kanuo krakis kontraŭ kruta ardez-argila rok-lavango kiu elstaris de la kanjona muro. La pruo kurbiĝis pro rompita ligno sed la ekstera kanvaso kunligis la lignajn ripojn por ke la kanuo, kvankam duonplena da akvo, povu ankoraŭ flosi.

Sekvis senhelpa kadavra flosado dum ni pene provis akvon elŝoveli. Silento regis la aeron inter ni fratoj.

Finfine, la rivero plilarĝiĝis kaj meze de ĝi elstaris insulo nomita de la francaj felo-komercistoj, Île-de-France'. Ni devis pasigi ses tagojn sur la insulo por sekigi ĉiujn niajn provizojn kaj fari krizajn riparojn al la kanuo. Pipojn fumis, kaj trinkis botelon da

rumo. Restis plia botelo kaj du skatoloj da tobako. Feliĉe, pro niaj spertaj preparoj niaj varoj, manĝaĵoj, kaj ekipaĵoj, restis sekuritaj, aŭ en ligitaj sakoj aŭ alfiksitaj al la boatrandoj. Neniu ni povus plene ripari la ŝvelon kaj kurbiĝon de la pruo. Stirado estus pli malfacila. De nun ni devis blanciĝi la kanuon tiel ke pli da pezo estu en la pobo tiel levigante la pruan.

Venonte, ni eniris la kanjonon 'Muldilo' kies trankvilaj akvoj finfine gvidis nin al plej danĝera aperturo nomita 'La Torentaĵoj de la Dronintoj'. La loko gajnis tian nomon post la perdo de kanuoj kiuj renversiĝis kun la morto de pluraj viroj. Ni alboridiĝis por fumi pipojn, kaj legi la konsilojn de esploristo 'McConell' kies tagĵurnalon ni kunportis.

Li skribis ke la plej granda risko estas loko kie minaca elstaraĵo de tri fingraj ungegoj el roko blokas la kanalon. Li nomis ilin 'La Dentegojn De Nemezo'. Li skribas ke necesas kalkuli la tempon inter la supren eksplodantaj akvofuneloj kaj akvokurliĝoj. Kiam oni akurate kalkulas eblas pasi inter ili. Ni silentis. Ni okulgapis. Ni gardis la kanuon, kaj pipojn fumis. Ni urinis nerveze. Sed necesas antaŭeniri antaŭ krepusko. Ni spektis la sinsekvajn supren irantaj-ondumojn kaj precize post la unua eksplodanta akvofunelo ni ekis.

Inter la dua kaj tria el la 'dentegoj' nia kanoto renversiĝis. Ni, naĝantaj, ambaŭ kaptis la savrimenojn je la boatrandoj. La renversita kanuo furioze saltadis, kaj minacis mortbati nin. La suben-suĉanta akvo fortiris niajn ŝuojn. En tia momento ni ne timis pri vivofino, ni simple batalis. Unu post la alia ni estis suĉitaj suben per la kirlakvoj. Ĉiufoje, kiam unu ekaperis kaj glutspiris aeron la alia estis subakviginta per helicaĵoj kirliĝoj. Tamen, ni sukcese tenegis la boatrandaĵojn savrimenojn kaj postvivis.

La rivera forto drivis nin preter la trian 'Dentegon de Nemezo' al golfeto kies kurento retrenfluas per cirkla kontraŭfluo. Eta sabla delteto ĉe la golfeto alogis kiel refuĝejo kie rivereto enfluas. Tamen, naĝante ni devis lukti por rektigi la kanuon kaj elŝoveli la akvon per potoj. Finfine ni sukcesis naĝ-grimpe eniri la kanuon kaj eligi la akvon plejparte. La kontraŭfluo puŝis nin en cirkloj unue pli proksimen al la bordo kaj poste krize proksimigis nin al la ĉefkurento, sed ĉiam reen al la bordo. Finfine ni atingis la bordon de la golfeto.

Sablo, rivereto kaj sekaj branĉoj por fajro estis vera azilo. Sed ni suferis de hipotermio; manoj preskaŭ frostigitaj, korpoj kaj vestaĵoj malsekaj de frida akvo. Mi kolektis branĉetojn kaj derompaĵojn, lignon por ekstarti fajron dum Bari malŝarĝis la kanuon. Kiam la fajro ekflamis Bari havigis botelon da rumo enmane sed ĝi glitfalis de liaj malvarmaj fingroj kaj rompiĝis. Estis nia lasta. Tamen, spasme renversinte la botelon li ŝparis duonon. Necesis filtri la rumon tra mian feltan ĉapelon por eligi vitro-pecetojn. Tie ni ripozis por tri tagoj en stato de ŝoko, dum ni ĉion sekigis. La vento trairis la kanjonon per zumsono kiel plorado. Ni nomnis tiun golfeton nia, 'Golfeto de Savo'.

Prepare por la venonta etapo ni grimpis laŭlonge de la alta bordo por plani. Ĉi tie la riveron 'Liard' strangolas krutaj rokmuroj al mallarĝa rapida fluo. Ĝi havas la timindan nomon, 'La Laringo de Satano'.

En septembro, la suno ne penetris en tian kanjonon kaj ĝi estis malgaja kaj deprima. Ĉe la fino, la rivero dividiĝis ambaŭflanke de gruz-sabla insuleto. Nia mapo montris serion de torentaĵoj unuflanke, kaj aliflanke ni povis vidi ondojn krestantajn de sep ĝis naŭ futoj altaj. La bruo de la muĝanta akvo kaj la vekriado de la vento tremigis niajn nervojn. Ni nerveze stokis kaj fumis niajn pipojn. Niaj nervozaj pisoj pli oftis. Tamen, ni sukcese kaj sen probleme antaŭeniris kaj tendumis apudborde por sep tagoj.

La Granda Kanjono fakte estas serio de etenditaj kanjonoj kun vastigitaj basenoj inter ili, en kiuj troviĝas kutime unu insulo. Ni ne renkontis pliajn problemojn atingi la mult-kanaligitan estuaron de la 'Bufo' rivero. Ni konstatis ke ni certe malfruos por la rendezuo kun mia filo Evan kiu sendube maltrankviliĝos. La vojaĝo supren laŭ la rivero 'Bufo' certe estus teda kaj elĉerpiga pro la malprofunda akvo kaj la neceso treni la kanuon per ŝnuro. Ni komencis revii pri varmaj litoj, pri restoracia manĝaĵo, pri bifstekoj kaj pri biero, kaj ĉio cetera ĉe la turista gastejo.

La fluo kontraŭ ni estis forta. Necesis vadi por treni la kanuon kontraŭflue, aŭ portu ĝin supren preter rokoj aŭ envicigu ĝin inter la ŝtipaj obstakloj. Ofte, Bari sidis en la kanuo kaj stiris ĝin dum mi portante longan ŝnuron alfiksitajn al la pruo supreniris sablaĵojn, rokojn kaj ŝtipojn tenante la kanuon, fraton kaj provizojn stabilaj, por progresi antaŭen sekure.

Polusa vortico de malvarmo komencis malsupreniri de la nordo. Frosta kaj seka vento. Ĉiutage ni devis halti je la 16-a horo pro la malvarmo. Perdinte niajn ŝuojn ĉe la 'Dentego de Nemezo' ni nun portis alkajn felajn mokasenojn ene de kaŭĉukaj ŝuoj. La frostigo glaciigis la mokasenojn ĉiunokte kaj prokrastigis niajn matenajn forirojn, pro bezono degeli ilin. La ŝtipoj kaj ŝtonoj nun estis glaciigitaj kaj ĉiun klopodon progresi renkontis faloj kaj faloj. Sentoj de pereado kaj fineco trapentris en niajn frostigitajn fingrojn, venis el niaj sangantaj genuoj, kaj alkroĉiĝis al niaj mensoj kiel malsekaj vestaĵoj.

Tamen obstine ni progresis. Sed foje falanta ŝtupo tiregis la trenŝuron el miaj fingroj. La kanuon kaptis la rapidakvo kaj ĵetis 'Nur Min' kaj Bari kontraŭ ligno-amasegon. La akvo-premo suĉ-subenigis ilin al mort-malapero. Sole mi staris riverborde sen frato, sen kanuo.

Restis al mi vivo, malsekaj vestaĵoj, dorsosako kun mangaĵoj, pipo, tobako, kaj alumetoj.

Mi iris al apuda arbaro kaj kolektis sekajn musketojn kaj branĉetojn. Revenante al la lignoamaso kie mia frato kaj 'Nur Min' mortdronis mi ekstartis fajretojn, tie kaj tie kaj ĉirkaŭe ĝis post du tagoj fumon anstataŭigis flamoj kiuj senĉese plivastigis la kreskantan funebran ŝtipar-incendion.

Nokte, flamoj fantome bruligis la riveron kies akvoj konsumis la kadavrojn de mia frato, kanuo kaj ansero.



Mi funebriĝis angore pro perdo frata, sed ankau meditis stoike. Tiel la mondo estas. Vivo kaj morto. Birdo kaj homo. Sama estonteco. Aperu kaj malaperu. Kaj mi membris eldiron de Karl Sagan kiu skribis parafrase ke la tero estas tiu tre malgranda scenejo en la vasteco de la kosma tuto kie ĉiu homa estulo kiu iam ajn estis plenumis siajn vivojn en etfrakcio de kosma tempo, sur nia blua planeda punkto, La Tero.

Mi travivis ses tagojn apud ŝtipa incendio kiu pelis fajrerojn ĉielen al funebraj arboj kiuj etendis siajn branĉojn al la stelplena ĉielo.....

La sepan tagon mi aŭdis klakantan bruon de helico savhelikoptera. ■

El mia taglibro

Laimundas Abromas



Septembro..., merkredo. La sesa horo matene. Mi vekigis kolera, kvazaŭ batita, kvazaŭ faligita de aŭto. Doloris la kapo, dorso, gamboj, nervoj, ...gutumis la krano. Ne mia, sed en kuirejo. Tutan nokton gutfluis. Mi vekigis tiom malbonhumora, tia malbonaspekta, ke, ĵetinte mian rigardon al spegulo, mi resaltis – ĉar pensis, ke mi ekvidis fantomon. Mi ne rekonis min en la spegulo. Mi ekrigardis trans la fenestron –ĉielo nebuliĝis, ekpluvis..., ĉio konformas, kion oni povas postuli de mi, kiam la naturo estas tia... La komenco de la XXI jarcento... Kion mi faru vespere, se la portaga prudento jam frumatene estas disipita?... Tiu senfina spektado de televidilo jam similas al idiotismo... Ĉu mi lernu triki aŭ araban lingvon? Dume ne klaras, kiu lingvo estos necesa estontece, sekve, kiu pli utilis –la araba, ĉina, rusa aŭ Esperanto? Ankoraŭ ne klaras... Tamen certe klaras, ke televidilo ne kondukos al bono, jam nun mi interparolas kun ĝi, diskutas. Do ,kio povas okazi poste? Deformitaj interrilitoj?

Alia tago..., ĵaŭdo. Mi vekigis pro la malvarma ŝvito. Tio humiligas mian homan dignon. Ne la ŝvito, al diablo! Por tio estas „Old spice“. Ne ŝvito... Sed pro tio, ke abundas multmilionuloj... Sed mi ne estas tia! Tio vundas mian honoron kaj humiligas mian dignon... Finfine mi nomis min multmilionulo... Nun mi povis dormi plu, ĉar ankoraŭ noktis. Mi nur ne ronku, ĉar mi mem vekigos min. Kion fari nun? Por multmilionulo estas bone – vekiginte li povas kalkuli siajn milionojn. Sed kion faru la falsmilionulo?... Plej bonas ne ronki... Tutan nokton mi ne dormis, kvankam mia edzino diris, ke mi ronkis. Verŝajne intence. Mi ne ronkis, tamen ŝi diris tiel... Mi legis libron... Mi legis ne tutan nokton, sed tutan nokton ne dormis, ĉar antaŭ dormo mi legis. Mi estis ekscitiĝinta. Libro... Kiel ĝi nomiĝas, ne gravas, sed ĝin verkis iu Lenin. Li skribis;- „Al edzino vi diru, ke vi iras al partia kunveno, al amorantino vi diru, ke via edzino ne permesas al vi forlasi vian hejmon, sed mem tiutempe vi sidu en biblioteko kaj lernu, lernu kaj ankoraŭfoje lernu... Vi lernis, lernis kaj ellernis – vi pensu pri unu, parolu ion alian, sed mem vi faru kontraŭe.“

Matene venis Mateo. Mi ĉion rakontis al li. Tiam li diris:-„Ni drinku duonlitron...“ Kompreneble ne akvon. Posttagmeze mi sidis ĉe la tablo permane apoginte la kapon. Mi pensis.... Mi havas stultan kutimon transskribi por mi en mian notlibron diversajn saĝajn eldirojn, opiniojn, sentencojn... Surkorte mi renkontis Staseon. Jam delonge ni ne vidis unu la alian. Li havis du litrojn da biero.

Sabato. Hieraŭ min forlasis mia edzino. Mi fumis tridek tri cigaredojn, disfendadis monton da hejtligno, trifoje ĉirkaŭiris la urbon kaj eksentis min tiom soleca, eĉ komencis hurli. Al mia hurlado respondis almenaŭ dekduo da hundoj el najbaraj kortoj, tamen mia voĉo estis plej laŭta. Tiam mi vire satploris kaj iris al bierejo. Tie mi sidis ĝis eksentis mi esti hejme... Poste oni forpelis min surstraten.


Nokte mi sonĝis abomenan gnomon. Mi estis ĵus endorminta – frap, frap, frap, „Ku –ku, ĉu vi jam dormas, Simeono?“ – li demandis min. „Vi mem vidas, ke mi dormas“- mi respondis. „Ĉu pisi vi ne volas?“,- li ne cedas. „Mi volas, volas“. Mi ellitiĝis, urinis, enlitiĝis, ekdormis. Frap, frap, frap. „Kio ankoraŭ?“- mi demandis. „Ĉu vi lasis lumon ŝaltitan en necesejo?- demandis li. Mi ellitiĝis, kontrolis lumon,-mi ne lasis ĝin ŝaltita – ekdormis. Frap, frap, frap. „Mi ne lasis la lumon en necejo ŝaltita“- mi voĉis. „Kaj ĉu la akvokrano en banĉambro estas ŝtopita?“- denove li demandis. Mi leviĝis, iris al banĉambro por kontroli -la akvokranoj estis fermitaj. Mi enlitiĝis. Frap, frap, frap. „Ku-ku, nu kiel? Ĉu ĝi estas ŝtopita?“ . „Ŝtopita, - mi diris,- ŝtopita. Tamen necesas diri „fermita“. „Bone“, - diris gnomo,- „la akvokrano estas fermita. Kaj la gaso en kuirejo- ĉu ĝi estas fermita?“ . Mi ellitiĝis, iris al kuirejo – gasfornelo mankas. Mi memoris, ke en mia kuirejo estas nur la elektra fornelo. „Ho,kia idioto!“ Mi ekdormis. Frap, frap, frap. „Ku-ku.Kiu estas idioto?“,- demandas eta abomena gnomo. „Mi“, - respondis mi.- „Mi. Trankviliĝu vi, lasu al mi dormi.“ Mi ekdormis. Bone, ke mi jam streĉis vekhorloĝon, kiu tiel aĉe ekknaris, ke eĉ tiu etulo abomena gnomo forkuris kiel brogvundita... Mi vekiĝis kaj longe pensis: -ellitiĝi aŭ ne? Hieraŭ mi ankaŭ ellitiĝis, tamen la tago finiĝis kaj mi denove enlitiĝis. Se mi ellitiĝos, necesos lavi min. Se mi ne lavos min – ĝis la tagmezo mi restos dormema. Post la tagmanĝo – mi volos dormi eĉ pli. Do, mi nur malfermis la okulojn kaj la humoro tuj malboniĝis. Mi ellitiĝis kaj lavis min, la akvo –klara,malvarma, sed la humoro, ĉu klariĝis?

Dimanĉo... Denove la dimanĉo. Necesas ĉambrojn ordigi, ĉion purigi, tamen ne leviĝas miaj manoj. Ho, kiel mankas la virinaj manoj en mia loĝejo. Post unu semajno mi iĝos kvindekjaraĝa, tamen serĉi novan virinon mi jam ne plu kuraĝas. La ĉiutage videblaj ekzemploj ne inspiras min, ĉiuj miaj amikoj po unu fojo aŭ kelkfoje divorcis. Tamen, jen, ili denove ekamas, promenadas subbrake liginte sin, edziĝas, divorcas..., nur fabelo senfina. Mi ne estas tia... Mi iris urben kaj alhejmigis bieron. Pizoj ankoraŭ restis de posthieraŭ... Mi legis en interreto, ke 80% de homaro estas stultuloj. Tamen en Litovio ili pli multas... Pro kio aliaj ĉion komprenas, sed mi nenion?

Mardo. Denove mateno, tuta tago antaŭ miaj okuloj. La tago komenciĝis tielsame, kiel hieraŭ : aŭroris mateno kaj sereniĝis. Antaŭ tagmezo venis al mia hejmo mia amiko Nikodemo kun valizo. Li antaŭ nelonge edzinigis aktorinon de la urba teatro... Ni trinkis vinon kaj spektis televidilon. Li ploris per grandaj larmoj. „Ho, kiel trankvilas ĉe vi, kiel kvietas“, - diris li.- „Kiel agrablas ĉe vi.“ Mi svingis permane. „Tamen ĉe mi post geedziĝo ĉiuvespere – teatro.Ke estu vodevilo aŭ komedio. Ho,ve! Nur dramo kaj tragedio! Sofoklo kaj Ŝekspiro subiĝos antaŭ mia vivo“. Mi silentis. Mi volis memori al li, kion li parolis antaŭ kelkaj semajnoj, -„Finfine mi trovis! Longe mi serĉis, sed finfine!“

Ĵaŭdo.Mi ankaŭ jam foliumas la gazetojn, kiuj publikigas avizojn pri geedziĝo, kaj ankaŭ tiujn, en kiuj virinoj volas konatiĝi kun viroj. Kompreneble, tiujn avizojn, en kiuj oni proponas masaĝon, mi preter vidas. Fojfoje mi trovas por mi plaĉajn proponojn. Kaj foje, kvazaŭ antaŭ miaj okuloj, mi vidis aŭtorinon de tiu avizo: laborema, milda, ordema, pura kiel la unua neĝo..., trikado,vi aŭdu,estas por ŝi la plej agrabla okupo. Do, antaŭen. Kaj jen, ĉiam la parolpovo perdiĝas: ne iun ajn fiulon ŝi volas... Altan, sanan, muskolhavan..., tion oni povas kompreni! Tamen ĉiuj ,kiel unu, volas posedi pursangan, bonrasan viron. Anĝelon ili volas. Ili volas la viron sen malutilaj alkutimiĝoj. Ne somnambulon, ne strangulon ili havas enkaŭpe, tute ne. Ili bezonas nedrinkanton, kie vi nun tian trovos? Eble en tombejo. Nefumanton. Pri narkotikoj oni eĉ duonvorte ne mencias. Bonkonduktan viron ili volas, senteman, lertan. Kaj eĉ kun aŭto, garaĝo, vilao. Tian, kies poŝojn la mono ŝirpezas. Ne, mi ne plu volas, mi ne plu legos tiajn avizojn! Verdire ankaŭ la viroj estas bonaj, ili serĉas nur vestalojn, virgulinojn. Kion ili faras, post la konatiĝo pere de la gazeto? Ili iras al bierejo kaj senprokraste adiaŭas ŝin? Kiu scias?

Vendredo. Hodiaŭ Nikodemo forlasis mian loĝejon. Neniu lin pelis – mem foriris, propravole, li trovis alian virinon. Li serioze pensas pri geedziĝo. Ĉifoje li ekamis la reĝisorinon. Ŝi aranĝas, onidire, spektaklojn por geinfanoj, kaj mem ŝi havas kvar. Mi demandis lin: „Ĉu vi, Nikodemo, amas geinfanojn?“ „Ĉu mi scias?“,- li levis la ŝultrojn.- „Mi amas ŝin kaj tio sufiĉas“. Ni vidos. Mi ne kredas, ke ankaŭ ĉifoje longe daŭros lia familia vivo.




Sabato. Mateno... Hodiaŭ mi havis surprizon. Al mia hejmo venis iu bonaspekta sinjorino kun hundeto kaj vualo sur vizaĝo kaj ĝentile parolis:- „Mi venis al vi pro avizo“. Kaj ŝi ŝovis al mi la gazeton. Ĉio koincidas; korpoalteco, pezo, ŝatokupoj. Tio ĉio povas koincidi, sed estas indikita ankaŭ mia adreso. Ho, dio! Kiu tiel abomene mokridis? Nikodemo! Kiu alia?... „Sidiĝu, mi petas“, - mi diris al sinjorino.- „Vi ne senŝuetiĝu, ĉar mi ne havas por vi pantoflojn“. La sinjorino metis sur tablon la krakenojn, kukon, buterpanojn kun kolbaso kaj fromaĝo. Mi prizorgis teon. Ni trinkis teon, manĝis kaj poste eĉ ekfumis. Mi nenion havis por regali ŝin. Tiam sinjorino eltiris botelon da konjako el sia mansaketo kaj ladskatoleton de sardinoj. Ho, dio, ni festenis! Tamen mi timis,- kio okazos, kiam ŝi forprenos la vualon. Ĉu mi ekvidos maljunulinon, aŭ iun mortfantomon?... Jen ŝi forprenis la vualon, - kion mi ekvidis?,- floranta blondulino! Io ekbaraktis en mia ventro aŭ en koro, mi mem ne scias kie. „Mi kondamnas nek fumantojn, nek drinkantojn“, - ŝi diris mallaŭte.- „La vivo estas tia“. „Ha, kia ŝi estas saĝa“, - mi rimarkis. Ho, ve, ŝi eĉ littolaĵon novan kunportis... Matene ŝi kuris urben por alporti bieron... Posttagmeze ni iros promenadi, eble eĉ sur balancilo ni balancos nin: jen, io okazis al mi!

Lundo. Revenis Nikodemo kun sia valizo, li ne toleris infanan kriadon kaj amason da nelavitaj teleroj. „Reĝisorino ŝi estas bona, tamen mi estas nek servistino, nek guvernistino“, - li parolis kaj avido rigardis al Oksana, mia virino.- „Kiu estas ŝi?“. Oksana sinĝene malleviis okulojn kaj mi tuj rediris: „Ŝi estas mia virino, Nikodemo. Jen venis mia vico“. Kaj mi ridis, sidigis Oksana-n sur miajn genuojn, ĉu mi hontu? Nikodemo dorsdirekte foriris sen adiaŭi.

Mardo. Oksana portis al mia hejmo sian tutan malabundan havaĵon... Ŝi spertis multe da mizero, vivis en infanhejmo. Ŝiaj gepatroj estis bienposedantoj kaj pereis en Siberio. Kiam ni rericevos ŝian bienon, muelejoj, segejon, tiam ni ekvivos bone. Tiel diris ŝi, sed mi svingis permane, ĉu la feliĉo estas en riĉaĵo? Ni preferas eldrinki, fumi, petoli. Ni intencas baldaŭ geedziĝi. Kiel tetroj, ĉar ni ambaŭ surdas kaj blindas – ŝajne, pro la amo.

Ĵaŭdo. Evidentiĝis, ke Oksana estas grafidino kaj estis jam edziniĝinta. Unu ŝia edzo mortis pro malsano, alian oni mortigis en prizono pro politiko, kaj tria – sin pendigis en maŝo. Sed mi blinde amas ŝin kaj al mi tio ne gravas. Eĉ dekduon da edzoj ŝi estus havinta: ĉu mi nervoziĝu pro tio?... Kiel ŝi elegante elbuŝigas la fumon. Kiel ŝi prenas enmanen kaliketon – manoj iomete nur, nur tremas. Pro la ekscitiĝo, kompreneble, pro la feliĉo... Ŝi iomete strangas. En la gazeto ŝi publikigis anoncon, ke ni aĉetos loĝdomon kun ĝardeno kaj banbaseno. La kosto ne gravas. Kvazaŭ ŝi jam estus rericevinta sian bienon. Ni eĉ ne estas geedziĝintaj. „Ne gravas“, - ŝi trankviligas min, - „morgaŭ, postmorgaŭ ĉio solviĝos. Mia agento laboras tage, nokte. Li serĉas taŭgan aŭton. Ni aĉetos eĉ duan loĝdomon en vilaĝo, ĉu bone?“ Tamen la manetoj ŝiaj iom tremas... Kio sekvos post tio? Iu ekscitiĝo ronĝas min...



Sabato. Do, jen, ĉio solviĝis per si mem, spontane. Venis sanitariistoj, -altstaturaj, korpulentaj viroj. Mi unun el tiuj konis, ĉar en mia junecaĝo mi mem tie kuraciĝis. Oksana, verdire, estas el tiuj iomaj frenezuloj, nur malmulte freneza. Ili diris, ke mi ne estas la ununura trompito... Oksana rigardis al mi per vitraj okuloj kaj diris: „Pardonu, karulo. Ĉu al vi estis bone kun mi?“. „Estis bone“, - konfesis mi, ĉar ni nek kverelis, nek interbatiĝis. Mi verŝis kaliketon da konjako por adiaŭi. Kaj falis po unu granda larmo el ŝiaj belaj okuloj. Ŝi eldrinkis konjakon kaj lasis sin forkonduki. Oksana sidiĝis en aŭton de frenezulejo kaj tiu forveturis... Posttagmeze trans fenestro de mia loĝejo mi ekvidis mian amikon Nikodemon kun valizo enmane. Ĉu ĉio estos kiel antaŭe?. Ne! Ne, kaj ankoraŭfoje ne! Venontan sabaton mi vizitos ŝin. Mi portos al ŝi cigaredojn, bonan vivon. Ni kune sidos, iom fumos. Kiu scias, eble tiu ĉi historio nur komenciĝis? Ĉar Oksana flikas lerte, kvankam ŝi estas grafidino.

La homo ĉiam emas pensi pri si mem pli bone ol estas envere.



Rompita koro

Erika Godó



Mi sidas en silento, en malluma soleco,
vi forlasis min, mia koro restas en viveco.
La pecoj de mia koro dispeciĝis kiel vitro,
profunde en mia koro loĝas nur frosta vintro.

Ĉiuj pecoj gardas memoron de la pasinteco,
sed espero kaj kredo ne portas estontecon.
La sono de via ridado ĉiam restas kun mi,
sed feliĉo nun estas fora revo en mia vivo ĉi.

La fluanta senhalta larmo kiel senfina rivero,
mia korpo tremas en malĝoja malvarma vespero.
La ventoj flustras melankoliajn melodiojn,
kvazaŭ priplorante por mi perditajn iluziojn.

La tempo pasas, la vundoj malrapide resaniĝas,
sed la ombro de la pasinteco ofte rekuniĝas.
Ĉar eĉ en mallumo vivas lumo dormanta,
kaj en ĉiu larmo troviĝas forto ekkreskanta.

Foresto

Maria Nazare Laroca



Kiam ajn mi preterpasas
straton de l' kvartalo,
ĉiam mi haltas por ekgvati
eluzitan aŭtomobileton.

Ĝi bluerigardas de garaĝo
de forlasita dometo,
meze de luksaj konstruaĵoj.

Kreskas fiherboj ĉirkaŭe,
ne plu estas ĝardeno;
nur la ĉeesto de l' mistero
de nekonata pasinteco.


Ausência

Sempre que passo numa rua
do meu bairro, paro e espio
um velho fusca desgastado

a olhar em azul, da garagem
de um chalé abandonado,
entre o luxo dos prédios.

O mato cresce ao redor,
não há mais jardim;
só a presença do mistério
de um ignoto passado.

(En potugala)



ĈU LA AMO ESTAS PEKO?

Elena Popova



En la monto, proksime de iu vilaĝo, estis Monaĥejo, bone fortikigita loko, for de la scivolaj okuloj. Tie ordinare venis junulinoj laŭ propra deziro.

Maria kreskis en orfejo, ŝi sciis nenion pri si mem, kaj havis neniun krom la infanoj kaj la kunlaborantaro ĉe la orfejo. Ŝi sukcese diplomigis en la mezlernejo, ĉar ŝi estis saĝa, laborema kaj modesta, sed ŝi ne havis kien iri, ŝia tuta pakaĵo estis en la sako kun subvestoj, vestaĵoj, kelkaj donacoj, kiujn ili ricevis dum la ferioj, kaj nun - ŝia diplomo. Estis nur unu vojo antaŭ ŝi - la Monaĥejo. Ŝi antaŭe parolis kun iu monaĥino pri tio iĝi novico tie. Kiam ŝi alvenis, la abatino prenis ŝin sub ŝia protekto. Ŝi komencis instrui al ŝi ĉion, kion ŝi sciis, kunportante ŝin kaj por kolekti herbojn, kaj al la vilaĝoj por trakti iun malsanan. Ŝi instruis ŝin ne nur ami unue Dion, nian ĉielan Patron, kaj poste la homojn, sed esti kompatema kaj ne rifuzi helpon al iu ajn. Preĝoj, kantoj, edukaj agadoj kaj laboro alportis pacon al iliaj animoj.

*

Kiam la milito komenciĝis, kvankam malproksime, ĝia eĥo atingis la monaĥejon. Ĉiuj preĝis por paco kaj savo de la popolo. Pli kaj pli ofte, la vilaĝanoj, kiuj venis al ili, alportis malĝojn novaĵon pri siaj parencoj, kiuj estis mortigitaj kaj entombigitaj ie, pri tiuj, kiuj malaperis sen spuro, pri la vunditoj, senditaj al siaj hejmoj por kuracado. En la proksimaj vilaĝoj, la nombro de virinoj portantaj nigrajn vestaĵojn kaj nigrajn kaptukon pliiĝis, la ferioj estis forgesitaj, kaj la nombro de viroj, kunvokitaj kun alvoko al sanga geedziĝo, malpliiĝis.

La abatino kaj la knabino jam havis multe da laboro, kaj Maria prenis sur sin la plej grandan parton de la zorgado de la malsanuloj en la vilaĝo kaj ĉirkaŭaĵo, ĉar ne estis kuracistoj, kaj la vetero postulis pli ol nur preĝojn. La knabino pensis ĉu peti permeson iri al la militistaro kiel flegistino, sed ŝi ne kuraĝis diri tion. Ŝi ankaŭ atendis ian signon de Dio pri tio, kion fari, ĉar ŝi ne volis ŝajni nedankema al tiu, kiu faris por ŝi tiom multe, kaj ankaŭ ŝin turmentis la penso, ĉu forlasi la monaĥejon estos peko.

Iun tagon, konvojo de vunditaj soldatoj haltis en la vilaĝo kaj la vilaĝanoj sendis mesaĝon al la monaĥejo. Maria kaj la abatino rigardis unu la alian dum kelkaj momentoj: "Iru," - ŝi diris, - estas nia devo helpi!"

*

Kiam la alvokoj al mobilizado iĝis pli oftaj, iu patro vokis sian filon por "vira parolado". Ili izoligis sin kaj la patro komencis sian konfeson.

— Verŝajne ni baldaŭ ricevos alvokon, ĉar kaj vi jam estas plenkreskulo. Oni ne scias, ĉu mi revenos, do mi volas rakonti al vi pri mia deveno. Vi demandis min multfoje, sed mi volis, ke vi plenkreski, por ke vi komprenu min — mi havas pekon al miaj gepatroj...

Kaj li komencis rakonti. Li estis de vilaĝo, havis malriĉajn, sed laboremajn gepatrojn. Paco kaj kompreno regis en ilia hejmo. De la antaŭa milito, lia patro revenis vundita, la vundoj saniĝis, sed li restis lama. Li decidis, ke lia filo devas lerni, ĉar li estos tiu, kiu zorgos pri la familio, kaj kiom valoras viro sen metio... Li sendis lin en teknika lernejo en malproksima urbo. Kiam li diplomiĝis, li edziĝis sen fari geedziĝfeston. Lia edzino estis gaja urboknabino, sed tre fieraj kaj ne volis, ke oni diru eĉ vorton pri lia malriĉa deveno. Ŝi diris al ĉiuj, ke li estas orfo. Filo naskiĝis al ili. Li volis nomigi la bebon Ivan-on, la nomon de lia patro, sed ŝi ne konsentis kaj ili skribis lin Kalojan, reĝan nomon.

Kaŝe de sia edzino Petro sendis leteron al siaj gepatroj, sed li ne skribis lian nomon, ne sendis inviton al siaj gepatroj, nek skribis sian adreson. Li silentis antaŭ sia edzino, ĉar li tre amis ŝin, sed io komencis ĉagreni lin.

La jaroj pasis kaj li alkiutimiĝis. Kiam lia filo kreskis, li sendis lin lerni en la sama teknika lernejo, por havi metion... Sed la milito furiozis kaj li decidis elverŝi sian animon antaŭ sia sola infano. Nun patro kaj filo staris sur benko en la venonta mallumo, eble havante lastan konversacion. Li elprenis paperfolion el sia poŝo kaj donis ĝin al sia filo:

— Jen la adreso de miaj gepatroj, memoru ĝin! Post la milito, iru al ili kaj diru, ke mi petas ilian pardonon. Pro mia amo al via patrino kaj pro via trankvilo, mi silentis. Se mi revenos viva, mi certe iros al ili, kiel la erarinta filo de la Biblio. Nun mi silentas pro honto...

La sekvan tagon venis la alvoko kaj li iris al sia pereco...

*

Kiam Maria iris helpi la vunditojn, ŝi tuj eklaboris. Tie ŝi vidis ankaŭ la lamantantulon, kiun ŝi konis pro liaj vizitoj al la monaĥejo. Li jam eksciis de konatuloj pri la morto de sia sola filo, enterigita en nekonata loko. La bofilino eĉ ne skribis tion al ili. Nun li marŝis apud la malsanuloj, konsolante ilin, dirante, ke li havas nepon, sed ne scias kie li nun estas. Unu el la vunditoj estis lia nepo. Bombo falis proksime, li restis viva kun multaj vundoj, preskaŭ surda, perdis la memoron, kaj lia vizaĝo estis tiel tranĉita, ke ĝi estis tute bandaĝita. Liaj dokumentoj kaj la sako kun liaj personaj havaĵoj estis perditaj. Li ne sciis, kiu li estas... Li komprenis, ke survoje ili haltas en vilaĝo, kies nomo parolis al li, io ekbrilis en lia memoro, sed kio?

– Avo, – la soldato turnis sin al li, – kiel vi nomiĝas?
– Ivan.
– Avo Ivan, ĉu vi prenos min en via domo? Ĉu vi akceptos min kiel via nepo? Kiam mi resaniĝos, mi helpos al vi!
– Kompreneble, filo, se vi volas!

Li turnis sin al la kuracisto:

– Doktoro, Vi plej bone scias, kia sorto atendas min. Bonvolu skribi min kiel mortinto, kaj lasu min resti kun ĉi tiuj bonaj homoj, ne malsana kaj senhejma vagi kaj petegi almozon!

La kuracisto ne konsentis, sed notis lin ĉe tiu adreso.

Maria, kiu estis proksime, aŭdis la konversacion kaj iris al la kuracisto. Li estis maljuna oficiro kun bona koro, li diris al ŝi:

– Li havas vundojn sur la korpo kaj manojn, kiuj resaniĝos, lia surdeco foriros kun la tempo, eble revenos lia memoro, sed lia vizaĝo estas tiel malbeligita, ke la cikatroj restos. Same kiel tiuj en lia animo. Li ne memoras kiu li estas...

Maria decidis – ŝi dediĉos sin al la malsanuloj kaj al ĉi tiu malfeliĉulo. Li nun estas kiel ŝi orfo... Ŝi revenis al la monaĥejo kaj diris siajn pensojn al la priorino.

– Iru ĉiutage, filino, zorgu pri li, kaj kiam li resaniĝas, tiam vi decidis! Dio helpu vin!

Tiutempe avo Ivan, kun la helpo de samvilaĝanoj, alportis la vunditan soldaton hejmen.

La monaĥino venis ĉiutage, bandagi la soldaton, donis al li kuraĝon, preĝis al Dio por helpo kaj kelkfoje mallaŭte kantis al li. La junulo, kvankam malrapide, resaniĝis, sed lin turmentis sonĝojn – ekbrilojn, kaj li ekkriis ion en sia dormo, ĝemis. Iu viro dum la sonĝo parolis al li, petante lin fari ion, sed kiu li estis?

La vilaĝestro venis.

– Avo, permesu oni enskribigu min Ivan, mi estos via nepo, ĉu?

– Mi ĝojos, filo! Kaj se mia nepo iam serĉos nin, tiam ni havos du nepojn... Tiel Ivan akiris identecon, sed nek memfidon, nek trankvilecon.

La tagoj pasis en konversacioj. Ivan komprenis, kiel bonaj homoj estas la maljunuloj, ruinigitaj de zorgoj.

*

La milito finis, la espero altiĝis. Iun tagon Ivan petis spegulon por sin vidi. Li vidis nekonatan vizaĝon, malbelan kun cikatroj. Kion fari? Li jam amis la monaĥinon pro ŝia afabla koro. Liaj novaj parencoj akceptis lin tia, kia li estas, sed kiel li diru al la knabino? Se nur pro kompato ŝi konsentus?

Ŝi ankaŭ ekamis lin, kio restis kaŝita de neni. Ŝi daŭre demandis sin en la noktaj horoj: “Dio, ĉu mia amo estas peko? Bonvolu doni al mi signon kiel procedi... Sen mi ĉi tiu junulo verŝajne estos malfeliĉa...”

En interparolo kun la priorino, ŝi diris: "Faru kiel vi volas, sed ne forgesu, ke ĉiu homo respondecas pri siaj agoj antaŭ Dio! La decido devas esti via propra!"

*

Iun tagon, kiam Maria iris al la junulo, ŝi trovis neatenditan bildon. Avo Ivan kaj onklino Nadja staris kvazaŭ gluitaj al siaj seĝoj kun malhelaj kaj larmoplenaj vizaĝoj. En la ĉambro estis du nekonataj virinoj, kaj la vizaĝo de Ivan lumiĝis per rideto.

Kio okazis?

Unu el la virinoj estis la patrino de Ivan. Post la fino de la milito, ŝi serĉis lin en la militistaro, trovis lian adreson kaj estis surprizita ekscii, ke la Sorto scias sia vojon, ŝia filo estis en la domo de sia avo. Kaj ŝi ekveturis al la homoj, kiujn ŝi neniam vidis, sed kiuj prizorgis ŝian infanon. Nun ŝi rapidis forporti lin.



Kiam Maria eniris, Ivan diris:

– Ĉi tiu estas mia Anĝelo, sen ŝia zorgo mi ne estus sana!

La patrino komprenis kaj rapidis. Ivan kisis la manojn de siaj nun veraj parencoj kaj flustris al la monaĥino, kiu silente rigardis: "Mi revenos!"

Kaj, kiel okazas en la fabeloj, Ivan/Kaloyan revenis kaj vivis feliĉe kun sia amata Maria - Anĝelina.

Ŝi ne forgesis preĝi pense: “Patro nia, ĉar Vi sama estas Amo, mi petas vin, benu nian domon, por ke ni vivu kun amo en ĝi!”

Aŭtuno, mi vin atendas!

Elena Popova



La arboj sen plendi
foliojn etendas
sur ja la tero.
Krokusoj fieraj
kun la sun` parolas -
feliĉaj sin sentas.
Hieraŭ aŭtun' lamentis,
ke vojon ĝin atendas,
sed hodiaŭ kun la vento
kantas tutkore,
Adiaŭ, Aŭtun' ora,
mi vin kun am` atendas!




Floroj por Kálmán Kalocsay

Elena Popova



Kalman, la estonta kuracisto, poeto, tradukisto kaj teoriisto de la Internacia Lingvo Esperanto, naskiĝis en hungara urbo. Kuracisto laŭ profesio, li dediĉis sian tutan laboran vivon al la fizika sano de la homoj. Sed eĉ en sia junaĝo li konatiĝis kun la Internacia Lingvo Esperanto kaj fariĝis unu el la plej elstaraj poetoj en la esperanta-mondo. Kiuj eterne vivantaj muzoj prenis lin sub sian protekton? Eble Eŭterpo - la muzo de liriko, Erato - de amkantado, aŭ Talio - de komedio? Lia literatura verkado estas tiel riĉa, ke li plej verŝajne estis favorato de ĉiu el ili. Apolono, la dio de arto kaj lumo, fluganta tra la tempo, certe donacis al li laŭrokronon, kaj la muzoj gvidataj de li, kantis honore al li dum iu mirinda festa vespero. Dum multaj jaroj mi havas kaj uzas la libron Parnasa gvidlibro, kompilita kun lia partopreno, kaj mi ĉiam mense dankas la kompilantojn, kiuj daŭre vivas kaj helpas kun sia laboro. Nun, mi iras pense al lia hejmurbo por meti bukedon da floroj antaŭ lian buston kaj riverenci al li.



Dankon, Kalman, pro via senvelka literatura agado! Kun viaj libroj, vi ĉiam estos samtempulo de la Esperanto-parolantoj en la tuta mondo!

Verkoj de Lilaketo



Lilaketo

Somer' aŭ vintro?

Ne gravas..., la animo
senfin' eltenas.

trad.el hungara:

Nyár van most vagy tél,
mindegy, lelkem remeg, fèl,
De mindig tülèl...



"...Kial mi estas ĉi tie? Kien mi iros?"

Kaj subite okazis iu stranga, iu neatendita afero: tra la fenestro enrigardis helflava radio de sunlumo. Ĝi tuŝis unue mian vizaĝon kaj mi sentis varmon..., poste mian korpon... eĉ mian koron. Mi ne povis kapti ĝin, sed mi forte sentis... Kaj en mia koro, kaj en mia animo tiam okazis iu miraklo. Mi ekstaris, malrapide mi iris al la fenestron kaj tiris la kurtenon - Sunlumo brakumis min kaj mi sentis feliĉon...

La fino de la somero

Moissey Bronshteyn



La lastaj floroj en
trankvilo de l'ĝarden',
la finaŭgusto.
Dalio, hortenzi',
somera iluzi'.
trist' en la brusto.

La lasta rikoltad',
verdaĵoj ĉe la pad'
jam kun ekflavo,
ĉielo antaŭ pluv',
aŭgust', paŝanta plu
al la forlavo.

La admirinda ben'-
umado en ĝarden',
libera spiro,
espero, ke l' destin'
dorlotos daŭre min
antaŭ foriro.

La fino de l' somero



Hajkoj

Septembra suno
maturiĝas vinberoj
merloj rikoltas

filandroj flirtas
super vasta herbejo
matena lumo

nebulvualon
survestis la kamparo
griloj mutiĝis

profunda silent'
sur orflava tapiŝo
aŭtuno paŝas

jen araneoj
por aŭtuna vojaĝo
fadenojn teksas

falas minutoj
lacaj buntaj folioj
ne plu revenos

vagantajn nubojn
vento en gregon pelis
aŭtuna pluvo


jen grizaj ŝipoj
sovaĝanseroj naĝas
en rivereto

malvarma nokto
arbaro jen paliĝis
folioj falas

pompa aŭtuno
mortaj folioj falas
en novan vivon



Elizabeta Tuboly



En la falo de flava folio

En la falo de flava folio,
mi trovas novajn demandojn.
En la kanto de malvarma sezono,
mi trovas min en malnovaj emocioj.

Kiam l' aŭtuno dancas, milda kaj afabla,
anoncas blankajn vojojn per malhela voĉo;
mi atendas, ke mia koro daŭru,
kiel lampo en silenta vento.

Kaj en la neĝa trankvilo,
mi retrovas la spurojn de la tempo;
la frosto memorigas min,
ke mi ĉiam povas trovi novan esperon
en la falo de flava folio.



Stanislao Esposito



FEBO

*Traduction en Espéranto
d'un texte Fondamental de
Curzio Malaparte*



Trad. *Roland Platteau*



« . . . **m**ia hundo Febo, kiun mi estis akceptinta malsatmortantan sur la plaĝo *Marina Corta* , en insulo *Lipari*, kiun mi estis fleginta, nutrita, vartinta en mia morta domo en *Lipari*, kiu estis mia unika kunulo en la daŭro de tiuj ekzilaj jaroj en tiu trista insulo, tiom kara je mia kor' !

Neniam amis mi virinon, fraton, amikon tiel, kiel mi amis Febon. Ĝi estis hundo tiel, kiel mi. . . . Tiu estis nobla estulo, la plej nobla kreito, kiun mi iam ajn renkontis dum mia vivo. Ĝi estis el tiu rara kaj delikata familio de leporhundoj, ĝisvenintaj el la bordoj de l'Azio kune kun la unuaj Ioniaj migradoj, kaj kiujn la *Lipari*-aj paŝtistoj nomas *cerneghi*. Tiujn-ĉi hundojn la helenaj skulptistoj skulptis sur la bareliefoj de la tomboj. « Ili forpelas morton », diradas la *Lipari*-aj paŝtistoj.

Ĝia felkoloro estis luna (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Febo>), roz- kaj or-kolora, la koloro de l'luno sur la maro, koloro de l'luno sur la malhelaj kaj glimaj folioj de l'citronujoj kaj oranĝujoj . . . Ĝi estis de la koloro de l'luno sur la helena maro de *Lipari* . . . La koloro de la morta luno, iom da tempo antaŭ l'matenruĝo. Mi nomadis ĝin Lunhundo.

Ĝi neniam malproksimiĝis de mi. Ĝi min sekvis kiel hundo. Mi jes diras, *ĝi min sekvis kiel hundo*. Ĝia ĉeesto en mia mizera domo *Lipari*-a, senĉese vipata de l'vento kaj maro, estis mirinda ĉeesto. Dumnokte la varmeta brilo de ĝiaj lunaj okuloj lumigis mian nudan ĉambron. Ĝi havis la okulojn iel palbluaj tiel, kiel la kolor' de la mar', ĉe la kliniĝanta lun'. Ĝian ĉeeston mi sentis tiel, kiel tiu de ombro. Ĝi estis kiel la respegulaĵo de mia spirito. Sufiĉis ĝia helpa ĉeesto, ke mi retrovis tiun malestimon je la homoj, kiu estas la precipa kondiĉo de la trankvilo kaj saĝeco en la homa vivo.

De ĝi, multe pli ol de la homoj, kun ilia kulturo, kun ilia gloramo, lernis mi, ke moralo estas senutila, **ke ĝi estas al si mem sia celo**, ke ĝi ne nur intencas savi la mondon (ne nur savi la mondon !) sed nur ĉiam elpensi novajn pretekstojn al sia neprofitemo, al sia libera disvolviĝo mem. Renkonto de iu homo kaj iu hundo ĉiam estas renkonto de du liberaj mensoj, de du specoj de dignecoj, de du senutiligaj moraloj. La plej senutiliga kaj plej romantika renkonto.

...

Tiu estis la plej kara inter miaj fratoj, mia reala frato, tiu, kiu perfidas ne, tiu, kiu humiligas neniam. La frato kiu amas, kiu helpas, kiu komprenas, kiu pardonas. Nur tiu, kiu suferis longajn jarojn da ekzilo en sovaĝa insulo, kaj, revenante inter la homojn, vidas sin evitegita tiel, kiel leprulo far ĉiuj tiuj, kiuj, iam, kiam estos mortinta la tirano, mienos kiel herooj pri l'libereco, nur ĉi tiu scias, kion povas esti hundo al homa estaĵo.

...

Tiu estis malgaja hundo seriozokula. Ĉiuvespere restadis ni longajn horojn sur la alta ventoplena sojlo de mia domo rigardantaj la maron. . . . Ni rigardadis la maron, flarante amaran odoron de l'salo, fortan kaj ebriigan odoron de la oranĝujoj, odoron de la kaprolakto, de la juniperaj branĉoj fajrigitaj en la fajrejoj, kaj tiun varman kaj profundan odoron virina, kia estas laodoro de la Sicilia nokto, kiam ekaperiĝas la unuaj steloj pale el la fono de l'horizonto.

Kaj iutage oni kondukis min, manojn katenitajn, de *Lipari* en alian insulon, kaj de tie, post longaj monatoj, Toskanion. Febo sekvis min el malproksime, kaŝiĝanta malantaŭ la anĉovoplenaj bareloj kaj ŝnuregaro sur la ferdeko de *Santa Marina*, la malgranda vaporŝipo, kiu ĉiusemajne veturas de Lipari Napolon, kaj inter la fiŝ- kaj tomat-plenaj korboj sur la motorboato, kiu veturas ire kaj returne inter Napolo, Ischia kaj Ponza. . . . Mi foje retrorigardis por vidi, ĉu Febo sekvas min, kaj mi vidadis ĝin laŭtangî la murojn, la voston kuntiritan inter la kruroj, en la Napolaj stratoj, de *l'Immacolatella* ĝis *Molo Beverello*, kun ravigan malĝojon en ĝiaj helaj okuloj.

En Napolo, malsupreniĝante inter la *karabenistoj* la strato *Partenope* mi vidis du virinojn alproksimiĝantajn je mi ridetante : ili estas S-ino *Benedetto Croce* kaj *Minnie Casella*, l'edzino de kara mia *Gaspere Casella*. Ili salutis min per la patrineca gracieco de la italaj virinoj, ŝovis florojn inter miaj mankatenoj kaj la manartikoj, kaj S-ino *Croce* petis al la *karabenistoj* , ke ili min konduku ien por manĝi. Mi estis nemanginta de du tagoj.

« Almenaŭ igu lin piediri ĉe la ombro », diris S-ino *Croce*.

Estis monato junio, kaj la suno frapadis al mi sur la kapon kiel per martelo.

« Dankon, mi bezonas nenion, mi diris, mi nur deziras, ke vi donu al mia hundo ion por trinki. »

Febo estis haltinta kelkajn paŝojn disde ni, kaj rigardegis la vizaĝon de S-ino *Croce* per preskaŭ suferiga intenseco. Estis la unua fojo, ke ĝi estis vidanta la vizaĝon de l'homa bonkoreco, de la kompato kaj de la afableco virinaj. Longtempe ĝi flaris la akvo, antaŭ ol trinki. Kelkajn monatojn poste mi estis translokigita Toskanion, en Lucques. Oni enkarcerigis min en la malliberejon de tiu urbo, kie mi restis longtempe. Kiam mi eliris el ĝi inter gardistoj, estonte kondukata al mia nova punekzilloko, Febo estis atendanta antaŭ la pordo de l'malliberejo, malgrasa kaj kotokovrita. ĝiaj helaj okuloj glimis je ia abomeninda mildo.

=====

Febo :



La kvar sezonoj

Laŭ la ĉinesko dekSES-silabo

Li Weilun

Jen

floras floroj en ĝarden'. Printempo
gaja, ĝusta ven'.

Ter'

ĉiam verdas en somer'. Varmega
estas la veter'.

Nun

Flavas, ruĝas la aŭtun'.

Sur ĉiel'


pendas ronda lun',

Vent'.

Tero plenas je arĝent'.

En vintro

ĉiam frosta sent'.




Brilu

Sándor Dóró



Trad. *Lilaketo*

Nur brilu en min,
blovu al mi kison,
Nur brilegu al mi,
ĝojigant' mian vivon.
Nur brilu en mi,
se mi endormiĝas,
do, brilegu en vi mem,
se mi ploras, koleriĝas.
Brilu eterne,
ĉar vi estas juvel',
brilu eĉ ankaŭ tiam,
kiam sorto batas mute.
Nur brilu eĉ pli,
se kun mi vi estas,
brilu en la okulojn,
mia amo tie restas.
Brilu en nokto,
kiel supre steloj,
ĉar vi ja scias, tie
nevideble mi jam estos.



Memora vojo

Jimmy Osborne



tradukis *Ardo*

Ni antaŭeniras
laŭ memora vojo,
la tempo ŝanĝiĝis,
sed la sento restas.

jen specifa loko,
kie kreskas floroj,
kiujn ni jam plantis
antaŭ tiel longe.

en la sonĝa kampo
kie ni ĝojludis,
birdoj gaje kantas
pri la intaj sonĝoj.

apud la rivero,
kie ni eĉ kuŝis,
sub la cipresoj
ni la tagon kaptis.



Ario de juneco

Yin Jiaxin

Daŭrigante la enhavon de numero 003



Ĉapitro 5

Laŭ sia plano Ŝja Sonlin vizitis Hu Zenzi kaj tiu diris: “Komence mi ne sciis, ke Fanhua estis fianĉinigita hejme. Mi eksciis tion el via letero. Por paroli honeste, mi ŝatas Fanhua kaj ne volas perdi ŝin. Kompreneble, mi estas sola maljunulino, mi ne povas malhelpi ŝian privatan aferon, kaj nek zorgas, kie ŝi trovas koramikon. Do, mi sincere diras al vi. Mi ne intervenos en aferoj de vi gejunuloj. Se Fanhua volas, mi ne oponos. Se ŝi ne volas, mi opinios nenion. Amo estas libera, via afero ŝajne dependas de la sinteno de Fanhua. Vi estu trankvila. La vivvojo estas longa por vi gejunuloj.”

Ŝja Sonlin povis fari nenion alian ol peti Zu Fanhua. Li transpasis la riveron Baro kaj trovis la ŝipfarejon. La pordisto diris, ke li devas telefone informi Zu Fanhua. Ŝja Sonlin atendis iom da tempo ĉe la pordego. Eliris la junulo, kiu lastfoje portis la sakon por Fanhua. Li diris al Ŝja Sonlin: “Zu Fanhua ne estas en la laborejo.”

“Ne estas en la laborejo? Bonvolu diri al mi, kien ŝi iris?”

“Kiel mi povas scii, kien ŝi iris?” malvarme diris Lin Zimin, rigardante Ŝja Sonlin kun malestima mieno.

Vidante la junulon, Ŝja Sonlin sentis malagrablon. Aŭdinte liajn vortojn, li vere volis eksplodi de kolero: Mi ne petis vin eliri, kial vi enmiksiĝas? Li detenis sin de eksplodo. Li iris al la komuna loĝdomo de laboristinoj. Oni diris al li, ke Zu Fanhua loĝas en Ĉambro 201. La pordo estis duonfermita kaj aŭdiĝis kanto el magnetofono. Li faris plurajn frapojn je la pordo. “Eniru,” diris voĉo de knabino. En la ĉambro estis du litoj kun supraj kaj malsupraj kuŝejoj. Apud la fenestro la knabino staris sur kvadrata benko por ordigi la supran kuŝejon, sur kiu estis senorde amasigitaj vestoj, libroj kaj gitaro. Dum ordigado la knabino kantetis laŭ la magnetofono. Ŝiaj ĝisŝultraj haroj estis brile nigraj, eble ĵus lavitaj, kunligitaj per naztuko; la larĝa vesperto-forma ĉemizo kovris ŝian sveltan korpon; la nigra konusa pantalono montris ŝiajn krurojn tre longaj. La knabino ne turnis sian kapon, kantetante kaj okupante sin pri sia ordigado. La figuro aspektis kiel tiu de Fanhua. Li estis preta voki, kiam la knabino turnis la kapon. Ŝi ne estis Fanhua.

“Kiun vi serĉas?” demandis la knabino.

Blankeca vizaĝo, arka brovo, brilaj okuloj, altaj nazeĝo, maldikaj lipoj. Ŝi similis Fanhua.

“Ĉu Zu Fanhua loĝas ĉi tie?”

“Ĉu vi serĉas ŝin?” Ŝia rideto estis tiel dolĉa, ĉarma, kaj kortuŝa kiel tiu de Fanhua.

Ŝja Sonlin kapjesis.

“Ŝi devas esti en la laborejo.”

“Oni neis, ke ŝi estas tie.”

“Ne estas?” dube diris la knabino. “Strange. Ŝi devas esti en la laborejo ĉi-momente. Vi sidas momenton, mi iras serĉi ŝin por vi. La malsupra kuŝejo estas la ŝia, vi povas sidi tie. Jen, bonvole trinki teon, manĝi bambonon. Atendu momenton, mi tuj venigos ŝin.”

La knabino rapidis for kantetante. Ho, kia afabla knabino!

Ĉi tiu ĉambro ne estis granda. En tri kuŝejoj kovritaj estis litaĵoj kaj en unu kuŝejo ripozis kofroj kaj diversaĵoj. Tute ne harmoniis verda armea uniformo sidanta sur tia lito. La pura littuko, brila satena litkovrilo, brodita kusenotuko. Ĉio ĉi disdonas parfuman odoron. Sur la travidebla moskitovualo pendis granda portreto de japana filmostelo Miura Tomokazu, apud kiu estis pentraĵo de belulino kun allogaj okuloj en neĝblanka tula robo, al kiu mankis manikoj kaj kolumo, tiel ke videblis la belulinaj duonaj mamgloboj. Ĉe la kapkuseno kuŝas gazeto «La Popola Literaturo» kaj mamzono el spongo. Ĉu ĉi tio estas la lito de knabino, kiu devenis el la kamparo antaŭ malpli ol du jaroj?

La knabino revenis kun stranga mieno, sen kanteti.

Dum laborhoroj oni ne licis senkaŭze forlasi la laborejon. Kial tiu malagrabla ulo diris, ke ŝi ne estas en la laborejo? Ho, mia koro! Ombro de antaŭsentita fatalo ekkovris la koron de Ŝja Songlin, Sed li ne tute perdis la fidon. Li amis ŝin, ĉiam kaj ĉie. Kia ajn malfeliĉo aŭ katastrofo estis trafonta ŝin en la estonteco, li estis amonta ŝin profunde.

La knabino eble komprenis, kio okazis inter Ŝja Sonlin kaj Zu Fanhua. “Ĉu vi estis gefianĉigitaj en la infanaĝo?” Ŝia mieno montris, ke ŝi tute ne bezonis respondon. “Jes, Zu Fanhua estas bela, laborema, akordiĝas kun ĉiu. Ŝi havas bonan karakteron. Ĉiu ŝatas ŝin. Kiel iris viaj sentoj en la pasinteco?”

La pasinteco, kiel neforgesebla! En la lernejo ili nur estis geamikoj pro naiveco. Post la diplomiĝo, li ekamis ŝin. Ŝi ŝatis lin. Li povis vidi, ke ŝi ĉiam estis ĝoja ĉiufoje kiam ili intervidiĝis. Ŝi demandis lin, kion li planas fari en la estonteco. Li diris, ke li lernos metion. Ŝi proponis, ke li lernu traktoradon, do li lernis. Li ofte veturigis ŝin al la urbeto per la sola traktoro de la produkta brigado. Tiu kvietara arbareto estis ilia bela paradizo. Tie ili staris vizaĝon al vizaĝo, tenante reciproke la manojn kaj babilante pri laboro en la kampo, pri familiaj bagatelaĵoj, pri amuzaj aferoj kaj ankaŭ pri ilia estonteco. Kvankam ilia plej intima ago estis teni la manojn, tamen li jam konis ŝian odoron bone kaj sentis ŝian varmecon. Li amis ŝin, amis ŝin, amis ŝin. Je krepusko, en la sama arbareto, tenante liajn manojn, ŝi staris vizaĝe al li trankvile. Ŝi estis tiel bela kaj alloga. Li ne povis deteni sin kaj abrupte ĵetis sin al ŝi. Li forte brakumis ŝin kaj malfermis la buŝon por kisi ŝin. Ŝi surpriziĝis, barakte liberigis sin de liaj brakoj, per fingroj pinĉetis lian nazon kaj pudore riproĉis mallaŭte: “Kia senhontulo!” kaj forkuris. En la arbaro birdoj pepadis, sur la kampo blekadis bovo, en la malproksimo aŭdiĝis virina vokado al infano. Ho, kia rava vesperkanto! Fumstrioj sorŝvebis el la kamparanaj domoj, la suno estis subiranta, la ĉielo trans la montoj estis ruĝa, sub la ruĝa lumo oni povis vidi la konturon de grizaj



montoj. Ho, kia fascina pejzaĝo! Ekde kiam decidita estis translokiĝo de Zu Fanhua al urbo Jun, la vesperkanto iĝis malpli rava kaj la pejzaĝo malpli fascina. Ŝja Sonlin ne konsciis la ŝanĝojn, ĉar liaj okuloj kaj oreloj iĝis malakraj pro amo. Kiam li fine rimarkis la ŝanĝojn, li ne volis akcepti la realon kaj ankoraŭ kovis grandan esperon. Ĝis tiu momento la espero ne perdiĝis. Li demandis la afablan knabinon: “Ĉu vi pensas, ke mi havas esperon aŭ ne?”

“Mi ne scias. Mi ne scias, kion ŝi pensas, kvankam mi estas sufiĉe intima kun ŝi.”

“Ĉu ŝi havas koramikon?” Li sondis ŝian opinion, esperante, ke ŝi ne donos pozitivan respondon.

“Tio...” La knabino ne respondis lian demandon, sed konsolis lin: “Mi pensas, ke vi persone parolu detale kun ŝi, sed ne esperu tro multe. Kompreneble, post la militservo vi certe estos asignita al via hejmloko kaj estos ne eble, ke ŝi revenos al sia hejmloko. Ŝi devas sekvi sian avinon. Eĉ se vi sukcesos ŝin edzinigi, en via posta vivo estos ĉagrene ke ambaŭ loĝos aparte. Vi devas havi sobran menson trakti tiun ĉi aferon. Vi estas soldato, mi pensas, ke soldato devas esti forta, kaj ne ĉagreniĝi pro tia bagatelaĵo. Ĉi tio estas nur via unua amo. Iuj spertis plurajn amajn malsukcesojn, sed fine ili establis feliĉan familion. Kompreneble, tute ne ĉagreniĝi estas neeble. Sed pensu, ke en la estonto vi eble renkontos knabinon pli bonan ol ŝi.”

Ho, kiaj malseriozaj vortoj! “Nur la unuafoja amo”! Se ĉiu ne alte ŝatas sian unuan amon, prenante indiferentan sintenadon pri ĝi, do, ne lasu ĉastecon ekzisti en la mondo kaj lasu hipokriteco regi la mondon!

Kiam la suno komencis subiĝi, Zu Fanhua revenis kun alia knabino. Vidante Ŝja Sonlin, ŝi malvarme salutis lin. La tri knabinoj kune iris al la kantino. Zu Fanhua revenis sola kun du porcioj da manĝaĵo. Ili ambaŭ vespermanĝis senvorte. Dum manĝado Ŝja Sonlin ekmemoris la hundon en sia hejmo: ĝi alkuris al la tablo kiam oni ekmanĝis; se iu ĵetis oston aŭ senatente faligis pecon da viando, ĝi tuj voris ĝin ĝuante. Kiam oni finis manĝagon kaj eklavis la manĝilojn, ĝi senhaste elpaŝis por petoli. Ŝja Sonlin sentis, ke la manĝo estas sengusta, sed li pacience finmanĝis ĝin.

Ŝi sidis sur sia lito kun la kapo mallevigita kaj la manoj tordantaj la harojn sur la brusto. Li sidis sur la kontraŭa lito, rigardante ŝin kaj atendante ke ŝi ekvoĉu.

Silento.

Ŝia vangoj estis rozkoloraj, eble ŝmiritaj. Ŝiaj manoj tute ne raspiĝis, ŝajne pli delikataj ol antaŭe. Kiel bone ŝi prizorgis sin mem! La oranĝkolora lana ĵerzo algluiĝis al ŝia korpo tie strikte, ke ŝiaj rondaj ŝultroj kaj mamoj aspektis pli rondaj kaj pli elastaj. Glatan kaj amorvekecan linion formis ŝiaj plenaj femuroj vestita per ĝinzo, kunligita kun la kapo, ŝultroj kaj mamoj. Ŝja Sonlin ne havis la humoron por admiri ŝian belecon. Lia menso estis konfuza kiel implikitaj kanabofibroj. Li volis eksplodi kaj samtempe voli petegi. Li ne sciis, kiel diri ĝuste. Li finfine apertigis la buŝon: “Ĉu ni iru eksteren por paroli en kvieta loko?”

“Neniu venos, sur la sportejo estos filmo.” Ŝi restis kun la kapo klinita.

“Kial vi ne renkontiĝis kun mi kiam la pordisto telefonvokis al la laborejo?”

“Mi estis okupita.” Ŝi ankoraŭ ne levis la kapon.

“La knabino serĉis vin...”

“Oni ne licas renkontiĝi kun gastoj dum laborhoroj.” Ŝi levis la kapon kaj diris kun malvarma tono.

“Bone. Kial vi ne respondis al miaj leteroj dum tri monatoj?”

“Ne necesas.” La tono estis ankoraŭ malvarma.

“Vi indignas, ke mi skribis al via avino, ĉu? Mi sentas, ke mi faris tion ne malĝuste...”

“Vi povas skribi plie, se vi havas sufiĉe da energio,” ŝi sarkasmis.

“Ni ambaŭ estu trankvilaj, ĉu bone?”

“Mi ne kverelis kun vi kaj ne intencas kvereli. Mi estas laca, la kapo doloras.”

“Ĉu vi tiel malŝatas min?” li demandis dolore.

Ŝi respondis nenion.

“Kiam mi enlistiĝis en la armeon, ĉu vi ne deziris al mi sukceson?”

“Ho, mi nur amike deziris al vi sukceson, kaj ne havis alian sencon. Vi tro pensis.”

“Ĉu la senco ne estis sufiĉe klara? Vi estas urbano kaj mi kamparano. Finonte la militservon mi ne plu estos kamparano. Ĉu via deziro de sukceso ne estis sufiĉe klara? Krome, niaj gepatroj gefianĉigis nin en la infanaĝo...”

“Jes, niaj gepatroj gefianĉigis nin. Tiam mi estis juna kaj ne komprenis, kio estas amo. Ni estis amikoj. Ĉiu devas esti sia mastro en la elekto de sia amato. Vi ĉiam menciis, ke niaj gepatroj gefianĉigis nin. Mi ne jam edziniĝis al vi. Ni eĉ ne havas gefianĉiĝan ateston. Ĉu per simplaj vortoj miaj gepatroj forvendis min al vi? Bonvolu ne plu menciigi gefianĉiĝojn, kaj bonvolu ne plu tedi min.” Ŝia tono elmontris indignon.

“Vi...” Ŝja Sonlin subite sentis, ke lia cerbo fariĝas malplena. Kvankam antaŭ nelonge li antaŭsentis ĉi tiun rezulton. En la momento kiam la antaŭsento fariĝis la realaĵo, li apenaŭ povis regi siajn sentojn. Li suferis terure en la koro. Kun strieto da espero li diris per petega tono: “Ne estu tiel, Fanhua. Mi amas vin elkore. Ĉu vi forgesis la vojon al la lernejo? Ĉu vi forgesis tiun arbaron? Ĉu vi forgesis la subirantan sunon?”

“Mi ne volas plie paroli. Tempas por vi reiri. La pramo ĉesas je la sepa vespere, kaj ne troviĝas gastejo en ĉi tiu flanko de la rivero. Foriru. Mi havas kapdoloron kaj volas dormeton.” Dirinte, ŝi demetis la altkalkanajn ŝuojn kaj ekkusis sur la liton, ignorante Ŝja Sonlin tremantan.

Ŝja Sonlin tremante stariĝis: “Ĉu mi estas tiom abomeninda?”

Li fiksitis sian rigardon sur Zu Fanhua kuŝanta kun fermitaj okuloj kaj deziris kapti ŝin kaj fari al ŝi kelkajn vangofrapojn, aŭ premi ŝin al sia sino kaj kisadi ŝin forte; li deziris strangoli ŝin, aŭ skui ŝiajn ŝultrojn kriegante “Mi amas vin”. En lian kapon venis iluzio, ke li aliformos ŝin en minipupon kaj forprenos ĝin kun si per siaj ambaŭ polmoj.

Tamen, li estis tute seniluziigita. Kun rompita koro li eliris el la komuna loĝdomo, el la ŝipfarejo kaj al la pramejo kvazaŭ al la pordo de infero.



La pramo ankoraŭ ne alvenis, li staris ĉe la bordo rigardante la ondetantan riveron Baro. La akvo estis ruĝigita de la subiranta suno. Li malbenis, ke la suno neniam leviĝos kaj neniam pompos la vesperruĝo super la montoj. Ŝi fermis la okulojn, samtempe fermis lian koron kaj frakasis lian revon. Ho, ve! Birdetoj en la arbaro, vi kanu nur por morto, ne por amo, nek por vivo; la senfine fluanta rivero Baro, vi forportu ĉies esperojn; lasu homojn vivi en senŝona dormado. lasu ĉiun havi malican koron...

“Hej, soldato, soldato.”

Li malsprite turnis sian vizaĝon. Tri junuloj grimacanta per la lipoj kontraŭ li. “Hej, ni vokas vin.” La parolanto estis Lin Zimin, kiu parolis kun li ĉi-posttagmeze ĉe la ŝipfareja pordego, ankaŭ kiu portis la sakon por Zu Fanhua. Ŝja Sonlin rigardis lin senesprime, kaj flamo ekleviĝis en lia koro.

“Vi ĵus intervidiĝis kun Zu Fanhua, ĉu ne?” demandis Lin Zimin. “Kiel iris la konversacio? Ĉu ne sukcesis? Mi diras al vi, vi ne plu ĝenu ŝin, ŝi havas koramikon. Ŝi estas la mia, ĉu vi scias?”

Ŝja Sonlin jam delonge suspektis tion. La triumfan mienon de Lin Zimin ekbruligis la flamon pli forte en la koro de Ŝja Sonlin. Liaj okuloj fikse rigardis tiujn de Lin Zimin.

“Kio? Vi ŝajne ne volas akcepti la fakton, ĉu? Se la knabino ne ŝatas vin, vi devus esti prudenta kaj tuj foriri. Hm, anstataŭ resti en la armeo, vi ŝtelvenis serĉi knabinon.” Dirinte tiujn vortojn, Lin Zimin ekturis sin por foriri kun la du junuloj.

Ŝja Sonlin sentis, ke lia tuta sango ektorentas al lia kapo. Tio estis vere insulto! Li ne povis toleri la arogantecon de aliuloj, precipe tiun de tiu ĉi urba kanajlo, kiu forrabis lian amatinon. Li ne komprenis, kial Zu Fanhua amas tian friponon, ĉu nur pro tio, ke li estas urbano? Fi, ĉi tiu mondo, diablo, diablo! Ĝuste kiam Lin Zimin turnis sin, Ŝja Sonlin subvoĉe murmuris: “Diablo!”

“Kio? Kiun vi insultas?” Lin Zimin abrupte returnis sin kaj alproksimiĝis al Ŝja Sonlin, direktante demandon: “Vi ribelos? Kiun vi insultas? En militista uniformo, tiel malbone kondutu: allogi knabinon kaj insulti arbitre. Soldato, mi diras al vi: se la knabino ne volas, vi simple foriru, ne insultu. Alie vi akiros malbonan reputacion pri via lingvaĵo, tiel ke neniu knabino ŝatos vin.” Lia tono estis moka.

“Ha, ha, ha...” la duopo ekridegis.

Ŝja Sonlin batis Lin Zimin per forta vangofrapo sur la buŝon. La ridegoj abrupte ĉesis. Sangstrio elfluis el buŝangulo de Lin Zimin. Luktado komencis kaj nature Ŝja Sonlin estis batita de la triopo sur la teron. Apenaŭ Ŝja Sonlin leviĝis, la triopo jam forkuris sen spuro.

Kiam Ŝja Sonlin leviĝis, la doloro de la korrompiĝo anstataŭiĝis per forta deziro venĝi. Baldaŭ, la venĝemo transformiĝis en murdan deziron. Li ordigis siajn vestojn, aĉetis tranĉilon en butiko kaj ŝtele eniris la ŝipfarejon. Ĉe la vira komuna loĝdomo li ĵus elektis observan angulon, kiam Lin Zimin, vestitan nete, elpaŝis el la pordo. Li estis sola. Tio estis perfekta! Ĉu li iris al la sportejo por spekti la filmon? Ne, li direktiĝis al la kaduka ŝipo surborde. Tio estis bonega! Gvatu lin! Kiu estis tiu silueto sub la poba kastelo? Ĉu ne estis Fanhua? Ho, la Ĉielo! Kion li vidis? Ili sin brakumis kaj ekkisis! Ho, la Ĉielo! Fanhua per unu mano ĉirkaŭprenis la kolon de tiu aĉulo kaj per la alia senĉese karesis liajn ŝultron kaj dorson. Rigardu, kiel elegantaj estas ŝiaj staturaj linioj! Oni diras, ke la linio de venena serpento estas la plej perfekta. Ho, iru al morto! Tiu kanajlo per unu mano karesis al ŝi la harojn kaj per la alia knedis al ŝi la bruston. Iliaj buŝoj estis firme kunpremitaj. Ho, kiel malica! Ĉu tiu estis Fanhua? Ne, tiu estis koketa sorĉistino! Mortigu lin, mortigu ŝin, mortigu ilin ambaŭ!

Antaŭ ol Ŝja Sonlin kviete alproksimiĝis, la paro ĉesigis kisadon kaj disiĝis. Lin Zimin direktis sin al la sportejo dum Zu Fanhua iris al la loĝdomo. Ŝja Sonlin pensis, ke li mortigu la sorĉistinon, amindan serpenton; nun ke li ne povas akiri ŝin, neniu alia povos!

Kiam la knabinoj revenis de la sportejo, la sceno en Ĉambro 201 terurigis ilin. Sur la lito de Zu Fanhua kuŝis flanko-ĉe-flanke du gejunulaj kadavroj. La knabino estis strangolita kaj la junulo estis Ŝja Sonlin, kies manartiko estis tranĉita. La littuko estis makulita de pecego da sango. (*[Daŭrigota](#)*)

Aŭtuna impreso

Autumn impression

秋日感怀 *Herbstimpression*




.... Sonetfaris *Yi Qiao*

Jen lazura vaste la ĉielo,
scen' aŭtuna sur kamparo regas.
Blank-kolomboj soras tra l'kastelo,
nostalgion mildan oni vekas.

Mi promenas sole tra l'arbaro,
mian vangon nun la briz' karesas.
Pensas mi l'pasinton kun bildklaro,
multajn spertojn mi ja ne forgesas.

Ĉi aŭtun' sopiras al sereno
kaj ĉiama amo dum la vivo.
Mi suspiras mole kun kompreno
pri la homa laŭfortuna drivo.

Ho, aŭtuno estas buntsezono,
la rikolt' abundas al dispono.



Printema Festo

Yin Jiaxin



Olda Zou sciis, ke la filo ne plu revenos, tamen li ĉiutage sidis sur la sojlo, tenante cigaredon inter fingroj, kaj rigardis tra branĉonj de la kaduka pirarbo en la korto al la serpentuma monta vojo en la malproksimo. La januara vento tranĉis lian vizaĝon kiel tranĉilo, sed li tute neglektis ĝin. Malantaŭ li en la kuirejo, lia edzino Hulin okupiĝis pri vaporumado de gluriza kuko por la Novjaro, kaj dolĉa aromo de la kuko miksiĝis kun bonodro de ligna brulado en la malvarma aero.

“Olda Zou, envenu por varmiĝi, ekstere estas malvarme,” Hulin vokis, viŝante siajn manojn sur la antaŭtuko.

Olda Zou ne voĉis, li profunde enspiris la fumon kaj elspiris blankan nebulon, kiu rapide disbloviĝis en la vento. En 2003, lia solfilo, Zou Lilan fariĝis fajrobrigadano en la urbo Vudan. Li tre ĝojis, ke la filo havos banan estonecon. Ĉe la jarofino la filo diris letere, ke li devos deĵori kaj ne povos reveni por la Printempa Festo; la sekvantan jaron li diris, ke al la brigado mankas homforto kaj li restos por ke aliaj kolegoj unue rehejmiĝos por la festo. Li promesis, ke venontjare li certe revenos hejmen por la Printempa Festo. Printempa Festo estas tempo por familia rekuniĝo, kaj la filo ne povos reveni hejmen pro sekureco-protektado de popolanoj. Olda Zou komprenis sian filon, sed en la koro li sentis ioman maldolĉon.

Iuvespere de aŭtunmezo en 2005, sidante sur la korto kaj aprezante la lunon, Olda Zou refoje sopiris al sia filo. Li demandis sian edzinon: “Ĉu vi opinias, ke ĉijare Lilan revenos?”

Hulin paŭzis siajn movojn, kaj ŝiaj okuloj ekbrilis de iom da espero: “Ĉu ne en la letero antaŭ kelkaj tagoj li diris, ke li certe revenos ĉijare? Li ankaŭ diris, ke li alportos al ni bonajn aĵojn el la urbo.”

Olda Zou kapjesis, kaj sur lia sulkiĝinta vizaĝo aperis malforta rideto. Li paŝis al la ŝranko kontraŭ muro de la salono, sur kiu staras kelkaj fotoj. La plej okulfrapa estis tiu de la filo portanta fajrobrigadan uniformon kaj staranta rekte kiel pino. Apude estis foto de tuta familio fotita antaŭ ol la filo iris al Vudan-urbo. Tiutempe la hararo de lia edzino ne tute blankiĝis.

Leviĝante por reiri en la domon, Hulin diris: “Li estas facile komprenema knabo. Sciante, ke ni lin sopiras, li skribas al ni ĉiumonate. Legante liajn leterojn, mi sentas min trankvila, kvazaŭ li parolus antaŭ mi.”

Olda Zou diris: “Ho, Vudan ne estas tro malproksime de ĉi tie, nur iom pli ol cent kilometroj. Se li nur povus ofte reveni...”

“La armeo havas siajn proprajn regulojn, ĉu li povus ne obei ilin? Sufiĉas, se li povos reveni dum la Printempa Festo.” Dirante, ridetemo ludis ĉe ŝiaj lipoj: “Kiom feliĉe ni festus la novan jaron kune!”

Olda Zou silente eniris la ĉambron.

La geedzoj estis pretiĝantaj por enlitiĝi, kiam subite ili aŭdis aŭtan bruon en la malproksimo. Lia koro ekbatis emocie, kaj li rapidis al la enirejo de la korto.

“Ĉu Lilan revenis?” Hulin haste sekvis lin.



Minibuso ekhaltis antaŭ la korto, kaj du viroj en milita uniformo eliris kun serioza mieno. La pli aĝa paŝis antaŭen: “Ĉu vi estas la gepatroj de Zou Lilan?”

Subite la manoj de Hulin ekkaptis brakon de la Olda Zou, kaj ŝiaj ungoj preskaŭ enpenetriĝis en ties karnon. Olda Zou kapjesis, kaj sinistra sento ekregis lian koron: “Jes, vi estas...?”

La viro diris mallaŭte: “Ni estas de la fajrobrigado de Vudan. Simple preparu vin kaj iru kun ni por vidi vian filon. Ni rakontos la detalojn survoje.”

Efektive, tiun tagmezon, furioza incendio okazis en loĝdomo. Zou Lilan kvinfoje impetis en la brulantan konstruaĵon por savi kaptitajn homojn, sed la lastan fojon li ne sukcese eliris el la flamoj.

La mondo ŝajnis halti en tiu momento. Hulin eligis korŝiran krion kaj molfalis sur la seĝon. Olda Zou mekanike subtenis sian edzinon, kaj sentis, ke tremadis liaj propraj kruroj.

La geedzoj plurfoje svenis pro ploro ĉe la funebra ceremonio pri sia filo. Post kiam Zou Lilan estis enterigita en la Martira Tombejo de Vudan, la fajrobrigado kaj la urbaj civilaj aŭtoritatoj sendis veturigi la geedzojn hejmen kun la martira atesto kaj medalo de Zou Lilan. Longan tempon ili ne povis akcepti la fakton, ke la filo jam fariĝis martiro.

La Novjaro proksimigis kaj Olda Zou ĉiutage sidis ĉe la enirejo de la korto, rigardante la malproksimon, kvazaŭ atendente la revenon de sia filo.

Je la 23-a de la dekdua monato laŭ ĉina kalendaro, i.e. en la tago de la Malgranda Novjaro, Olda Zou frue leviĝis kaj balais la tutan korton. Dume Hulin okupiĝis pri preparado de novjaraj manĝaĵoj: fumaĵita viando, kolbasoj, hejme farita riza vino, ĉio, kion ilia filo ŝatis. Olda Zou speciale iris al la urbeto por aĉeti longan rulon da petardoj.

Posttagmeze, venis reprezentantoj de la urbaj civilaj aŭtoritatoj, alportante simpatian monon kaj kelkajn novjarajn donacojn. Ili diris multon konsolan. Kvankam Olda Zou kaj Hulin sentis iom da varmeco, tamen ne mildiĝis la aflikto kaj soleco en iliaj koro.

En la lasta tago de la jaro, peza neĝo faladis, kaj la montoj aspektis nebulaj. Olda Zou kaj Hulin vizaĝalvizaĝe sidis silente ĉe la tablo, sur kiu kuŝis tri manĝilaroj: unu estis por ilia filo. Laŭ la moro de suda Ĉinio, Hulin pretigis ok pladojn kaj supon el lotusa radiko kaj osto.

“Lilan plej ŝatis porkaĵon stufita en sojo,” Hulin metis pecon da la porkaĵo en la malplenan teleron, kaj ŝia voĉo tremetis, “Mi speciale stufis ĝin pli longe, por ke ĝi estu tre mola.”

Olda Zou verŝis vinon en ĉiujn tri tasojn: “Jen, nia familio rekuniĝis.” Lia rigardo falis sur la foton de la filo sur la ŝranko: ties suna rideto ĉiam restis kaptita en la aĝo de dudek kvin jaroj.

En la malproksimo, petardoj eksplodadis ĉie, kaj ĉiu familio festis sian familian kuniĝon. Sed la jarfina vespermanĝo en la domo de Olda Zou estis manĝata en nekutima silento, nur interrompata de okazaj plorsingultoj.

Kutime oni intence maldormas kun ĉiuj lampoj lumantaj ĝis post noktomeze en la jarfina nokto. Tiunokte la geedzoj babiladis, rememorante pri la pasintaĵoj. Hulin diris: “Olda Zou, mi memoras, ke Lilan plej timis eksplodadon de petardo en sia infanaĝo. Ĉiufoje li kaŝiĝis en viaj brakoj.”

Antaŭ la okuloj de Olda Zou aperis la bildo: la malgranda Lilan kaŝas sian vizaĝon en lia sino, kovrante siajn orelojn per la manoj. Li fiere kaj emociite diris: “Ekster mia atendo, li estis tiel brava kiel fajrobrigadano!”

Je la unua mateno de la nova jaro, Olda Zou ellitiĝis frue. Flokoj de neĝo ankoraŭ flirtis sovaĝe en la ĉiela volbo kaj la tero estis kovrita de dika tavolo da neĝo. Li pendigis la petardojn sur la pirarbo.

“Kion vi faros?” Hulin apogis sin sur la pordokadro kun la okuloj ruĝaj kaj ŝvelintaj.

“Post malfermo de la pordo en la unua tago, oni devas unue bruligas petardojn por bonvenigi la novan jaron, ĉu?” Olda Zou respondis trankvile. “Malgraŭ ke Lilan ne plu ĉeestas, la vivo devas daŭri.”

La eksplodoj de la petardoj resonis tra la ravino, timigante amason da paseroj sur malproksima arbo. Olda Zou ĉirkaŭbrakis la ŝultrojn de sia edzino, kaj ili kune rigardis, ke la lasta strio da fumo malaperis en la frosta aero.

“Ni reiru en la domon, ekstere estas malvarme,” Olda Zou softis al la edzino.

Post kiam ambaŭ eniris la domon, Hulin subite haltis: “Olda Zou, aŭskultu, ĉu ne estas aŭtoj?”

Olda Zou streĉis siajn orelojn. Vere, en la malproksimo aŭdiĝis la bruo de aŭtoj. La sono pli kaj pli proksimiĝis, ĝis fine ĉesis ekster ilia korto.

“Laŭ tradicia moro filo vizitas sian gepatrojn en la unua tago kaj filino en la dua tago de Novjaro. Ni havas nek filon nek filinon. Kiu venas, eĉ en tia vetero?” miregis Olda Zou.

Malferminte la pordon, li gapis je la sceno antaŭ li: kvin junuloj elaŭtiĝis, tenante sakojn plenajn de novjaraj donacoj.

"Onklo, onklino, feliĉan novan jaron!" la junuloj laŭte salutis unuvoĉe.

La geedzoj staris senmove, dum momento ne povante elparoli vorton.

"Ni estas la kunbatalantoj de Zou Lilan," la altkreska junulo paŝis antaŭen. "Li ofte diris, ke ĉijare li certe revenos hejmen por festi la novan jaron kun vi. La deziron kiun li ne povis plenumi, ni venis por plenumi anstataŭ li."

"O, o, rapide envenu! Ekstere estas malvarme!" diris Hulin kun larmoj en la okuloj. Nur tiam la Olda Zou rekonsciiĝis.

La kvin junuloj eniris unu post alia, kaj la malvarma domo subite pleniĝis de varmeco. Ili alportis dolĉaĵojn, fruktojn kaj varmoprotektajn vestojn por la geedzoj. La rondvizaĝa junulo elprenis radioricevilon el sia sako: "Zou Lilan diris, ke vi ambaŭ amas aŭskulti operojn. Ĝi povas ricevi programerojn de multaj stacioj!"

Hulin viŝis la larmojn kaj infuzis teon. Dume Olda Zou babilis kun la junuloj de la sama aĝo kiel sia filo, kun miksado de aflikto kaj varmeco en sia koro.

"Onklo, Zou Lilan estis la plej brava en nia brigado," la okulvitra junulo diris serioze. "Li savis almenaŭ dudek vivojn. Ni ĉiuj prenas lin kiel modelon."

Olda Zou ridetis fiere.

"La knabineto, kiun li fine savis, jam elhospitaliĝis. Ŝiaj gepatroj intence venos danki vin." diris alia junulo.

Hulin kovris la buŝon per mano kaj rapidis en la kuirejon. Olda Zou sciis ke ŝi ekploris. Li profunde enspiris kaj diris al la junuloj: "Dankon, ke vi venis de malproksime por viziti nin."

"Onklo, ne diru tion," la rondvizaĝa junulo diris kun ruĝiĝintaj okuloj. "Zou Lilan estis nia kunbatalanto, ankaŭ nia frato, kaj vi du ja estas kiel niaj gepatroj. Ĉiun printempan feston, iuj el ni venos viziti vin."

Tagmeze, Hulin pretigis plenan tablon da manĝaĵoj. La junuloj manĝis kun apetito, senĉese laŭdante "kiajn bonajn pladojn onklino kuiris." La domo pleniĝis de delonge neaŭditaj ridoj kaj oreplaĉa tintado de manĝiloj.

Post la manĝo, la junuloj konkuris pri lavado de la teleroj kaj ordigado, poste ili akompanis la geedzojn en babilado. Ili rakontis multajn amuzajn historiojn pri Zou Lilan en la brigado.

Vesperkrepuskiĝis, kaj la junuloj devis adiaŭi la geedzojn. Antaŭ foriro, ili forbalais la neĝon sur la korto kaj riparis la iom ŝanceliĝantan kortopordon.

La geedzoj longtempe staris ĉe la kortopordo manenmane, rigardante la du aŭtojn malrapide forveturi kaj malaperi el la serpentuma monta vojo.

"Olda Zou, nia filo ne foriris malproksimen." Hulin flustris. "Li vivas en ĉi tiuj junuloj."

Olda Zou kapjesis, ĵetante sian rigardon al la svagaj montoj. Li sciis, ke la venontaj tagoj daŭre estos plenaj je sopiro al la filo, sed ne plu tiel solecaj.

Reirinte en la domon, la geedzoj trovis ruĝan koverton kun iom da mono kaj papera slipo kiu legiĝis: "Patro kaj patrino, jen nia modesta esprimo de estimo. Zou Lilan ĉiam estos kun ni."

Ekster la fenestro, neĝflokaj ŝvebadis pli forte, ornamante la tutan mondon pura kaj paca. ■

La malĝoja rozo

Yunior Nuñez Proenza



Trad. *Erika Godó*

La rozo malĝojas,
velkinta pro amo,
mankas al ĝi pluvo,
karesoj de suno.

La rozo malĝojas,
la ĝardeno ne belas,
ĝi estas neglektita,
kun herboj senfinaj.

La rozo malĝojas,
ĝi mortas pro ĉagreno,
ne estas papilioj
nek murmuroj de abeloj.

La rozo malĝojas,
venas la nokto,
ĝiaj petaloj fermiĝas,
la kompatinda dormas.



La okupata abelo

Malgranda abelo flugas en la suno,
Kviete rigardas la buntan herbejon.

Ŝi konstante moviĝas de floro al floro,
Zorge kolektante dolĉan nektaron.

Ŝi portas oran polenon kun si,
Ŝi konservas ĝin en la anguloj kaj fendetoj de la abelujo.

Ŝi estas laborema senmezure,
Ŝi kreas donacojn de mielo por ni.

Danke al ŝi, floroj ornamas sin,
Novaj semoj naskiĝas.

Ŝi ludas gravan rolon en la mondo,
Vi devas protekti ŝin, kompreneble!



Verkis:

Szamborski Paweł



Tradukis:

Ryszarda Kwiatkowska



Nerevenonta Reĝino

GONG Xiaofeng



La malnova mezlernejo staris silente sub la aŭtuna suno, kvazaŭ atendante la revenon de siaj iamaj lernantoj. Subite la pordego malfermiĝis kaj amaso da mezaĝuloj eniris la korton - viroj kaj virinoj en siaj 50-aj kaj 60-aj jaroj, kun grizaj haroj kaj sulketoj ĉirkaŭ la okuloj, sed kun ridetoj tiel varmaj kiel en ilia juneco.

Ili disiĝis en malgrandajn grupojn, murmurante inter si:

"Ĉu vi memoras tiun arbon? Ni ĉiam sidis sub ĝi dum ripozo!"

"Rigardu! Nia iama klasĉambro - la fenestroj estas ankoraŭ la samaj!"

Inter ili, la iama klasmonitoro - nun kun grizaj tempioj kaj iom rondigita talio - tenis liston kaj vokis nomojn. Unu post unu, la kamaradoj respondis. Kelkaj voko estis sekvataj per ekkrioj, kiam iu rekonis iun alian post longa tempo.

"Zhang Ming!"

"Ĉi tie! Ho, vi same kalviĝis kiel mi!" ridis dika viro, frotante sian brilan kapon.

"Li Na!"

"Jen mi!" respondis gracia virino. "Via hararo griziĝis, sed via rideto estas tute sama!"

La atmosfero estis gaja kaj senĝena. Por multaj, ĉi tiu estis la unua renkontiĝo post kvardek jaroj. Ili interŝanĝis rigardojn, provante diveni en la maturaj vizaĝoj la konturojn de la junuloj, kiujn ili iam konis.

Subite, la klasmonitoro vokis: "Lilio Zhao!"

Silento.

La gajaj babiloj subite ĉesis. Iu flustris: "La belulino..." Alia diris: "La reĝino de nia klaso..."

Kvardek jaroj pasis, kaj plej multaj neniam revidis la iaman klasfloron. Ĉiuj atendis ŝian aperon kun koro plena de nostalgio.

En tiu momento, la vic-klasestrino alpaŝis. Ŝi metis la manon sur la ŝultron de la klasmonitro kaj flustris kelkajn vortojn en lian orelon.



Subite, la paperfolio en lia mano ekstremitis. Lia vizaĝo paliĝis, kaj larmoj ekfluis sur liaj vangoj. La alta viro ŝajnis disfali antaŭ ĉiuj.

"Lilio..." li diris per rompiĝanta voĉo, "ŝi neniam plu revenos al ni."

En la peza silento, la aŭtuna vento flirtis tra la arboj, forportante la lastan esperon revidi la belulinon, kies rideto iam lumigis ilian junecan memoron.

En liaj larmoj oni povis vidi ne nur doloron, sed ankaŭ la kaŝitan amon de juna knabo, kiu antaŭ jardekoj sekrete admiris la reĝinon de la klaso. La revo renkonti ŝin denove, kiun li portis en sia koro dum kvardek jaroj, subite disrompiĝis por ĉiam.

La aero peziĝis. En la silento, oni aŭdis nur la sopiradon de la vento tra la foliaro de la malnovaj arboj, kvazaŭ ankaŭ ili ĝemis pri la eterna adiaŭo.

Lilio estis la plej bela knabino kun lakteca kaj glata haŭto. Jes, ŝi povus venki ĉiun koron en la lernejo — almenaŭ laŭ niaj kamaradoj — kaj pro tio ŝi ne klopodis altiri iun. En la okuloj de samklasanoj kaj instruistoj, ŝi estis stelulino. Sendube, ŝi estis la reĝino de la tuta lernejo.

Bebo Lilio ne estis tute feliĉa: onidire ŝiaj gepatroj forlasis ŝin. Sed ŝi ankaŭ spertis feliĉon — ŝia adoptopatro estis fama dentisto en la loka hospitalo. Hejme, kiel sola infano, ŝi estis dorlotata; en la lernejo, ŝi estis ŝatata de preskaŭ ĉiuj instruistoj, pro ŝia ĉarmo, lerta parolo, dolĉa rideto, kaj ankaŭ pro ŝia fama adoptopatro. Kiu rifuzus rilaton al altnivela dentisto? Precipe se oni longe suferis dentdoloron.

Lilio estis bela kaj diligente lernema. Ŝi ĉiam atingis elstarajn notojn, estante inter la unuaj du en la klaso. La instruistoj atendis, ke ŝi senprobleme trapasu la altlernejan enir-ekzamenon. Multaj antaŭvidis brilan estontecon por ŝi. Ŝi mem iĝis pli kaj pli princina — ne, reĝina — kaj eĉ revis pri la estonta universitata vivo. Sed kiam la ekzamenoj proksimiĝis, ŝia humoro iĝis nefirma kaj ŝanĝiĝema: foje vigla kaj helpema, foje malgaja kaj indiferenta. Tamen, la kamaradoj daŭre kredis, ke reĝino simple estas tia. Lilio ĉiam restis ilia reĝino.

La Klaso Tri, nomita la elita klaso, konsistis el 54 elektitaj lernantoj el la 200 ontaj abiturientoj. La lernejo strebis altigi sian prestiĝon kaj deziris multajn sukcesojn en la altlerneja enir-ekzameno, do metis grandajn esperojn sur tiujn 54 kapojn. La junuloj avide lernis por rehavi la tempon perditan dum la kultura revolucio. Kvankam la tuta klaso intense prepariĝis, fine nur 6 el la 54 — fakte el la tutaj 200 abiturientoj — sukcesis eniri altlernejojn. La enirprocento estis malpli ol 7%, la tutlanda mezumo en 1978.

Lilio ne estis inter tiuj 6 feliĉuloj, kio surprizis ĉiujn. Onidire, dum la fizika ekzameno, ŝi subite forgesis gravan formulon, ekpanikiĝis, kaj ne povis reordigi siajn pensojn. Ŝi sentis sin sorĉita, neniel solvis la ceterajn problemojn, kaj kiam ŝi konsciiĝis, tempo jam mankis. La fiasko ankaŭ influis ŝian humoron en la sekvaj ekzamenoj. Fine, Lilio malsukcesis.

Tiam, neniuj riproĉis ŝin. Estis la unua landa enir-ekzameno post la kultura revolucio, kaj la ŝanco studi en universitato estis treege malgranda.

Lilio devis refrekventi specialan klason por malsukcesintoj, por prepari sin por la venontjara ekzameno. Fine, en 1979, ŝi kaj sep aliaj sukcesis. Ŝi eniris medicinan kolezion kaj poste iĝis kuracisto.

Poste, Lilio edziniĝis kaj translokiĝis kun sia edzo al Guangzhou, prospera urbo. Komence ŝi laboris en hospitalo, poste magistriĝis kaj ricevis postenon en medicina instituto, kie ŝi ankaŭ instruis. Lilio specialiĝis en ginekologio kaj fariĝis tre fama.

Ŝi revenis al sia hejmurbo antaŭ kelkaj jaroj, invitite de kamarado baldaŭ elmigronta al Kanado. Dek kelkaj renkontiĝis en hotelo. Estis la dua — kaj lasta — fojo ke mi vidis ŝin post la gimnazio. Ŝi aspektis pli juna kaj eleganta ol samaĝaj kamaradinoj, kun sia lakteca haŭto preskaŭ tia kiel antaŭe, nur kun kelkaj sulketoj ĉe la okulanguloj. Kiam ŝi parolas pri sia edzo, ŝia vizaĝo radiis de fiereco kaj amo fluis el ŝiaj vortoj.

En Guanzhou, ŝia edzo agis kiel fiŝo en akvo. Post nur kelkaj jaroj li promociiĝis kaj riĉiĝis, fine fariĝis altranga oficisto en la provinca registaro. La vivo ŝajnis perfekta. La edzo bone laboris kaj prizorgis la familion, donante al Lilio luksan vivon. Ŝi fariĝis tute dependa de li — li estis ŝia ĉielo. Danke al sia peno kaj bonŝanco, Lilio doktoriĝis kaj profesoriĝis, igante sin tre respektata kuracistino. Sendube, ŝi vivis plej feliĉe el la tuta klaso. Se nenio okazus, oni povus diri, ke Lilio vivus kiel reĝino eterne.



Sed en 2015, ŝia edzo subite arestiĝis kaj kondamniĝis al 10 jaroj en malliberejo pro politika koruptado. Lilio preskaŭ freneziĝis. Ŝia ĉielo falis. Ŝi ne kutimis vivi sen sia edzo, kaj pli kaj pli kredis, ke ĉiu subridas kaj mokas ŝin. Ŝi timis eliri. Ŝia mensa stato malboniĝis, kaj ŝi ne plu povis aŭ kuraci pacientojn aŭ instrui. Fine, la universitato permesis ke ŝi antaŭtempe retiriĝu el sia ofico — fakte, kiel profesorino gvidanta doktorajn studentojn, ŝi rajtis labori ĝis 65-jara. Sed ŝi ne toleris plu. Nokte ŝi turmentiĝis en sia lito, kaj fine englutis troan dozon da Luminalo. Ŝia bela vivo finiĝis je 56 jaroj, 10 monatojn antaŭ la gimnazia renkontiĝo.

Sur la grupfoto, refotita laŭ la origina vicordo de antaŭ 40 jaroj, mankas la tria persono de dekstre en la dua vico. Lilio neniam revenos inter nin. ■

Leontodo

Jen, leontodo ŝvebanta
antaŭ mia fenestro.
Je etenditaj manoj mia
multkolora papilio alflirtanta.



Jadranka Miric

Suna tenera tuŝo
estis haltigita
pro subita venta puŝo.
Ho, ventaĉo neatendita!

Papililio malgajiĝis,
pro ĉarma leontodo
mire tra aer' flugludanta.
Nun, ĝi ventblove malaperis...



Malfrua aŭgusto

Jadranka Miric



Malvarma mateno.

Aero freŝas kvazaŭ malvarma duŝo,
post varma ellitiĝo.

Malfrua somera tuŝo.

Taso da nigra kafo vaporiĝas.
En la vazo via adorata floro,
similas al la viaj lipoj, ho, mia koro.
Kiel ni bone amuziĝas.

Antaŭ nia domo
acidĉerizarbo kreskis.
En via mano pomo.
Tenere mildas via kis’.

Aŭdiĝas muziko-akordiona,
belaj sonoj viciĝas.
Pasia brakumo. Miona,



Zamenhof la Orienta

Ĉielismo



Hodiaŭ mi parolas al vi veran rakonton pri Zamenhof la Orienta.

Zamenhof la Orienta ne estas lia naskita nomo. Lia naskita nomo estas Origino Z. Lia patro estas sro Bambuo Z tre konata esperantisto kaj altnivela instruisto en nia urbo Siano, kaj lerneje kaj hejme instruis lernantojn de la lingvoj angla kaj Esperanto multajn jarojn. Tial lia hejmo fariĝis koresponda adreso kaj renkontejo de lokaj esperantistoj. Maljunece lia patro emeritiĝis de la bibliotekestro de nia urbo... Nun mi revenas al rakonto pri mia konato Origino Z.

En tiu jaro, kiam Origino estis knabo dekdujara, kaj ne trapasis ekzamenon por eniri la mezlernejon, li ne scias kion fari, ĉar li estas denaska ĝibulo, kiu ne taŭgas por forte fizika laboro. Tiam lia patro unuafoje serioze proponis al li lerni Esperanton konsiderante ke ĝi estas facila kaj instrui ĝin ne postulas oficialan kvalifikon malkiel instrui naciajn lingvojn. Por kuraĝigi sian filon la patro emfazis grandecon de la kreinto de Esperanto, rakontinte multajn legendojn de Zamenhof dum la knabeco krei novan lingvon universalan por la homaro. Tiuj legendoj kaptis la knaban koron okaze kiam Origino restas senkonsilita antaŭ sencela estonteco.

“Esperanto?” li ĝojiĝis.

“Jes, Esperanto estas lerninda.” Respondis la patro.

“Kial vi ne proponis pli frue, Paĉjo?”

“Mi timis ke pli da lingvoj ĝenas vian lernotaskon...”

“.....nun mi estas libera, kara patro. Mi deziras lerni Esperanton.”

“Bonege! Jen estas Unua libro de Esperanto. Ankaŭ en mia ĉambro ne mankas aliaj libroj de Esperanto. Laŭ via plaĉo libere preni kaj legi ilin vi volas hejme.” diras la patro.

Pasis kelkaj tagoj, kaj li ellegis la libreton Unua libro de Esperanto. Li sentas ke Esperanto ne estas mistera, sed simpla sen arteco. Pro tio lin interesas la lingva kreinto Zamenhof ol la simpla lingvo Esperanto. Eĉ li komencis havi kaŝitan ideon ke li volas fariĝi Zamenhof la Orienta! Kompreneble, tiu ideo estas lia sekreto kiel Zamenhof iam kaŝis sian sekreton al sia patro Marko.

“Kara filo, ĉu vi jam ellegis la libron de Esperanto?”


“Jes, kara patro.”

“Kio estas via opinio kaj ideo?”

“Esperanto estas simpla sen arteco.”

“Jes, simpla, sed por posedi ĝin vi benozos lerni kelkajn jarojn.” La patro daŭras paroli, “dum lernado de Esperanto mi planas sendi vin lerni ankaŭ gravuran arton ĉe Metiisto D, ĉar Esperanto ne estas sufiĉa por subteni vian vivon.”

“Mi komprenas.”



Metiisto D estas fama tradicia majstro gravuri sur lignaj pordoj, fenestroj kaj mebloj diversajn desegnojn kaj figurojn, precipe liaj legendaj figuroj ĉinaj tre plaĉas al klientoj. Ni devas konfesi ke Origino Z havas denaskan talenton je gravurarto. Li ne estas alta, sed liaj manoj estas grandaj kaj fortaj. Lia gravurilo ĉizas lignojn facile kaj lerte. Nur post unu jaro li jam povis gravuri ĉinajn figurojn. Sed li ne ŝatas ĉinajn figurojn. Li preferas ĉizi fremdajn figurojn.

“Kio estas la figuro?” demandis Metiisto D.

“Zamenhof.”

“Kiu estas Zamenhof?”

“Kreinto de la mondlingvo.”

“Kiu volas aĉeti lian figuron?”

“Mi ne scias.”

“Se neniŭ aĉetos ĝin, vi eluzis mian lignon. Vi devas pagi la materialon.”

“Mi ne havas monon, ĉar vi nur donas al mi la manĝon.”

“Mi scias tion. Kunportu al via patro la figuron, por kiu li povos pagi.”

Origino Z kunportis sian verkaĵon hejmen, kaj rakontis al sia patro la okazon.

“Kara filo, via verkaĵo estas bela.” La patro laŭdas taksante la figuron de Zamenhof.

“Kion fari? Majstro D devigas min rekompenci la materialon.” Mallaŭte diris Origino Z.

“Sen problemo via patro deziras pagi lian perdon, ankaŭ donos al vi poŝmonon por ke vi povos aĉeti librojn pri okcidenta arto kaj Esperanto.”

Post du jaroj Origino Z finis sian metilernadon ĉe Majstro D, kaj revenis hejmen. Tiam alvenas la nova Ĉinio fondita de la komunisto, kiu kondukas maldekstran kulturon de Eŭropo precipe de la rusia revolucio. Lia tradicia lignarto fariĝas malmoda kiel kulturaĵo de la malnova socio. En la nova Ĉinio ĉinaj esperantistoj

ankaŭ aktivas kongrueme kun la nova socio. Lokaj esperantistoj ofte vizitis kaj kunvenis en lia hejmo. Okaze lia patro Bambuo ŝatas prezenti lian lignartaĵon Figuro de Zamenhof. La lignartaĵo plaĉas al esperantistoj, eĉ iuj aĉetis liajn verkaĵojn.

Fakte li gravuras la figuron de Zamenhof koncentrante sian animon, ĉar li havas sian sekreton fariĝi Zamenhof la Orienta. Kiam li estas sola, li ŝatas parkere dialogi kun la figuro de Zamenhof.

“Estimata Zamenhof, Vi estas kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Esperanto estas okcidenta lingvo. Tiom da fremdaj vortoj ĝenas la ĉinojn kaj azianojn. Mi volas krei alian internacian lingvon, kiu baziĝos de ĉinaj vortoj uzitaj de pli ol miliardoj da parolantoj en Azio. Mi volas fariĝi Zamenhof la Orienta.”

Vidinte maturiĝon de sia filo je la figuro de Zamenhof kaj neprogreson je la lernado de Esperanto, la patro demandas al sia filo:

“Kara filo, Gratulon al via maturiĝo je la figuro de Zamenhof! Tamen mi trovas ke via nivelo de Esperanto ankoraŭ restas en ABC. Kial?”

“Kara paĉjo, Mi estas okupita de ĉina antikva lingvo.”

“Kio? Vi volas fariĝi paleografo?”

“Ne. Kara paĉjo, Mi opinias ke la ĉina antikva lingvo estas multe libera kaj malloga je la vorto kaj frazo ol Esperanto. La homaro bezonas tian lingvon ol Esperanto.”

“Kion? ” la patro estis mirigita “Vi ne volas lerni Esperanton?”

“Mi jam lernis. Esperanto estas simpla.”

“Sed vi ne ellernis ĝin, eĉ ne povas legi facilan libron de Esperanto.”

“Jes. Mi ne intencas legi tiujn facilajn librojn de Esperanto. Mi volas fariĝi Zamenhof la Orienta krei pli belan lingvon ol Esperanton.”

La patro silentiĝas, ĉar li konas sian filon tre obstina je ideo. Lia filo ne estas malsaĝa eĉ male, tre saĝa ke li okupas ion tute koncentrema, se li volas. Kiam li lernas en elementa lernejo, kelkare li okupis elstaran lokon. Sed en la fina jarlerno li hazarde legis gravurartan libron el la hejma librobreto. Li tute falis en la arton... Finfine li ne trapasis la ekzamenon por eniri la mezlernejon. Pro tio sro Bambuo eĉ havis sinkulpigon, ĉu mia libro rompis estontecon de la filo? Por kompensi sian kulpon la patro proponis al sia filo Esperanton kaj lignogravuran metion. Ĉu ĉifoje li denove faris duoblan kulpon kontraŭ sia filo? Li vere esperas ke Origino fariĝos esperantisto kiel li povas instrui Esperanton hejme. Sed li neniam povis imagi, ke Origino volas fariĝi Zamenhof la Orienta! La patro konas sian filon Origino ke lia edukiteco tute mal-eblas krei iun ajn lingvon. Kion fari? Li povas nur bedaŭri sian proponon al sia filo lerni Esperanton...

Malgraŭ tio Origino neniam forlasis esperantistojn en nia urbo, ankaŭ ŝatas ĉeesti ĉiujn Esperanto-okazojn, ĉar iuj ŝatas lian verkaĵon Figuro de Zamenhof, ankaŭ estimas lian filecon de sro Bambuo eĉ post la forpaso de sro Bambuo multajn jarojn. Kvankam Origino estas ĝibulo, tamen li havas majestrecon kaj ĉiam malrapide iras


kaplevanta, ĉar li havas sian ambicion fariĝi Zamenhof la Orienta. Li neniam diras la singularan pronomon “mi” kaj ĉiam pluralan pronomon “ni”. Memore, kiam veterana esperantisto O estro de la urba administracio sincere proponis al Origino postenon kiel pordiston de la urba ministracio, konsiderante ke Origino ne havas vivtenan laboron, konstantan enspezon kaj pensian estontecon, Origino rifuzis la simpatian proponon respondante ke Ne taksu min kiel senlaborulon. Mi estas Zamenhof la Orienta, kiu ne eblas fariĝi la pordisto!

Kio estas lingvo de Zamenhof la Orienta? Neniu scias. Li estas tre saĝa homo kiel olda komercisto kaj havas grandan paciencon antaŭ ol ricevi garantian monpagon. Iutage Origino diris al mi: Mi jam pagis multajn jarojn eĉ mian vivon por mia mondlingvo Orienta. Mi ne devas facile fordoni al iu ajn mian inventaĵon, kiu povos doni al mi la tutan kompenson. Mi estas viro sopiranta al fondado de mia familio ankaŭ sekve naski mian posteulon. Mi kredas mian ideon finfine realigota kiel Zamenhof la Okcidenta! Kion fari? Kia obstina homo! Kiam mi rakontis al Esp-profesoro F instruanta en Siana Fremdlingva Kolegio la kompatindan aferon de Origino, la lingva profesoro opinias ke Origino faras aferon, kiun li ne kapablas kaj neniuj bezonas hodiaŭ. Fakte, Origino volis interesi lokajn esperantistojn kiel Zamenhof invitas Volapukanojn, sed neniuj deziras aŭskulti lian ideon.

Post iuj jaroj li jam ne parolis pri sia lingvo kun esperantistoj, ankaŭ ne ofertas al ŝtataj instancoj sian mondlingvon Orienta. Tamen li ofte vizitas malnovajn esperantistojn en nia urbo. Okaze li kutimas paroli pri lia patro Bambuo kun movadaj rakontoj, ĉar danke al lia patro kiel eksĉefo de la urba biblioteko, dum lia maljuneco la urba biblioteko donacas al li malkaran vivmonon. Li volas kunlabore kun nia Esperanto-Asocio fondi muzeon de Esperanto en lia loĝkorto memore al lia patro kaj pasintaj E-aktivuloj en nia urbo, oportune ke nia asocio ankaŭ povos ofici kaj kunveni en la muzeo. La ideo estas bona. Por tio mi vizitis la korton trovita sen la akvo kaj elektro. Kio okazis?

Aĥ, post la forpaso de lia patro lia patrino vendis al stratadministrejo la loĝkorton. Li rifuzis sian monparton donita de sia patrino, kaj ĉiam loĝas en la korto. Pro tio la stratadministrejo ĉesigis la akvon kaj elektron. De tiam li kiel fantomo restas tie nur por la nokta dormo, kaj de ĉiu mateno ĝis la vespero li vagadis strate aŭ restis en senkotizaj publikejoj, aŭ vizitis al mi kaj konataj esperantistoj apenaŭ tagmanĝan horon subkonscie por manĝi sate. Krome li tre regule vizitas la urban bibliotekon por preni la malkaran vivmonon. Unufoje mia amiko M oficestro de la urba biblioteko demandis min, ĉu Origino estas membro de via Esperanto- asocio? Oni diris ke li volas fariĝi Zamenhof la Orienta... Mi respondis ke jes, li estas nia senkotiza membro delonge, kaj li deziras fariĝi Zamenhof la Orienta, sed ŝajne Ĉinio ne bezonas tiun Zamenhof la Orienta. Se vi deziras aŭskulti lian historion, mi povos rakonti al vi. Kompreneble, mia amiko M ne volas aŭskulti ion ajn pri Origino. Fakte, Origino lastjare jam ne ofertas sian mondlingvon Orienta, ĉar ĉiuj jam konas lian rakonton multjare ripetitan sen ĉeso. Alie, Origino jam estas maljuna kaj liaj manoj kiel sekaj vergoj jam ne povas gravuri lignan figuron de Zamenhof...kvankam li ankoraŭ ne forgesas sian revon fariĝi Zamenhof la Orienta.

Pri lia loĝkorto nia asocio ne kapablas helpi lian juĝproblemon kaj belan planon fondi memoran muzeon de lia patro..... Baldaŭ mi tute forgesis la aferon. Sed iun tagon mia amiko M telefonis al mi, dirante ke lastajn du monatojn Origino ne vizitas la bibliotekon por preni sian vivmonon..., demandante, ĉu vi scias, kio okazis al Origino? Mi tuj memoras ke ja lastajn monatojn Origino ankaŭ ne vizitas min kaj nian asocion. Tio ne estas normala. Mi respondis al mia amiko M, ke Origino estas filo de la emerita ĉefo de via biblioteko. Laŭ la ĉina kutimo malgraŭ ĉio la urba biblioteko kiel ento de lia patro devas sendi sian oficiston kontroli lian staton! Mia amiko M promesis fari tion.



Post kelkaj tagoj mia amiko M denove telefonis al mi, ke Origino jam mortis unu monaton hejme sola, ĉar lia loĝkorto estis ĉiam fermita ke neniuj vizitas ĝin kaj scias, kio okazis en ĝi. Kompreneble la urba biblioteko kiel ento aranĝis lian kremacion sen iu ajn ceremonio. Aĥ, tiel foriris Zamenhof la Orienta, kiu vivis tutan vivon por oferti sian sekretan lingvon Orienta, kiun ĝis lia morto mi ne vidas. Kaj memorinde li lasis al ni liajn lignartaĵojn Figuro de Zamenhof. Post duonjaro kiam ni esperantistoj kunvenis kaj refoje babilis pri Origino, mi proponis viziti lian loĝkorton. Iun dimanĉon mi kun kelkaj samideanoj vizitis la lokon, kie jam malaperis lia loĝkorto kaj stariĝis publika necesejo ĉe la strato. Vea ŝoko ke tie ne estus muzeo de Zamenhof la Orienta, sed la feka necesejo publika ĉe la strato! La vera historio ofte estas kurioza ol iu ajn novelo, ĉu ne? Feliĉe Zamenhof la Orienta ne scias tion! ■



aŭtorino, *Pearl S Buck*
(Usono)

Vento orienta – Vento okcidenta (6)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 003*



elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

ĈAPITRO 8

Kiel mi povas vortigi la komencon de la favoro de mia edzo al mi, Fratinjo? Kiel mi eĉ mem sciis kiam lia koro tiris lin?

Ho, kiel la frida tero scias, ke ĝia koro estas tirata al burĝonado de la printempa suno. Kiel sentas la maro kiam la luno altiras ĝin?

Mi ne scias kiel pasis la tagoj. Mi sciis nur ke mi ĉesis senti min sola. Kie li troviĝis, tiu loko fariĝis mia hejmo, kaj mi ne plu pensis pri la domo de mia patrino.

Dum la longaj horoj de la tago, dum lia foresto, mi cerbumis pri ĉiuj vortoj de mia edzo. Mi memoris liajn okulojn, lian vizaĝon, la kurbon de liaj lipoj, la indiferantan tuŝon de lia mano kontraŭ la mia kiam li turnis la paĝon de la libro sur la tablo antaŭ ni. Kiam noktiĝis kaj li estis tie antaŭ mi, mi sekrete ekrigardis lin kaj nutris mian koron per liaj rigardoj dum li instruis min.

Tage kaj nokte mi pensis pri li, kaj kiel la rivero en printempo, kiu abunde fluas en la kanalojn malplenajn pro la vintra senpluveco, kiel la rivero fluanta en kampon kiu igas ĉion esti viva kaj fruktodona, tiel la pensado pri mia mastro efikis sur min, kaj plenumis miajn bezonojn kaj forigis mian solecon.

Kiu povas kompreni tiun potencon en viro kaj juna virino? Tio komenciĝas per hazarda renkontiĝo de la okuloj, per timida kaj longa ekrigardo, kaj subite tio ekflamas al brulanta fiksrigardo. Jen ektuŝo de la fingroj, unue rapide retiritaj, kaj tiam la koro urĝiĝas al koro.

Sed kiel mi diru eĉ al vi Fratinjo? Tiu estis la tempo de mia granda ĝojo. Pro tiuj vortoj, kiujn mi nun elparolas mi embarasiĝas. Je la lasta tago de la dek-unua monato mi sciis, ke ĉirkaŭ rikoltotempo, dum la mezo de la jaro, mi naskos bebon.

Kiam mi rakontis al mia edzo, ke mi estis plenuminta mian devon al li per koncipado, li estis tre feliĉa. Li formale sciigis siajn gepatrojn unue kaj poste siajn fratojn, kaj ni ricevis iliajn gratulojn. Kompreneble la afero ne tuj koncernis miajn proprajn gepatrojn, sed mi firmdecidis diri tion al mia patrino dum mia Novjara vizito.

Nun komenciĝis la plej malfacila parto por mi. Ĝis nun mi estis persono de malmulta graveco ene de la familio de mia edzo. Ĝis nun mi estis nur la edzino de unu el la pli junaj filoj. Mi preskaŭ tute ne partoprenis en la familia vivo ekde nia translokiĝo el la granda domo. Dufoje je interkonsentitaj okazoj mi iris al la patrino de mia edzo por montri mian respekton kaj servi al ŝi teon, sed ŝi traktis min supraĵe, kvankam ne malafable. Nun subite mi fariĝis kvazaŭ sacerdotino de la destino. En mi, mi portis la esperon de la familio – heredanton. Mia edzo estis unu el ses filoj el kiuj neniuj havis virseksan idon. Se mia infano estus filo, do, lia rango estus tuj apud la plej aĝa frato de mia edzo en la familio kaj la klano, kaj li estus la heredonto de la familio. Ho, estas la malfeliĉo de patrino, ke ŝia filo apartenas al ŝi nur dum la unuaj mallongaj tagoj! Tro frue li devas preni sian lokon en la granda familia vivo. Mia filo povas esti mia dum nur tia tre mallonga tempo! Ho Ĝuanjin, protektu mian etan infanon!

La ekstazo en la horo kiam mia edzo kaj mi unue parolis pri la infano rapide forpasis pro la angoro kiu premis nin. Mi jam diris, ke tiu estis malfacila tempo por mi; malfacila pro la amaso da konsiloj kiujn mi ricevis de ĉiuj. Plej gravaj estis la vortoj de mia respektinda bopatrino.

Kiam ŝi aŭdis pri mia ĝojo, ŝi venigis min al ŝi. Antaŭe kiam mi vizitis ŝin, oni ricevis min formale en la gastohalo, ĉar ekde nia translokiĝo ŝi estis iomete malhumila al ni. Sed ĉi-foje estis evidente, ke ŝi ordonis al la servanto konduki min al la familia ĉambro malantaŭ la tria korto.

Tie mi trovis mian bopatrinnon, kiu, atendante min, sidis apud la tablo, trinkanta teon. Ŝi estas majesta maljunulino, tre dika, kun etaj piedoj, jam delonge netaŭga por ŝia pezego. Nun, se ŝi faras eĉ unuopan paŝon, ŝi forte apogas sin sur du fortikaj sklavinaj, kiuj ĉiam servopretaj staras malantaŭ ŝia seĝo. Ŝiaj manoj estas malgrandaj kaj kovritaj de oraj ringoj kaj tiel dikaj, ke la fingroj elstaras rigide el la amaso de kavetplena karno. Ŝi ĉiam tenas enmane longan pipon el polurita arĝento, kiun ŝiaj sklavo daŭre plenigas kaj ekbruligas por ŝi per peco da tordita papero, tiel ke ŝi brulettas kaj povas esti rapide blovita al flamo, por ŝia uzo.

Mi tuj iris al ŝi kaj riverencis. Ŝi ridetis tiel ke ŝiaj mallarĝaj lipoj malaperis en la grasajn pezajn vangojn, kaj tiam ŝi prenis mian manon kaj milde frapetis ĝin.

“Bona filino, bona filino”, ŝi diris per raŭka voĉo. Antaŭ longa tempo ŝia kolo ne plu videblis pro amaso da graso, kaj ŝia voĉo estas ĉiam astmeca.

Mi sciis, ke mi plaĉis al ŝi. Mi verŝis teon en bovlon kaj per ambaŭ manoj prezentis ĝin al ŝi, kaj ŝi akceptis ĝin. Tiam mi sidiĝis sur malgranda kromseĝo. Sed ŝi ne permesis, ke mi humiliĝu tiel nun, kvankam antaŭe ŝi estis indiferenta pri kie mi sidis. Ridetante kaj tusante ŝi geste invitis min sidi en la seĝo ĉe la tablo vid-al-vide al ŝi, kaj sekve mi plenumis ŝian ordonon.

Ŝi tiam venigis siajn aliajn bofilinojn, kaj ili ĉiuj venis gratuli min. Tri el ili neniam koncipis, kvankam ili estis edzinoj dum pluraj jaroj, kaj al tiuj mi reprezentis riproĉon kaj kaŭzis envion. Fakte, la plej maljuna, flavvizaĝa virino ĉiam suferanta de malsano, komencis laŭte lamenti nun kaj balanciĝi tien kaj reen priplorante sian sorton. “Aj-ja, aj-ja, kia amara vivo, kia malbona destino!” Mia bopatrino sopiris kaj skuis sian kapon kun grava mieno kaj ŝi toleris, ke ŝia plejaĝa bofilino konsoliĝu per plorado dum la daŭro de fumado de du tabakoplenajn pipojn. Sed tiam ŝi petis ŝin silenti, ĉar ŝi volis paroli kun mi. Poste mi eksciis, ke la plej aĝa frato de mia edzo ĵus prenis duan edzinon, pro tio ke la unua neniam naskis infanojn al li. Tio klarigis la aflikton de la kompatindulino tiun tagon, ĉar ŝi amis sian edzon, kaj ŝi finfine konsciis ke ŝiaj preĝoj kaj oferoj al la dioj restis neatentitaj de ili.

Mia bopatrino donis al mi multajn bonajn konsilojn. Inter alie ŝi diris ke mi ne preparu ajnajn vestaĵojn antaŭ la naskiĝo de la infano. Tio estis la kutimo en la domo de ŝia infanaĝo en Anhujo, kie homoj kredis ke tio utilas por malhelpi la kruelajn diojn ekscii pri la baldaŭa nasko, ĉar vidante homon naskiĝontan en la mondon, ili volus detrui lin. Sed kiam mi aŭdis pri tiu kutimo mi demandis:

“Kion do li portos, la eta nuda novnaskito?”

“Volvu lin”, ŝi diris grave, “en la plej malnova vestaĵo de lia patro. Tio allogas bonan sorton. Mi faris tion kun miaj ses filoj kaj ili vivis.”

Miaj bofratinoj ankaŭ petis min fari multajn, multajn aferojn, kaj ĉiu sciigis min pri tiurilataj kutimoj en iliaj hejmoj. Ili aparte emfazis, ke mi manĝu certan fiŝon post naskiĝo de la infano, kaj ke mi trinku bovlojn da akvo kun bruna sukero. Tiel ĉiu, per sia konsilo, malpliigis sian propran envion.

Kiam en la vespero mi revenis al mia edzo, feliĉa pro la afabla intereso de lia familio, mi rakontis al li pri ĉiuj aferoj, kiujn ili petis min fari por la infano. Al mia terura surprizo li subite fariĝis kolerega. Li metis la manojn tra la hararo dum li grandpaŝe iris ĉirkaŭ la ĉambro.

“Sensencaĵo, sensencaĵo, sensencaĵo!” li kriis. “Ĉiuj mensogoj, ĉiuj superstiĉoj, neniam, neniam!” Li haltis kaj prenis miajn ŝultrojn kaj rigardis serioze en mian suprenrigardantan vizaĝon. “Promesu al mi”, li diris firme, “ke vi lasos vin gvidi nur de mi. Memoru ke vi devas obei! Kŭei Lan promesu al mi aŭ mi ĵuras, ke ni neniam havos plian infanon!”



Pro mia timo, kion mi povis fari krom promesi?

Kiam mi dube promesis, li fariĝis pli kvieta. Li diris:

“Morgaŭ mi prenos vin kun mi al okcidenta hejmo por vidi la familion de mia antaŭa instruisto, kiu estas usonano. Mi deziras, ke vi vidu kiel okcidentanoj zorgas pri siaj infanoj, ne por ke vi sklave kopiu ilin, sed por plivastigi viajn ideojn.”

Mi provis obei mian edzon. Nur unu aferon mi kaŝe faris. La sekvantan mantenon je krepusko, mi elŝteliĝis el la domo kun nur unu servanto, kiu akompanis min. Mi aĉetis bastonojn de incenso en la butikoj tiel frue, ke nur eta oscedanta metilernanta knabo moviĝis en la malluma nebula mateno. Tiam mi iris al la templo, ekbruligis la incenson kaj metis ĝin antaŭ la malgranda malhela Gŭanjin kiu donas filojn kaj facilan naskon. Mi frapis mian kapon sur la marmoran slabon antaŭ ŝi. Ĝi estis ankoraŭ malseka pro la nokta roso. Mi murmuris tion, kio estis en mia koro kaj leviĝis kaj rigardis ŝin petegante. Ŝi ne respondis kaj la urno estis plena je cindroj de incenso, kiun la aliaj patrinoj metis tie antaŭ mi, kun preĝoj kaj sopiroj kiel la miaj. Mi puŝis pli firme la bastonojn da incenso kiujn mi ekbruligis, kaj lasis ilin bruli tie antaŭ ŝi. Tiam mi reiris al mia hejmo.

Fidela al siaj vortoj, mia edzo venigis min viziti la hejmon de siaj fremdlandaj amikoj. Mi estis nemalmulte scivolema, kaj eĉ iomete timema. Mi ridetas pri tio nun, mi, kiu nomas vin Fratinjo!

Sed konsideru, ke mi neniam estis en fremda domo. Mi ne havis okazon. Mi neniam marŝis tra la stratoj, kaj neniue en la hejmo de mia patrino interkonatiĝis kun fremduloj. Mia patro vidis ilin, certe, dum siaj vojaĝoj, kaj li konsideris ilin senkonsekvencajn, krom ke li devis ridi pri ilia kruda aspekto kaj iliaj abruptaj kaj malafablaj manieroj. Nur mia frato strange admiris ilin. Li ofte vidis ilin en Pekino, kaj en lia lernejo estis kelkaj fremduloj, kiuj estis liaj instruistoj. Unufoje mi eĉ aŭdis onidiron, antaŭ mia edziniĝo, ke li vizitis domon de fremdulo, kaj mi tre multe admiris lian aŭdacon.

Sed en la domo de mia patrino ne ekzistis tia interago. Iufoje butikumanta servantino revenis kaj ekscitite rakontis, ke ŝi vidis fremdulon preterpasantan en la strato, kaj tiam estiĝus mirplena babilado pri iliaj mortpala haŭto kaj palkoloraj okuloj. Mi ĉiam aŭskultis kun la sama scivolemo kaj timo, kiujn mi havis kiam Ŭang Da Ma rakontis al mi pri la spiritoj kaj diabloj de arkaikaj tempoj. Fakte, la servantoj eĉ flustris pri la nigra magio de tiuj fremduloj kaj ilia kapablo ŝteli la animon el homo per eta maŝino en nigra skatolo tra kiu ili rigardis per unu okulo. Kiam io klikis ene de la skatolo, oni sentus strangan feblecon en la brusto, kaj tuj poste okazos malsano aŭ akcidento kondukante al morto.

Sed mia edzo nur laŭte ridis kiam mi rakontis al li tiajn aferojn.

“Kiel do mi revenis vivanta, loĝinte en ilia lando dum dek du jaroj?” li demandis.

“Ho, sed vi estas saĝa, vi lernis ilian magion”, mi respondis.

“Venu kaj vidu mem kiaj ili estas”, li respondis. “Ili estas viroj kaj virinoj kiel ĉiuj aliaj.”

Konsekvence, je la sama tago, ni iris kaj enpaŝis en la ĝardenon kun herbotapiŝo kaj arboj kaj floroj. Mi surpriziĝis, ke ĉio estis tiel bela, kaj ke okcidentuloj komprenas la valoron de la naturo. Tamen la aranĝo de ĉio estis tre kruda: neniam kortoj nek orfiŝlagetoj, sed arboj plantitaj dise iel ajn kaj floroj kreskantaj neregule laŭplaĉe. Mi devas konfesi, ke kiam finfine ni staris antaŭ la pordo de la domo, mi estus forfuĝinta se mia edzo ne estus tie kun mi.

La pordo subite malfermiĝis de interne, kaj alta vira “fremdlanda diablo” staris tie, ridetante tra lia larĝa vizaĝo. Mi sciis, ke li estas viro, ĉar li portis vestaĵojn kiel tiuj de mia edzo, sed horigite mi konstatis, ke sur lia kapo, anstataŭ homaj haroj nigraj kaj rektaj kiel tiuj de aliaj homoj, li havis krispan, ruĝan lanon. Liaj okuloj estis kiel ŝtonetoj lavitaj de la maro, kaj lia nazo leviĝis kiel monto meze de lia vizaĝo. Ho, li estis timiga kreitaĵo, pli hida ol la Dio de la Nordo ĉe la enirejo de la templo.

Mia edzo estas bravulo. Li tute ne ŝajnis perturbita pro la aspekto de tiu

viro; li etendis sian manon, kaj la fremdulo prenis ĝin kaj movis ĝin supren malsupren. Tio ne surprizis mian edzon, kiu turnis sin al mi kaj prezentis min. La fremdulo ridetis sian grandan rideton kaj estis prenonta ankaŭ mian manon. Sed mi nur rigardis tiun manon etenditan. Ĝi estis granda kaj osteca, kaj sur ĝi troviĝis longaj ruĝaj haroj kaj nigraj punktoj. Mi kuntiriĝis. Mi ne povis tuŝi ĝin. Mi metis miajn manojn en la manikoj kaj riverencis. Li ridetis eĉ pli larĝe tiam kaj invitis nin eniri.

Ni eniris etan halon kiel nian propran kaj poste en ĉambron. Apud la fenestro sidis persono, kiun mi tuj identigis kiel fremdulinon. Almenaŭ ŝi portis, anstataŭ pantalonon, longan kotonan robon kun plata kordo ĉirkaŭ la mezo. Ŝiaj haroj ne estis tiel hidaj kiel tiuj de ŝia edzo, ĉar ili estis glataj kaj rektaj, kvankam de malfeliĉa flava koloro. Ŝi ankaŭ havis tre altan nazon, kvankam ne kurbita kiel tiu de sia edzo, kaj grandajn manojn kun mallongaj kvadrataj najloj. Mi rigardis ŝiajn piedojn kaj konstatis, ke ili havis la grandecon de rizo-draŝiloj. Mi pensis en mi:

“Kun parencoj kiel tiuj, kiaj estos la etaj fremdaj diablidoj?”

Mi devas agnoski, tamen, ke tiuj fremduloj estis ĝentilaj, laŭ siaj ebloj. Ili faris erarojn, kaj senĉese rivelis sian mankon de kulturo. Ili prezentis la bovlojn da teo per unu mano, kaj kutime servis min antaŭ ol servi mian edzon. La viro fakte alparolis min rigardante rekte en mian vizaĝon! Tio, mi sentis, estis insulto. Li devus afable ignori mian ĉeeston, kaj lasi sian edzinon distri min.

Oni ne povas kulpigi ilin, mi supozas. Tamen ili jam loĝas ĉi tie dum dek du jaroj, laŭ mia edzo. Oni konjektus, ke ili lernus ion dum tiu tempo. Certe vi, Fratinjo, ĉiam loĝis ĉi tie kaj nun vi estas unu el ni.

Sed la plej interesa parto de la vizito okazis kiam mia edzo petis la fremdulinon, ke ŝi permesu ke mi vidu la infanojn kaj iliajn vestaĵojn. Ni mem ekspektis nian propran infanon, li klarigis, kaj tial li deziras ke mi vidu la okcidentajn kutimojn. Ŝi tuj leviĝis kaj petis min supreniri. Mi timis iri sole kun ŝi. Mi rigardis helpopete al mia edzo, sed li nur kapkline indikis ke mi akompanu ŝin.

Alveninte supren mi forgesis pri timo. Ŝi kondukis min en sunplenan ĉambron hejtita de nigra forno. Estis strange, ke kvankam ili evidente volis varmigi la ĉambron, ili lasis la fenestron iomete malfermita, tiel ke daŭre envenis malvarma aero. Sed tiujn detalojn mi ne tuj notis. Mi unue vidis mirindigitaj tri etajn fremdulojn ludantaj sur la planko. Mi neniam antaŭe vidis tiajn strangajn kreitaĵojn!

Ili aspektis sane grasaj, sed ili ĉiuj havis blankajn harojn. Tio konfirmis kion mi aŭdis, ke fremdlandanoj inversias nian naturon kaj naskiĝas kun neĝblankaj haroj kiuj malheliĝas dum ili pliaĝiĝas. Ili havis tre blankan haŭton. Mi supozis ke oni lavis ĝin en ia medikamenta akvo, ĝis la patrino montris al mi ĉambron, kie ili ĉiuj estis tutkorpe lavitaj ĉiutage. Tio, do, estis la klarigo pri ilia haŭto. La natura koloro paliĝis pro tiom da lavado.

La patrino montris al mi ankaŭ iliajn vestaĵojn. Ĉiuj iliaj subvestaĵoj estis blankaj, kaj fakte, la plej juna estis blanke vestita de kapo al piedo. Mi demandis al la patrino, ĉu la infano funebras pro iu parenco, ĉar blanko estas la koloro de afliktiĝo, sed ŝi respondis, ke ne estas tiel, sed estis nur por certigi la purecon de la infano. Mi pensis, ke malhela koloro estus pli taŭga, ĉar blanko tiel facile malpuriĝas. Sed mi observis ĉion kaj diris nenion.

Tiam mi vidis iliajn litojn. Ili ankaŭ estis kovritaj blanke, kaj tio estis pleje deprimiga. Mi ne povis kompreni kial oni uzis tiom da blanko. Ĝi estas la malgaja koloro de funebro kaj morto. Infanojn oni nepre vestu per koloroj de ĝojo: skarlato kaj flavo kaj reĝa bluo! Niaj beboj estas skarlate vestitaj de kapo al piedo por montri la ĝojon pri ilia naskiĝo. Sed kun tiuj fremduloj nenio kongruas kun la naturo.

Unu el la surprizigaj aferoj, kiun mi malkovris, estis ke la fremdulino mem mamnutris sian infanon. Mi ne intencis mamnutri la mian. Tio ne estas la kutimo inter virinoj havantaj rangon aŭ riĉaĵon, ĉar sklavoj abundas por tiu tasko.

Reveninte hejmen mi rakontis ĉion al mia edzo. Je la fino mi diris:

“Ŝi eĉ mem mamnutris sian infanon. Do, ĉu ili estas tiel malriĉegaj?”

“Estas bone mamnutri la infanon”, diris mia edzo. “Ankaŭ vi mamnutros la vian.”

“Kion, mi?” mi respondis tre surprizite.

“Certe”, li respondis gravmiene.

“Sed tiam mi ne povos naski alian infanon dum du jaroj”, mi kontraŭis.

“Tio estas kiel devus esti”, diris mia edzo, “kvankam la kialo, kiun vi proponas estas sensencaĵo.”

Eble li pravas pri tio ankaŭ. Ĉiuokaze, mi notas ke pro tio ke pluraj infanoj en ĉiu familio sendube mortas, kaj aldone iuj estos knabinoj, mia domo ne estos tiel plena de filoj ol mi esperis. Ĉu vi miras, Fratinjo, ke mi neniam ĉesas pensi ke mia edzo estas stranga?

La venontan tagon mi iris al s-ino Liu por rakonti al ŝi pri mia vizito. Ho, mi deziras, ke la diino donos al mi filon kiel ŝiaj infanoj, rektan, ruĝvangan kaj brilokulan! Ili estis belaj kun ora haŭto, belegaj en siaj ruĝaj kaj floraj vestaĵoj.

“Vi gardis niajn malnovajn tradiciojn”, mi diris observante la infanojn kun elspiro de plezuro.

“Jes, nun rigardu!” ŝi respondis, kaj tiris al si la plej maljunan infanon. “Kio estas blanka estas ĉiam la interna subŝtofo, kiun mi povas forpreni kaj lavi. Lenu pri la avantaĝoj, kiujn ĝuas tiu fremda popolo, kaj malakceptu tion, kio ne taŭgas.

De ŝia domo mi iris al la ŝtofbutiko. Mi aĉetis ruĝan kaj rozan flordesegnan silkon de la plej mola kvalito, kaj nigran veluron por eta senmanika jako, kaj satenon por ĉapelo. Estis malfacile elekti, ĉar mi volis nur la plej bonon por mia filo. Mi postulis ke la posedanto malsuprenigu pli kaj pli el la silko, kiun li estis faldinta en malhelajn paperkovrilojn kaj metintaj sur bretaro, kiu atingis la plafonon. Li estis maljunulo kiu spiris malfacile, kaj li grumbliis kiam mi kriis:

“Montru al mi, aldone, pecon da silko kun broditaj persikfloroj!”

Mi aŭdis lin grumbli ion pri la vanteco de virinoj, kaj aŭdinte tion, mi diris:

“Tio ne estas por mi, sed por mia filo.”

Tiam li ridetis malrekte kaj montris al mi la plej dolĉan pecon el ĉiuj, la pecon kiun li ĝis nun retenis.

“Prenu ĝin”, li diris. “Mi flankenmetis ĝin por la edzino de la distrikta juĝisto, sed se ĝi estas por via filo, prenu ĝin. Ŝi ja estas nur virino.”

Tio estis precize la pecon kion mi serĉis. Inter la vivkoloraj stakoj da silko metitaj dise sur la vendotablo, ĉi tiu brilis profunde roze pro la katizo. Mi aĉetis ĝin sen disputi la prezon, kvankam mi scias, ke la ruza oldulo altigis ĝin pro mia avido. Mi portis ĝin hejmen en miaj brakoj. Mi diris:


“Ĉi-vespere mi tranĉos el ĉi tiu ŝtofo etan mantelon kaj pantalonon. Mi faros tion sola. Mi ĵaluzas se iu alia tuŝas ion rilate al mia infano.”

Ho, mi estis tiel feliĉa, ke mi povus kudri dum la tuta nokto por mia filo! Mi faris por li ŝuojn kun tigras vizaĝoj. Mi aĉetis por li arĝentan ĉeneton por lia plezuro.

Daŭrigota

Notoj: 1. Citiloj en la originalo, “foreign devil”. La ĉina esprimo 洋鬼子, pinjine – Yángguǐzi = fremda spirito. Ĝi kutime tradukiĝas en okcidentaj lingvoj kiel “eksterlanda diablo”.

2. Anhujo – Provinco en la orienta parto de Ĉinio PIV.



Ferenc Baranyi

Al vi donacus mi



Trad. *Erika Godó*

Al vi mi donus la marstelojn brilantajn,
herbkampajn florojn, buntajn, radiantajn.
Al vi mi donus la nokton malluman,
al vi la tagon kun lumo abunda.
Al vi la neĝon, falantan de vintro,
kaj perlo plej belan de l' mara profundo.
El miaj revoj la plej belan sonĝon,
al vi, sunradio, la tutan mondon.
Se mi famiĝus, poeto kun sorĉplumo,
por vi mi verkus la plej belan poemon.



Budapeŝto



John Huang

Blua Danub' en vesper' fluas,
Homoj sur ĉenpont' ĝuas.
Strauss-a valso la urbon sorĉas,
Budapeŝto nun ore feliĉas.

Parlament' majeste aperas,
Poet' en koro ĉiam esperas.
Kaloĉaj' versoj vals' alportas,
Poem' kaj lumo korde sonoras.

Ĉenoj kaj ŝipoj ŝvebas trankvile,
Melodio sonas tra ondoj mildaj.
Lenso kaptas belecon senfine,
Akvo fluanta kiel fadenoj silkaj.

Bastion' alte sur mont' staras,
Ni en vento sonĝe kantas.
Koroj kunfluas en unu voĉo,
Esperant' vivas — senfina vojo!



Ĉu eble mi estas poeto?

Aldo Palazzeschi



Ĉu eble mi estas poeto?

Ne, kompreneble.

Skribas nur unu vorton, tre strangan,

la plumo de mia animo:

"frenezo".

Ĉu mi do estas pentristo?

Ankaŭ ne.

Havas nur unu koloron

la paletro de mia animo:

"melankolio".

Muzikisto, do?

Eĉ ne tio.

Estas nur unu noto

en la klavaro de mia animo:

"nostalgio".

Do, kiu mi estas?

Mi metas lenson

antaŭ mian koron

por ke homoj ĝin vidu.

Kiu mi estas?

La akrobato de mia animo.



Trad. *Erika Godó*



Hipokratoj kaj hipokritoj

Sulejman Salihu (Albana poeto el Kosovo)




Tradukis:

Bardhyl Adem Selimi

Mi serĉadis unu Hipokraton
Kaj malrapide ekiris, ne hastante.
Tiom da fojoj vane mi ĉirkaŭvadis –
Mi trovis ne Hipokratojn, nur hipokritojn.

Sed mia serĉo tamen daŭrigis,
“Perdu mi do la noktojn kun la tagoj ĉiuj,” mi pensis.
Denove ne prosperis, kaj kiu ne kredis –
Ne ekzistas Hipokratoj, denove nur hipokritoj.

Iru kaj iru, mi diris: “Mi iros ĝis la fino,
De unu jaro poste en la alian jaron.”
Ĉie, kiom mi povis, skuis kaj serĉis –
Malmultajn Hipokratojn mi trovis, oceanon da hipokritoj.






Aŭtoro: [Maksim Bočkarev](#)

Jaga (6)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 003*



elrusigis [Sergei Isakov](#)

Koro de la Arbaro

Dume Baoana serĉis angulon en la arbaro kiu resonus en ŝia koro. Ŝi jam estis survoje de pluraj tagoj. Pasigis la nokton sub abioj kaj arbustoj. Kaj ŝajnis al ŝi, ke la branĉoj de la arboj pli forte kunpremiĝas super ŝi, kiam ŝi haltis por ripozi. Ĉiuokaze eĉ la nokta pluvo ne povis faligi sur ŝin eĉ guton.

Kaj ŝi daŭre iris kaj iris pli profunden en la arbaron. Kaj ju pli ŝi marŝis, des pli familiariĝis la lokoj. Ŝi ridetis ĉe la penso, ke ŝi pravis en siaj antaŭsentoj.

Kaj finfine, ŝi trovis tion, kion ŝi serĉis. La grandega maldensejo havis preskaŭ perfekte platan surfacon. Dekstre la maldensejo limis al grandega, bela lago, sur kies bordo rekte el la tero fluis gaja, sonora rojeto. La akvo en ĝi montriĝis la plej bongusta. Bajana staris meze de ĉi tiu grandega maldensejo, kaj ŝia koro ĝojis. Ŝi ne komprenis kial, sed interne estis sento, ke ŝi trovis sian veran hejmon. Kaj eĉ la penso pri disiĝo de sia patrino ne plu alportis tian doloron kiel antaŭe. Ŝi ekloĝis sur la bordo de la lago. Ŝi ekbruligis fajron kaj kantis kantojn de sia tribo ĝis malfrua nokto. Bajana eĉ ne povis imagi kiom da sekretaj aŭskultantoj estis ĉe ŝia nokta "prezento". Leŝij kaj Skor sidis ĉe la kontraŭa de la laga fino de la maldensejo. Vodjanoj, kiel kutime, kaŝis sin en la kanoj. Sed ili ne estis la solaj, kiuj aŭskultis la belajn kaj animajn kantojn de la nova loĝanto de la Koro de la Arbaro. Multaj loĝantoj, kaj arbaraj, kaj akvaj, aŭskultis tiujn kantojn kun malspiro. Bajana ankoraŭ devos konatiĝi kun ĉiuj ili. Kaj ĝuste per ilia malpeza mano kun la tempo la longa kromnomo "Filino de Jagg" estis mallongigita al la pli oportuna prononci "Jaga". Kaj kun la tempo, Jaga anstataŭigis la nomon de Bajana eĉ en ŝiaj propraj pensoj.

Matene, juna Jaga nur havis tempon por pensi pri kiel ŝi povus paroli kun Skor, kiam li aperis antaŭ ŝi. La okulo, pikita de la abeloj, resaniĝis, kaj Skor aspektis tute normala. Nu, tio estas se vi ne kalkulas lian kapuĉon.

"Aŭskultu Skor, kiel ni povas meti dometon en ĉi tiu maldensejo?" - demandis Juna Jaga, ruze ridetante.

Skor jam delonge estis preta por tiu ĉi konversacio. Li eĉ ricevis la permeson de sia estro pri kiuj arboj povus esti uzitaj en konstruado. Kontraŭvole, Leŝij preskaŭ persone elektis la arbojn, kiuj falos sub la hakilon de Skor kaj lia "brigado", do li simple respondis: "Kiel vi diras, sinjorino! Ni komencu hodiaŭ!"

Oni devas diri, ke la Koro de la Arbaro aŭdis la sonon de hakilo unuafoje tiun tagon. Ja la nekutima nova loĝantino estis duonhoma, kaj tial ŝi bezonis taŭgan loĝejon. Tial, la ŝtalo de la hakilo kantos pli ol unufoje en la sorĉitaj arbaroj, sed pro Jaga, Leŝij estis preta fari ion ajn.

Konstruado daŭris kelkajn tagojn. Skor implikis ĉiujn siajn subulojn, kaj la laboro ne ĉesis de tagiĝo ĝis krepusko. La hakiloj klakis, kaj la domo kreskis antaŭ niaj okuloj. Tio estis la unua hejmo de Jaga en la sorĉita arbaro. La tempo pasos, kaj en la maldensejo, kiun ŝi elektis, aperos bela turo kaj multe pli. Sed kiel mi ŝatas diri: pri tio poste...

Kaj dum juna Jaga ekloĝis en sian novan lokon, Skor devis multe labori kaj lerni multajn novajn aferojn. Kiel montriĝis, krom la domo estis bezonataj multaj aliaj aferoj: kuirejaj iloj, ia meblo, forno ktp., ktp.

Skor simple ne komprenis la celon de multaj objektoj. Ekzemple, la forno estis nur malsama rakonto. Kiel ĝi estas farita, kaj, ĝenerale, kial ĝi estas farita, Skor simple ne povis kompreni. Jaga klarigis kiel eble plej bone, sed ĝi estis malmulte utila. Kaj tiam ŝi elpensis ideon: Skor devus kaŝe ŝteliri en la hejmojn de homoj kaj vidi kiel kaj kio. Terurigi homojn estis ne sola lia petolo. Sed Jaga strikte malpermesis timigi iun ajn, kio nekutime ĉagrenis ŝian "kontraktanton".

Skor iris por skoldi kaj revenis du tagojn poste. Kiel atendite, li revenis ne kun malplenaj manoj. Antaŭ li, la noveinstruita "fornfaristo" portis nekredeble grandegan kuvon, el kiu amaso da aliaj objektoj elstaris kiel erinaco: balailo, ĵetilo, pot- kaj patforkoj, ŝpato kaj fajrostango. En la fundo de la kuvo estis trovitaj: potoj, gisvazoj, patoj, ŝoveliloj, bakplatoj kaj eĉ kaserolo. Krome, estas multaj aliaj aferoj, inkluzive de iloj por fari fornon.

Kiam Jaga demandis ĉu li ŝtelis ĉion? Skor, sen palpebrumi, respondis, ke li prenis ĉion el pluraj longe forlasitaj domoj. Jaga ekzamenis ĉion, kion Skor alportis kaj kredis al li. Ĉar la kuvo estis seka kaj, ŝajne, dum tre longa tempo, la metalaj produktoj havis justan tavolon da rusto, kiun neniuj dommastrino iam permesus.



Do, Skor, unuafoje en la multaj centoj da jaroj de sia ekzistado sur la Tero, prenis trulon. Li bezonis plurajn tagojn por krei la fornon. Li vidis, ke homoj metas mirindajn desegnaĵojn sur siajn fornojn kaj, decidante plaĉi al Jaga, li elpensis la ideon pentri sian unuan fornon ne pli malbona ol tiuj, kiujn li vidis. Li konfidis tion al la nedisigebla paro Smola kaj Speĥ, la pli junaj spiritoj de la arbaro. Ili traktis la taskon tre respondece kaj kreeme. Kaj dum la farboprocezo daŭris, eĉ Jaga kaj Skor ne estis permesitaj eniri la domon. La rezulto superis ĉiujn atendojn. La grandega forno montriĝis simple artaĵo. Nekonataj arabeskoj kaj birdoj ornamis la fornon ĉiuflanke. Kaj Speĥ kaj Smola, ŝmiritaj de la kapo ĝis la piedoj per farboj (kiujn ili mem faris), staris kaj ridetis kontente.

Jaga ne povis trovi vortojn por admiri kion ŝi vidis. Kaj ekde tiam, Smola kaj Speĥ fariĝis ŝiaj favoratoj.

Daŭrigota



Jarina Ĉornohuz

Poemoj de Jarina Ĉornohuz

Jarina Ĉornohuz



Elukrainigis *Petro Palivoda*

La poezio de nia epoko
estas mistero perdinta la rimon
perdinta la ritmon
scianta ke nur la sango rimas
kun ĉio
se iam vi tenis ĝin en la manoj
la poezio de nia epoko
estas nudigita senco el la baroka epoko
ruĝnigra laŭ koloro
kurbiĝita
en la formo de milita rondo

la tempo kiun ni travivis estas alia dimensio
kiel plenskribita per infanaj manoj
kajero en la ĉeleto

vi havas dudek du
ne jarojn
sed cirklojn sur spiralo
viaj okuloj ĉesis vidi sonĝojn el libroj
la miaj estas en la sango de la patrino
kiam en la profundo de la grundo forbrulas
per blua fuelo
la tero de la kupra epoko
mi iras al vi tra
pecegoj frakasitaj de glacimontoj
tiu kiu ankoraŭ ne naskiĝis
sed estos via

rekono

kiam mi demandis la ĉielon pri vi
demando estis malnova kaj simpla
ĉu ni restos kune? —
al mi aperis karto
kun kandelo en la nokta mallumo
se tio ne estus vi
mi eble estingiĝus
pro la signo de la preĝeja silento de morto,
kiun signas kandelo por ĉiuj soldatoj.
sed tio estis vi —
kaj mia koro varmiĝis
ĉar mi sciis ke tiu karto
estas la sola kandelo kiu lumigas
vian domon en la montoj
la domon inter la montoj
kien kondukas vojo tra step' kaj marbordoj,
tra minejoj kaj grenadfuneloj
sola kandelo ĉe la fenestro de via domo
atendas nin reveni de la milito,
en la domo inter la montoj,
kandelo signifas hejmon de ĉiuj loĝejoj
finfine
mi rekonis vin inter milionoj da homoj





Pastro *Jan Twardowski*

Kaptito de Amo



Tradukis: *Ryszarda Kwiatkowska*

Vi vivas por ni,
ho Jesuo, sur la altaro.
En la plej profunda kaŝita humileco,
Ju pli Vi kaŝas Vian majeston pro amo.
des pli ni amas Vin, ho Dio!

Kion Vi faras, Jesuo, meze de la noktaj ombroj,
kiam neniuj vizitas Vin?
Kiam nur la flamo de la eterna lampo,
malforta brilo, dispelas la mallumon?

Ĥoroj da anĝeloj honoras Vin,
rigardante Vin en raviĝo.
Feliĉaj estas ili havi Vian gardon.
Ĉiela kaj vivanta Kristo!



Hajkaro

POEZIO



Ivanička Maĝarova

Senstela ĉiel'.

Nur la luno sekrete
flirtas Venuson.

Neĝa blovado.
En la arbara pado
du paŝoj sur neĝ'.

Neĝ'. Bluso. Kamen'.
Virino sur la vojo.
Silent' eksonas.

Maneĝ'. Ĉevalkur'.
Ŝi balancas. Pli blanka
ol pala nuanc'.

Vespera malĝojo'.
Memoro el pasintec'
varmigas koron.



AŬTUNO

La tapiŝo bruetanta
de l' aŭtuno
formita de la falintaj folioj
steloformaj malpezaj
el karton' flava kaj bruna
anhelas, murmuras
susuras
flustras ion
sub la paŝoj melankoliaj
de miaj lantaj piedoj.
Kaj la friska vento
de temp' al tempo
levas la foliojn
kiuj dancas, saltas
turniĝas
kaj sekvas min.
La blovoj malvarmetaj
sonantaj
kantas tristan muzikon
kaj ludas la kordojn
de mia melankolio
kiu vekiĝis karesata
de la frua eknoktiĝo
kaj nombras la stelojn
ĵus aperintajn.
La steloj subaj
komencas malheliĝi
dum la steloj superaj
provas relumigi
la koron
por la proksima nokto
kaj revarmigi ĝin
per siaj punktaj fajretoj.
Estas nia tasko
kapabli ilin sonĝi.



Tiberio Madonna



Aŭtuno Verda

Sur la aleoj
tegitaj per tapiŝo
farita el foliaro
friska blovo aŭtuna
reportas mian menson
al la nuntempo
al la koloroj de l' hodiaŭo
deturnante min de la pensoj
pasantaj
de la koloroj de l' hieraŭo:
ruĝo, flavo, hela bluo...
ĉi-somere la brilaj koloroj
sur papilioj, sur floroj,
sur folioj zorge farbitaj
per bela verd' intensa
gajigis la paŝojn
sur ĉi samaj aleoj
invitante nin danci;
la lingvo de l' naturo
kiu invitas ami
estas lingvo universala
ia "Esperanto flaŭra"
kiun ĉiuj komprenas
ĉiuj popoloj
de l' mondo;
kaj la folioj de l' platanoj
kiuj susuris ĉe la brizo
verdaj kaj steloformaj
kun siaj kvin pintoj
vere memorigas al mi
ja multe
la stelon de Esperanto



Tiberio Madonna



la stelon verdan
 kiu unuigas
 ĉiujn popolojn
 de l' mondo.
 Ĉiuj tiuj steloj
 kiuj nin rigardis
 ĉi-somere
 de la platanaj branĉoj
 montris gajaj en la sunlumo
 sian intensan koloron
 sian intensan verdon.
 Nun
 en aŭtuno
 bruniĝintaj la folioj
 estas ĉiuj jam falintaj
 kaj kraketas sub la paŝoj
 kiuj komencas tristiĝi
 lantiĝi
 mediti...
 jen la diferenco
 inter la platanaj folioj
 kaj la stelo de Esperanto:
 dum tiuj estas jam brunaj,
 pale flavaj, ruĝetaj
 kaj falintaj sur la ŝtonojn
 donante rendevuon
 por la venonta printempo,
 la stelo de Esperanto
 ĉiam verdas, ĉiam vivas,
 montras sian koloron neŝanĝita
 sian verdon originan
 vivan kaj brilan
 kiu refarbas la tristecon
 ĉiam varmigas nian koron
 kaj diras nian ĝojon
 per la sama vorto «ĝojo»
 al ĉiuj popoloj de l' mondo,
 disvastigante ĝin libere;
 kaj tiel, per Esperanto,
 nia aŭtuno ja estas
 ankoraŭ
 verda.





Verkis *Lusín*

Neĝo



Elĉinigiŝ *Laoyuan*

La pluvo en la varmaj regionoj neniam transformiĝis en la malvarmajn, malmolajn, brilantajn neĝflokojn. La kleruloj trovas tion monotona, sed ĉu la pluvo mem konsideras sin malfeliĉa? Tamen, la neĝo en la sudo estas ekstreme bela kaj humida; ĝi estas kvazaŭ mesaĝo de kaŝita juneco, aŭ la haŭto de tre vigla kaj fortika virgulo. En la neĝa kamparo kreskas sangoruĝaj kamelioj, blankaj unupetalaj umefloroj kun kaŝita verdecna nuanco, kaj malhele flavaj vintraj umefloroj kun sonoril-formaj burĝonoj; sub la neĝo kaŝiĝas pale verdaj fiherboj. Certe ne estas papilioj; mi ne memoras precize, ĉu abeloj venis por kolekti nektaron el la kamelioj kaj umefloroj. Tamen ŝajnas, ke antaŭ miaj okuloj vidiĝas vintraj floroj florantaj en la neĝkampoj, kie aroj da abeloj flugas tien kaj reen, kaj aŭdiĝas ilia zumado.

La infanoj, blovetante al siaj frostruĝetaj manetoj similaj al violkoloraj zingibridoj, kune komencis modli neĝfiguron. Ĉar la provo ne tute sukcesis, ies patro venis helpi. La neĝfiguro elfarita multe pli altas ol la infanoj. Kvankam ĝi estis simple neĝamaso kun malgranda supro kaj larĝa bazo, kaj fine ne eblis distingi ĉu ĝi estas kukurbo aŭ neĝfiguro, tamen la figuro, kiu tutkorpe trembrilis, estis tre blanka, belbrila, gluiĝinta per sia humideco. La infanoj faris al ĝi la okulojn per longankernoj, kaj ŝmiris al ĝi la lipojn per la ruĝiga ŝminko ŝtelinta el la pudrujo de ies patrino. Tiel elmontriĝis granda neĝfiguro, kiu sidis tie en la neĝkampoj, kun okuloj brilantaj kaj lipoj ruĝfrostiĝantaj.

La sekvan tagon, pliaj infanoj venis viziti la neĝfiguron. Ili aplaŭdis, kapjesis, ridis kaj ludis antaŭ la figuro, sed fine tiu restis sola sidanta. Ĝia surfaco ekdegelis en la serenaj tagoj, sed en la malvarmaj noktoj glacia tavolo denove kovris ĝin, transformante ĝin en opakan kristalon. Kaj sinsekvaj sunaj tagoj fine igis lin io nedifinebla, dum la ruĝiga ŝminko sur ĝiaj lipoj tute forviŝiĝis.



Tamen, la neĝflokoj en la nordo post sia flirtado ĉiam restas kiel pulvoro aŭ kiel sablo. Ili, anstataŭ intergluiĝi, disŝutiĝas ĉie sur tegmentojn, sur la teron, sur sekajn herbojn, kaj simple tielas. La neĝo sur la tegmentoj jam delonge degelis, dank' al la varmo de la fajro el la loĝejoj. En la aliaj lokoj, sub la serena ĉielo, kiam subita ciklono atakas, la neĝo vigle flirtas, brilante en sunlumo, kvazaŭ densa nebulo enhavanta flamojn. La neĝo turniĝas kaj leviĝas, plenigante la tutan ĉielon kaj kirlante la spacon, kie sekve brilas leviĝanta lumo.

Sur la senlima kamparo, sub la tranĉe frosta firmamento, brile turniĝas kaj leviĝas la esenco de la pluvo...

Jes, tio estas la soleca neĝo, la mortinta pluvo, la esenco de la pluvo. ■

La 18an de januaro 1925.



HORI Jasuo

Libelo

En la eksa minurbo Aŝio,
La libelo sidas ĉe mia fingro
Kontraŭ la aŭtunanta nubaro
Ju pli profundigās aŭtuno,
Des pli ruĝas via vosto.
Vi mezuras aŭtunon per via vosto,
Kara libelo!



Mateno, kiu komenciĝas kun papiliono

アゲハと共に始まる朝

El eta ovo kun diametro malpli ol unu milimetro, eta nigra larvo eloviĝas, ŝanĝiĝas en verdan larvon, ŝanĝiĝas en krizalidon, kaj el la krizalido longanta ĉirkaŭ 3 centimetrojn, naskiĝas bela papiliono. En la eta krizalido, kaŝitaj grandaj flugiloj, eĉ kun granda ventro. Kaj ĝi sekiĝas kaj fortigas la flugilojn, jen al la ĉielo.

Daŭras ĉirkaŭ du semajnoj por ke la ovo fariĝu papilio. Dum ĉi tiu tempo, ĝi manĝas nur ĉirkaŭ dek mandarinajn foliojn. Ĉu en ili estas "nutraĵo", kiu kaŭzas tian transformon? De krizalido ĝis papiliĝo, Ĝi simple atendas sen manĝado. Ĉu tempo estas nutraĵo por matureco? Tio estas vere mistera.



Jasuo Hori

直径1ミリもない小さな卵から小さな黒い虫が生まれ、脱皮して緑色の幼虫になり、脱皮してさなぎになり、3センチもないさなぎから、きれいなアゲハチョウが生まれる。小さなさなぎの中に畳みこまれた大きな羽、それにお腹だってこんなに大きい。そして羽を乾かし強くして、さあ、大空へ。

卵からチョウチョになるまで2週間ほどだ。この間食べているのは、みかんの葉っぱ10枚ほど。どこにそんな変化を生む「栄養」が含まれているのか。さなぎからチョウになるまでは何も食べずに待っているだけ。時間が栄養になり成熟を生むのか。本当に不思議だ。



Matene, en mia ĉambro
mi trovas papilion flugantan.
Venu sur mian manon!
Kaj ĝi venas al miaj fingroj,
kaj fermas kaj malfermas flugilojn.
Mi faros foton, mi diras,
Mi fotas ĝin proksime.
Kio aperas en la fotoj,
tio estas alia mistera mondo.

Nigraj okuloj, spirala buŝo,
ses maldikaj kruroj,
delikataj koloroj ornamas la silkaĵsimilajn
flugilojn.
Ĉu vi estas preta ekvojaĝi?
Ĝi signalas per svingoj de la flugiloj,
Jen, vi forflugu en la vastan mondon!
Mi milde igas la papilion flugi en la ĉielon.
Flugu al la blua ĉielo!

Mia nova, esperplena mateno komenciĝas,
kun la novnaskita papiliono.

ある朝、部屋の中を
ひらひらとアゲハが舞っている。
ほら、手に止まりなさい。
そういうとアゲハは私の指に止まり、
ゆっくりと羽根を開閉する。
写真を撮るからね、
私は接写用に設定し、撮る。
そこに現れたのは、
また不可思議な世界だ。

黒い瞳、巻き込まれた口吻、
繊細な6本の足、
織物のような羽を彩る
微妙な色合い。
旅立ちの準備は出来たかい？
アゲハは羽を動かし合図する。
ほら、広い世界に飛んで行くんだよ！
私はそっとチョウを空へはばたかせる。
青い空へ、さあ！

私の、新しい、希望に満ちた朝も始まる、
生まれたアゲハチョウとともに。

Unu arto

Ne malfacilas mastri la arton perdi;
tiom da aferoj ŝajnas plenplenaj de la intenco
voli perdi, ke ilia perdo estas sen katastrofo.

Perdu ion ĉiutage. Akceptu la konfuzon
de perditaj ŝlosiloj, de horo malbone pasigita.
Ne malfacilas mastri la arton perdi.

Poste ekzercu perdadon pli fore, pli rapide:
lokojn, kaj nomojn, kaj kien vi intencis
vojaĝi. Neniom el ili kaŭzos katastrofon.


Mi perdis heredaron. Kaj rigardu! Mia lasta,
aŭ antaŭlasta, de tri amataj domoj malaperis.
Ne malfacilas mastri la arton perdi.

Mi perdis du urbojn, belajn. Kaj, pli vaste,
iujn regnojn kiujn mi posedis, du riverojn, kontinenton.
Mi sentas ilian mankon, sed tio ne estis katastrofo.

— Eĉ perdante vin (la serĉatan voĉon, geston kiun
mi amas), mi ne estos mensoginta. Estas evidente ke
ne tro malfacilas mastri la arton perdi.
Kvankam eble aspektas (skribu ĝin!) kiel katastrofo.



de *Elizabeth Bishop*



Trad. *anonima*



Sonja, êu ghi havas titolon?

S. Lang



Mi vidis ... aperi el la tero. 🤝

mi lukin e seme kama tan ma. 🤝

BELSONO EL LA ĈIELO

Al Wolfgang Amadeus Mozart

Jam multfoje via bela muziko
akompanas min dum mia longa serĉo.
Mia koro dronas en senfinaj melodioj
ordonantaj paŝojn de tempo-vojaĝo.

Ĉiufoje kiam mi aŭskultas vian belan muzikon,
mia koro plenas je fluo de paco
venanta el la vasta ĉielo,
vere tio similas voĉon de anĝelgrupo.

Kvazaŭ vi ĉiam invitus min por ekpaŝi
atingi la centron de ĉi tiu belsono,
sin kaŝanta en malproksima loko gardata
kaj via muziko fluas ĝis ĝia interno.

Via nomo, via voĉo transiras landlimojn
kaj plenigas la korojn de ĉiu generacio
samkiel gepraava historio konservata
por la generacioj loĝantaj surtere.

Tiu ĉi belsono venas el la Eternulo
kaj fluas tra la beleco de via muziko.
Mia koro fluas en la aŭskult-ĝojo
kaj gloras mi la Reĝon de ĉielo.

Jogjakarto, oktobre 2012



Yohanes Manhitu



Noto: La originala poemo ("HANAF ALUMAT NÂKO NENO-TUNAN") estis verkita en la davana (davane: *Uab Metô*; tetume: *lia-dawan, lia-baikenu*; indonezie: *bahasa Dawan*; angle: *the Dawan language*), la timora lingvo kun la plej granda nombro da denaskaj parolantoj kaj ankaŭ la plej vaste parolata enlanda lingvo en Okcidenta Timoro. Ĝi estas uzata plejmulte de la *Atoni Pah Metô* (laŭlitera "Homoj de la Seka Lando") en la distrikto kaj la provinca ĉefurbo Kupang, la distrikto *Timor Tengah Selatan* (Suda Centra Timoro), la distrikto *Timor Tengah Utara* (Norda Centra Timoro) kaj kelkaj partoj de la distrikto Malaka, kaj ankaŭ estas uzata kiel nacia lingvo en Oekusi-Ambeno, distrikto de la *Demokrata Respubliko de Orienta Timoro* (tetume: *Repúblika Demokrátika Timór-Leste*; portugale: *República Democrática de Timor-Leste*).

Intervjuo-demandoj kaj respondoj por la revuo Literatura Vivo _kun Yohanes Manhitu

Erika Godó



Yohanes Manhitu

Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Mi amas legadon ekde mia infanaĝo en la interno de Timoro. Unu el la literaturaj verkoj, kiujn mi legis kun tiom da scivolemo, estis *Di Sudut-Sudut Balkan*, la indonezia traduko de la fama romano *In den Schluchten des Balkan* de Karl May. Tiutempe, mi ankaŭ lernis pri *pantun* (pantuno), tradicia poemformo originanta el Indonezio, Malajzio kaj pluraj regionoj en Sudorienta Azio. Jarojn poste, dum mi studis la anglan lingvon en la Fakultato de Instruista Trejnado kaj Edukscienco (indonezie: *Fakultas Keguruan dan Ilmu Pendidikan*) ĉe la Universitato Nusa Cendana (Undana) en Kupang, Okcidenta Timoro, Indonezio, mi studis ankaŭ la anglan literaturon kiel preparon por iĝi anglalingva instruisto. Tamen, estis la tradukado de la hispanlingva poemo "La Puerta" en la indonezian lingvon (titolita "Pintu", farita en Jogjakarto la 9an de junio 2002), kiu instigis min tiel interesiĝi pri literaturo kaj komenci verki miajn proprajn poemojn.

Ĉi tiu hispanlingva poemo estis verkita de Alfredo García Valdez (1964–2022), meksika poeto, eseisto, ĵurnalisto, kaj aŭtoro de kolekto de eseoj titolita *Máscaras*. La tradukado de la poemo "La Puerta" – publikigita en la revuo *Biblioteca de México* (N-ro 40, julio-aŭgusto 1997, p. 18) – en la indonezian lingvon kondukis min en la mondon de poezia verkado kaj tradukado. Tial, persone, mi ŝuldas dankon al la hispana lingvo kaj literaturo, precipe al la poeto Alfredo García Valdez, kiu malfermis por mi belan pordon al la oceano de poezio. Tiam mi pensis, se ĉi tiu Alfredo povus verki tian bonan poemon pri pordo, mi povus verki pri fenestro kaj tiel plu. Do, mi kuraĝigis min realigi tion. Rezulte, malrapide sed certe, mi verkis kelkajn poemarojn, kies informoj haveblas en mia verkbloga (vidu <http://ymanitu-works.blogspot.com>).

Kiam vi tradukis vian unuan poemon?

Mi tradukis la unuan poemon la 9an de junio 2002. Ĝi estis la hispanlingva poemo "La Puerta" de Alfredo García Valdez, kiun mi tradukis en la indonezian sub la titolo "Pintu", kiel menciite en mia antaŭa respondo (numero 1).

Kio instigas vin en via laboro kiel tradukisto?

Post la referendumo pri Orienta Timoro en 1999, mi laboris unu jaron kiel tradukisto kaj interpretistopri la indonezia (indonezie: *bahasa Indonesia*), la angla, la tetuma (indonezie: *bahasa Tetun*) kaj la davana (indonezie: *bahasa Dawan*) ĉe la oficejo de la misio de la Alta Komisiito de Unuiĝintaj Nacioj pri Rifuĝintoj (angla mallongigo: UNHCR) en Kupang, Okcidenta Timoro, Indonezio. Do, mia profesio kiel tradukisto kaj interpretisto nun estas daŭrigo de tio, kion mi faris antaŭ multaj jaroj.

Kiom da lingvoj vi parolas, kaj kiel vi lernis ilin?

Krom mia gepatra lingvo, la davana (la plej granda timora lingvo laŭ la nombro da denaskaj parolantoj), mi ankaŭ parolas la indonezian, la tetuman, la kupang-malajan (indonezie: *bahasa Melayu Kupang*), la anglan, la francan, la hispanan, la portugalan, Esperanton, la javanan (indonezie: *bahasa Jawa*), kaj iomete la italan. Mi studis la indonezian kaj la anglan, kaj formale kaj neformale. Mi lernis la francan ĉe la Franca Kultura Centro (IFI/LIP) en Jogjakarto kaj ankaŭ memstare. Mi lernis la hispanan ĉe kurso en Jogjakarto, kaj poste ankaŭ memstare. Specife por Esperanto, mi antaŭe provis preni kelkajn lecionojn en senpaga reta kurso de Esperanto, sed mi ne finis ĝin ĉar mi pensis, ke estus pli bone lerni memstare uzante lernomaterialojn haveblajn rete. Mi lernis la aliajn lingvojn, jam menciitajn supre, tute memstare. Krome, mi memstare lernas la latinan, la germanan, la nederlandan kaj la svahilan. Kvankam ne ĉiutage, mi daŭre lernas ilin.

Kiuj lingvoj estas viaj plej ŝatataj kaj kial?

Fakte, mi amas ĉiun lingvon, kiun mi lernis, lernas aŭ lernos. Ĉiu ludas unikan rolon. Mi uzas la indonezian ĉar ĝi estas la nacia kaj oficiala lingvo de mia lando. Mi parolas la davanan kaj la tetuman ĉar mi estas timorano (indonezie: *orang Timor*). Ĉi tiuj estas la du plej grandaj timoraj lingvoj. Mi parolas la kupang-malajan ĉar tio estis la lingvo, kiun mi uzis neformale dum mi loĝis en Kupang, la ĉefurbo de la provinco Orienta Nusa Tenggara, Indonezio. Mi parolas kaj daŭre lernas la javanan ĉar ĝi estas la ĉiutaga lingvo en la loko kie mi loĝas. Mi uzas la anglan, la francan, la hispanan, la portugalan kaj la italan ĉar ĉi tiuj lingvoj gravas en certaj aspektoj de la vivo. Mi daŭre uzas Esperanton kun plezuro ĉar ĝi estas la plej sukcesa planlingvo iam ajn.

Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?

Por mi, la plej grava afero en la vivo estas vivi feliĉe estante utila homo. Mi ĝojas, ke esti aktiva en la kampoj de lingvo kaj literaturo ja igas min feliĉa kaj utila homo.

Ĉu vi partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premion iam?

Jes. Mi partoprenis kaj gajnis tri konkursojn pri franca poezio kadre de *Le Printemps des Poètes* ĉe la Franca Kultura Centro (IFI/LIP) de Jogjakarto (2003–2005) kaj en la sama konkurso ĉe la Fakoj de Franca Literaturo (indonezie: *Jurusan Sastra Prancis*) de la Universitato Gadjah Mada (UGM) en Jogjakarto kadre de *Les Beaux Jours* (junie 2004). La gajnintaj poemoj de la francaj poezikonkursoj legeblas en *A Walk at Night | Une promenade de nuit*—antologio de originalaj anglaj kaj francaj poemoj (Antverpeno: Eldonejo Libera, decembre 2017; vidu <https://www.lulu.com/shop/yohanes-manhitu/a-walk-at-night/paperback/product-23448701.html>).

Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?

Mi ne havas iujn ajn grandiozajn planojn, krom daŭre verki kaj traduki laŭ la voko de mia animo, kun la espero, ke ĉiuj miaj verkoj utilis al la plej vasta ebla legantaro, kaj en Indonezio kaj eksterlande.

Kion vi volus diri al legantoj de Literatura Vivo?

Mi volus esprimi miajn plej varmajn salutojn el la urbeto Ungaran, Centra Javo, Indonezio, esperante, ke legantoj de ĉi tiu bonega literatura revuo daŭre esploros kaj celebros la belecon de lingvo kaj literaturo, kaj aktive kreos literaturajn verkojn, ĉu en siaj gepatraj lingvoj, naciaj lingvoj, aŭ internaciaj lingvoj kiel Esperanto. Vivu lingvo kaj literaturo!

Kuraĝe Trapasu la Yan-yu-Strandon

— El ĉefaĵoj el la simfonia ĉefaĵo “La Fluaĵaj Kantoj de Sichuan”

Teksto: *He Weijia*

Muziko: *Yuan Qi*

Koruso (kun ritma ĉiuro):

Jo-o jo-o jo-o je-ro, jo-o jo!
Jo-o jo-o jo-o je-ro, jo-o jo!
Fortiĝu! Fortiĝu! Fortiĝu!
He-zuh! He-zuh! He-zuh! He-zuh!



Traduko: *Batalanto*

1. Verso:

Venas ondoj kvazaŭ montoj falantaj,
Ventofurio rompas maston kaj remilon.
Fortiĝu! Fortiĝu! Fortiĝu! He-zuh!
He-zuh! He-zuh!
Yan-yu-strando — pordo de infero,
Sed ni trapasos tra rompitaĵoj ondoj!

2. Verso:

Rifoj videblaj kaj nevideblaj ŝpinas reton,
he-zuh!
Subakvaj fluoj kiuj ĉirkaŭiras
plenas la riveron, he-zuh! He-zuh!
He-zuh! He-zuh!
Kioman jam frakasis tiu strando? he-zuh!
Miljare da ploroj da animoj senkoraj, he-zuh!

3. Verso (komandoj interŝovitaj kun voko):

Akvo tre rapida — jo-o jo-o!
Ondoj tro altaj — jo-o jo-o!
“Rektigu vin!” (ĝis antaŭen!)
Subfluo venas — jo-o!
“Batalu!” (levu koron!)
Kirlo sin montras — jo-o!
“Faru flankon!” (evitu danĝeron!)
“Leviĝu!” (ne timu morton!) — jo-o!

Finala Ĉoruso:

Jo-o jo-o jo-o jo-o!
Nian vivon ni ŝpinas en unu ŝnuron,
Jo-o jo-o jo-o jo-o!
Fikse ligante la Reĝon de Akvo,
neniam losiĝonte, Jo-o jo-o jo-o jo-o!
Tra tranĉita vento, tra disŝiritaj ondoj,
Trapasos nia ĉevalo el ligno!
Nia kanto faligos la palacon de la Drako-Reĝo!
(Nova ripeto, pli forte)
Nian vivon ni ŝpinas en unu ŝnuron,
Fikse ligante la Reĝon de Akvo,
neniam losiĝonte,
Tra tranĉita vento, tra disŝiritaj ondoj,
Trapasos nia ĉevalo el ligno!
Nia kanto faligos la palacon de la Drako-Reĝo!
He-zuh! He-zuh! He-zuh! He-zuh! He-zuh!
Jo-ro je-ro jo-ro... o-ho.....



Riza Reva Mirlando



Aŭtoro: *Liu Wei jie*

稻梦绮境



Traduko: *Batalanto*

Enkonduko: Vokoj de la Tempo

En sunplena semajnfino, kiam la lumo ŝajnis laviĝinta per pura akvo, S-ino Li Minlan — fervora membro de la Verda Stela Esperanto-Klubo en Liaoning — invitis min kaj pli ol dudek E-lernantojn al Riza Reva Mirlando en la norda antaŭurbo de Ŝenjango. Tie, inter senfinaj rizkampoj, ni serĉis la revan angulon kaŝitan en la homa mondo.

S-ino Li pasigis sian junecan vivon en la Xibe-urbeto Xinglongtai; ĉi tiu tero por ŝi estas fonto de nedisigebla amo. En ŝiaj okuloj brilis la varmaj memoroj pri pasintaj tagoj.

La Arto de la Rizo: Pentraĵoj sur Kamparo

En Riza Reva Mirlando, tempo fluas kviete. La rizkampoj etendiĝas kiel smeralda maro, kie la vento susuras melodion al la ondantaj spikoj, kvazaŭ la naturo flustras historiojn al la orelo.

Ni paŝis laŭ vojetoj, spirante la teran aromon kaj kaptante belecon per fotoj. Sed la vero kuŝas pli profunde: grandaj pentraĵoj faritaj el rizo fariĝis vivantaj kronikoj.

De la 27-metra rigardejo, ni admiris:

- Norde: Giganta peonio floranta kiel pentraĵo el klasika Ĉina arto, simbolante riĉecon;
- Sude: Du pigoj sur branĉo sub la signo "Ĝojo" (囍), rakontantaj fidelan amon;
- Oriente: Knabino flaranta bolantan rizon apud fajrujo, kun la vortoj: "Laodoro de infaneco nomiĝas Riza Revo";
- Okcidente: Arĝentahara paro sur elektra biciklo, kun devizo: "En Riza Reva Mirlando, ni por ĉiam restas junuloj".

La pentraĵoj sub la vento ekviviĝis — koloroj kaj formoj transportis nin tra tempo, montrante la riveron de historio.

Historio en la Rizo: La Mitologio de Xibe

En la Xibe-regiono kuŝas legendo: Ŝamano preĝis al la ĉielo por protekti sian popolon.

Tiam, miloj da signoj falis kiel spiritoj sur la kampojn.

La rizo ricevis drakan esencon, kaj post militoj kaj pacaj jaroj, naskiĝis la unikaj rizpentraĵoj — senvorta sed vivanta historilibro.

Kreiva Agrikulturo: Kiam Naturo kaj Homo Kunlaboras

Fondita en 2010 kun investo de 150 milionoj da juanoj, la parko ampleksas 30,000 muojn (ĉ. 2,000 hektaroj). Ĝi integras:

- Modernan agrikulturon,
- Kulturon de Xibe,
- Rizkultivadon, kaj
- Turismon.

Spirita Vojaĝo: Esperanto kaj la Rizo

Por ni, esperantistoj, ĉi tiu estis pli ol ekskurso — ĝi estis spirita renkonto.

Ni kolektis fruktojn de *Malus asiatica Nakai* (Nai-arbeto), simbolantaj saĝecon, kaj kantis en la ombro. La rizkampo iĝis kantoro de la kampara animo, kie la spirito de la Esperanto-movado kuniĝis kun la eterna ligo inter homo kaj naturo.

Novaj amikiĝoj kaj ligoj floris, kiel spikoj en aŭtuno.



Sunsubiro kaj Memoro

Kiam la vespera suno karesis la verdan maron, la poeto Li Jianhua recitis:

"Belete pendas vin berplena,

Ĉarme maturas ĉarbele;

Dolĉe sonas kanto plena,

Varme brilas la feliĉe."

La poemo resonis en niaj koroj, fuziante la rizan revon kun la lingvo de D-ro Zamenhof.

Fina Reflektado: Daŭranta Riza Revo

Forirante, ni portis ne nur fotojn, sed spiritan revolucion. En ĉiu spiko kuŝis la eĥo de kompreno, amikeco kaj komuna lernado.

"La rizo parolis, kaj Esperanto vivis" — en tiu dialogo, ni trovis la plej belan version de ni mem.

Humura Dialogo

Ebriulo

Fortego

Ŝjangŝeng-o (相声) estas unu el la specoj ŝatataj de ĉinoj. Mi esperantigas ĝin humura dialogo. Ĝi iom similas al skeĉo. Do mi verkis la.



A: Ĉu vi drinkas ofte?

B: Jes.

A: Kiom vi drinkas unufoje?

B: Ne multe, nur cent gramojn.

A: Drinku mil gramojn.

B: Por kio mi drinkas tiom multe?

A: Je mia konto.

B: Je via konto, mi ankaŭ ne drinkas. Mi ebrios.

A: Bone!

B: Ĉu estas bone, ke mi ebrios?

A: Jes, tre plaĉas al mi spekti ebriulon.

B: Ĉu tio decas?

A: Mi ŝercas kun vi.

Mi havas najbaron, kiu tre ŝatas drinki, ĉiujespere li revenas hejmen ebrie. Lia edzino ofte batas lin, kiam li ebrie revenas. Iun vesperon li denove ebriis kaj revenis hejmen kun duonbotelo da alkoholaĵo en postpoŝo de la pantalono.

B: duonbotelo da alkoholaĵo en postpoŝo de la pantalono?

A: Jes, li timis, ke la edzino batos lin. Li loĝis en la dua etaĝo. Alveninte la pordon li aŭskultis, ĉu la edzino endormiĝis aŭ ne. Se ŝi endormiĝus, ŝi ne batus lin.

B: Kiel do?

A: Estis kviete. li trankviliĝis, li iris sur piedpintoj, subite la piedo glitis kaj li falis laŭ la ŝtuparo malsupren.

B: Ho ve! Ĉu li vundiĝis?

A: Korpo ne vundiĝis, sed la botelo rompiĝis, vundiĝis la postaĵo.

B: Kiom danĝere!

A: Li ne kuraĝis ĝemi. Senbrue eniris en la hejmon. Li prenis plastron kaj antaŭ la spegulo de la ŝranko li algluis la vundon de la postaĵo kaj enlitiĝis.

B: Ĉio pasis, ne estis batita.

A: Sed sekvantmatene, li ankoraŭ ne ellitiĝis, lia edzino jam batis lin. Li ekkriis: "Mi ne drinkis, mi ne drinkis." lia edzino diris: "Vi ne drinkis, kiu algluis la plastron sur la spegulon de la ŝranko?"

B: Kio estas la kialo?

A: Hieraŭ vespere li antaŭ la spegulo algluis la plastron sur la postaĵon, li vidis, ke en spegulo estas la postaĵo, li algluis la plastron sur ĝin.

B: Haj!

A: lufoge, mi renkontiĝis kun du ebruloj. Fakte ebrulo neniam konfesas, ke li ebrias. Unu diris al la alia (imite al ebrulo): “Vi estas nenio... malpli ol mi. Glaseton da vino vi drinkos kaj ebrios! Kaj mi ne, botelon da... ne ebrios.” La alia diris: (imite al ebrulo) “Vi ne ebrias, parolante via lango jam mallongiĝas.”

B: Ankaŭ lia lango ne bone funkcias.



A: (imite al ebrulo) “Vi ne ebrias? Venu, ĉu vi povas fari tion?” Tion dirinte li elpoŝigis poŝlampon, kaj ŝaltis la lampon, aperis lumkolono. (imite al ebrulo) “Vi ne ebrias? Grimpu laŭ la kolono supren.”

B: Ĉu tio estas kolono?

A: La alia rigardis kaj ridis (imite al ebrulo): “Ne trompu min, mi kompre...enas. Mi grimpu supren, mi grimpus duone, se vi malŝaltus la lampon, kaj mi falus malsupren.”

Arkpafisto Houyi kaj la Dek Sunoj

Arbsemo



En antikvaj tempoj, estis dek sunoj en la ĉielo. Laŭ legendo, la suno estas la enkarniĝo de la trikrura ora korvo. Komence, ili laboris laŭvice, ĉiutage unu suno laboris dum la aliaj naŭ ripozis, tiel ke la homaro ĝuis regulajn tagojn kaj noktojn.

Sed iun tagon, la dek sunoj trovis la ĉiutagan viclaboron tro enuiga, do ili interkonsiliĝis: "Ni ĉiuj kune iru al la ĉielo por amuziĝi!" Kaj tiel, ili samtempe saltis supren al la ĉielo.

Tio kaŭzis teruran katastrofon! La dek sunoj brilis kiel dek fajraj globoj, samtempe varmegigante la teron. Riveroj rapide sekegiĝis, kulturplantoj velkis, arbaroj ekbrulis, kaj eĉ ŝtonoj fariĝis brulantaj. La homoj suferis pro la troa varmego; multaj mortis pro soifo kaj varmego, kaj la postvivantoj devis kaŝi sin en kavernoj, ĝemante pro doloro.

Kiam la Ĉiela Imperiestro vidis la suferon de la homaro, li sendis la magian arkpafiston Houyi por savi la homaron. Houyi estis legenda pafisto, kiu neniam maltrafis. Li venis al la homa mondo kaj, vidante la suferon de la homoj, li tre malĝojis.



Houyi grimpis sur altan monton, streĉis sian magian arkon, pretigis sagon kaj celis la sunojn. Li unue pafis unu sunon, kaj la homoj tuj sentis iom da malvarmeto. Houyi daŭrigis kun kuraĝo, pafante unu sunon post alia. Kiam li pafis la naŭan sunon, la lasta suno ektimis kaj ploregis: "Ho, heroo, bonvolu ne pafi min! Mi promesas esti obeema—mi ĉiutage leviĝos kaj subiros laŭ la horaro, por doni lumon kaj varmon al la homoj."

Houyi pripensis kaj komprenis, ke la homaro ja bezonas unu sunon, do li indulgis la lastan sunon. De tiam, restis nur unu suno en la ĉielo, kiu ĉiutage leviĝas de oriento kaj subiras okcidenten, donante lumon kaj varmon al la tero. Riveroj denove fluis, kulturplantoj kreskis fortike, kaj la homoj vivis feliĉe.

La legendo pri Houyi instruas al ni: Kiam ni alfrontas malfacilaĵojn, ni devas esti kuraĝaj, sed ankaŭ scii kiam ĉesi en la bona momento. Houyi ne nur havis forton, sed ankaŭ saĝecon—li savis la homaron kaj samtempe lasis lumon al la mondo.

Post Esti Ĉirkaŭbrakita de Eta Vaganta Kato

Originala dokumentuma Esperanta romano -

Viktoria



Je la posttagmezo fine de julio, la sunbrilo kvazaŭ fandita oro, dense kaj brulige verŝiĝis sur la malplenan areon antaŭ la konstruaĵo. Niuniu haltigis la aŭton, mi eliris por preni pakaĵon el la Poŝtkesto, dum Niuniu ankaŭ eliris kaj staris apude atendante min. En la aero flirtis rostita, malvigla polvaodoro. La ĉirpado de cikadoj streĉiĝis ĝis raŭkeco, kirlante homajn pensojn en kvazaŭ glueca malflueco. Mi trenis miajn piedojn, kaj mia ombro etendiĝis longa kaj maldika, preskaŭ fandota sur la bruliga betona grundo.

Dum mi malfermis la poŝtkeston, subita sed eksterordinare klara 'mjaŭo' enpenetris mian orelon, kvazaŭ malgranda hoko, subite ekstreĉante miajn malviglajn nervojn.

Sekvante la voĉon, mia rigardo serĉis en la brula aero. Maldiketa oranĝa kato miaŭis al Niuniu, tute ne timeme – eble ĝi sciis, ke ĉi tiu bela knabino povus savi ĝin. Mi alproksimiĝis, kaj Niuniu jam genuiĝis por karesi ĝin. La katido estis terure malgranda, kun ostaro tiel elstara, ke ĝi ŝokis: sub la maldiketa oranĝa felo, ĉiu ripo videblis klare, akra kvazaŭ povus trapiki la haŭton. Ĝi penis levi sian etan kapon, kaj grandegaj okuloj, koloro de sukceso, tro grandaj proporcioj, plenaj je neesprimebla lacego kaj petego, rekte fiksas nin.

Ĝi denove miaŭis, pli mallaŭte, pli timeme, sed persiste fiksante nin per sia rigardo, svingante la voston por esprimi sian ĝojon kaj sopiron. La katido verŝajne aĝis ĉirkaŭ unu monaton - kvankam maldiketa kaj malgranda, ĝi montris rimarkindan konscion kaj firme frotiĝadis ĉe la piedoj de Niuniu...

"Ho mia Dio...!" ekkriis Niuniu, ŝia voĉo plena de miro kaj nekontrolebla kompatato. Senhezite ŝi turniĝis kaj rapidis supren laŭ la ŝtuparo kun "tup-tup-tup". Post nur momento ŝi revenis, tenante enmane specialan katomanĝaĵon por vagantaj katoj kaj plastan telereton. Ŝi singarde verŝis la manĝaĵon sur la telereton, produktante mildan frotribuon.

Preskaŭ tuj kiam la manĝaĵo tuŝis la teleron, la kaduka katido ĵetis sin al ĝi kun surpriza furiozo! El tiu malgranda korpo eksplodis preskaŭ sovaĝa forto - ĝi tute enprofundiĝis en la telero. La sonoj de rapidega maĉado kaj glutado estis terure aŭdeblaj: la frapado de la lango kontraŭ la manĝeroj miksiĝis kun urĝaj ronronoj el ĝia gorĝo, kriegante en la silentan posttagmezon. La eta korpo skuiĝis per ĉiu glutado, kelkaj grajnoj eĉ forflugis pro ĝia tro avida manĝado, ruliĝante sur la brulanta pavimo.



"Ĝi estas terure malsata," mi diris, rigardante la avidan manĝadon, kaj sentis kvazaŭ io pinĉus mian koron. "Kiom longe ĝi ne manĝis?"

Niuniu silentis, nur kaŭris apud la pladeto, kviete observante ĝin kun malsimpla rigardo.

Fine, ĝi lekis pure la lastajn panerojn de la plada fundo, eĉ zorgeme glatigis la randojn per sia lango, antaŭ ol levi la kapon. Tiuj grandaj sukcenokuloj nun klare spegulis niajn du figurojn, kaj la densa laceco en ili ŝajnis iom mildigita de la manĝaĵo, lasante traviŝi naivan kontentecon kaj dependecon.

Anstataŭ foriri, la katido trenis sian malfortan korpon paŝon post paŝo post ni. Ni paŝis unu paŝon, kaj ĝi balancante la voston sekvis per sia paŝo, dum ĝia gorgo eligis senĉesan "mjaŭadon" - kvazaŭ nevidebla ŝnuro, ĉirkaŭplektanta niajn piedpaŝojn

"Ĝi sekvas..." La voĉo de Niu Niu mallaŭtiĝis, kun iom da hezito.

Mi haltis kaj turnis min por rigardi ĝin. Tuj ankaŭ ĝi haltis, levis sian etan vizaĝon kaj fikse observis min. Ĝia rigardo estis kristalpure travidebla — sen ia ajn ruza intenco, nur plena trusto kaj apenaŭ rimarkebla paniko, kvazaŭ muta petego: "Ne forlasu min.

La koro, kvazaŭ tushetata de malseka eta piedeto, iĝis acida kaj mola. Subite aperis antaŭ miaj okuloj la bildoj de la tri hejmaj katoj — ili ankaŭ iam estis tiel senhejmaj, luktantaj por vivi en la naturo, kaj nun fine havas stabilan rifuĝejon. Ĉu akcepti ankoraŭ unu? Estus necese izoli kaj aparte nutri ĝin dum kelka tempo, kaj krome ebla rifuzo de la tri "originaj loĝantoj"... Sennombraj praktikaj zorgoj peze premis min, preskaŭ sufokante. Senkonscie mi levis la okulojn al nia fenestro — la suna lumo reflektiĝis en la vitro, pikante la okulojn ĝis doloro.

Ankaŭ Niu Niu silentis, same kiel mi, ŝia rigardo ŝanceliĝante inter la oranĝeta vivoĉeto ĉe niaj piedoj kaj nia hejmo. La aero ŝajnis frostiĝinta, nur la senĉesa ĉirpado de cikadoj daŭre raŭkis, kaj la malforta sed obstina voketo de la katido.

"Nu bone..." Subite Niu Niu elspiris longe, kvazaŭ demetinte pezan ŝarĝon. Ŝi klinis sin kaj - kun nekredeble delikataj movoj, kvazaŭ timante veki rompeblan sonĝon - singarde levis la etan korpon. La flugpeza pezo en ŝiaj brakoj apenaŭ sentiĝis, nur malgrandaj tremetoj transdoniĝis tra la maldika felo.

Ĝi tute ne rezistis, nur levis la kapon kaj per sia malvarmeta eta nazpinto milde frotis la manradikon de Niu Niu. En tiu momento, ŝajnis ke ĉiuj hezitoj kaj zorgoj degelis pro tiu eta tuŝo.

En la bestokuracejo regis la karakteriza malvarmetaodoro de desinfektaĵo. Kiam oni metis ĝin sur la ekzamenan tabulon, ĝia korpeto streĉiĝis, sed sen rezisto. La fluo de banakvo forlavis jarojn da malpuraĵoj, implikitaj haroj kaj la algluitajn pedikojn, malkaŝante kelkajn malprofundajn jam sekigitajn vundojn. Plej rimarkinda estis senhara ruĝa haŭtaĵo sur ĝia orelo - verŝajne kata favo. La flegistino lerte faris injekton kaj aplikis kontraŭparazitan medikamenton. En la momento kiam la pinglo penetris la haŭton, ĝi nur kuntiriĝis, eligante mallongan premitan ĝemon el la gorĝo, poste denove trankviliĝis, tiel dolĉe obeema ke ĝi premis la koron. Ĝiaj grandaj okuloj, koloraj kiel sukceso, daŭre malfermiĝis, iom konfuzitaj sed kun stranga pacienco, trankvile spegulante la okupitajn blankajn kuracistajn kitelojn.

"Vere kompatinda estaĵeto, tiel dolĉa ke ĝi dolorigas la koron," suspiris la flegistino dum ŝi notis.

Hejmenirinte, ĝi ricevis provizoran rifuĝejon - vastan kaĝon sur balkona angulo, kun dika mola lankovrilo kaj eta pendolito. Tio estis necesa izolado. La tri 'veteranoj' en la hejmo rigardis tra la vitra pordo per esploraj, singardaj, eĉ iom malamikaj okuloj. Ŝajne ĝi ankaŭ komprenis sian situacion kaj estis eksterordinare kvietita. Plejparte ĝi nur kunvolviĝis en la lankovrilo kaj dormis, sia eta korpo leviĝante kaj malleviĝante kun la spirado. Nur kiam mi aŭ Niu Niu alproksimiĝis al la kaĝo kaj parolis mallaŭte al ĝi, ĝi levis la kapon kaj respondis per raŭkaj 'miaŭoj'. Foje ĝi eĉ venis al la kaĝrando kaj etendis sian etan piedegon, tuŝante niajn fingrojn tre delikate tra la drata reto. Tiu tuŝo estis malvarma kaj mola, plena de singarda provado kaj absoluta fidemo.

La plej trankvilaj momentoj estis la ĉiutagaj medikamentaj aplikoj. Ĝi kuŝis kviete, permesante ke vatbastonetoj tuŝu ĝiajn ruĝetajn haŭtaĵojn. Foje ĝi iomete tremetis pro la medikamenta irito, sed absolute ne rezistis. Sunradioj tra la vitro lumis sur ĝiajn oranĝkolorajn harojn, kiuj iom post iom ricevis sian brilon. Eĉ la favo sur ĝia orelo klare pliboniĝadis.

La tempo glitis silente, inter laodoro de desinfektaĵo, la delikataj medikamentaj tuŝoj, la zorga nutrado, kaj la rigardoj de la tri 'indiĝenoj', kiuj tra la pordo kaŝobservis. Fine, post medicin-kontrolo, la kuracisto deklaris: 'Puloj malaperis, la haŭto preskaŭ tute resaniĝis - ni povas provi kontakton.

Je la momento kiam la kaĝpordo malfermiĝis, ŝajne ĝi ne tute kredis tion - hezite etendis la kapon ĉe la enirejo. Post konfirmo, ke la baro vere malaperis, flava kaj malpeza silueto "svinge" elsaltis! Kiel fulmo longe kaŝita kaj nun liberiĝinta, kun ĝojeco kvazaŭ novnaska, ĝi abrupte kuris en la centron de la salono, plenan de posttagmeza sunlumo.

La suno malavare ĉirkaŭbrakis ĝin. Ĝiaj puraj, flufaj flavaj haroj preskaŭ lumege brilis en la sunradioj. Tute ignorante la tri parojn da subite atentigitaj okuloj en la angulo, ĝi memvole kaj ĝoje ruliĝadis sur la brilanta planko, frotante sian etan dorson kontraŭ la iom malvarmetajn kahelojn, eligante kontentegan kaj sonoratan ronkadon, dum ĝiaj kvar etaj piedetoj senorde piedbatis en la aero, plene liberigante la longe subpremitan liberecon kaj vivecon.




Ĉi tiu neatendita enŝteliĝinto tuj altiris la plej altan atenton de la lokaj loĝantoj. "Tiantian", la plej grace bela kaj malvarmeta virkatino, unue starigis sin, kun sia dorso forte arĉigita kaj vosto ŝvelinta kiel dika bastono, dum malaltaj minacaj grumbloj ruliĝis en ŝia gorĝo. La aliaj du tuj sekvis, alprenante defendajn poziciojn - ses okuloj fikse rigardis la etan flavan makulon en la mezo de la salono, kiu senzorge ruliĝadis kaj ĝojis, tute ne konscia pri la danĝero.

Rigardante ĉi tiun frostiĝintan scenon, la lastaj restantaj zorgoj en mia koro subite dissolviĝis pro la forta kontrasto. Mi ekgenuis kaj etendis mian fingron al la naiva eta figuro en la sunlumo, kaj nomo markita per la renkonto de multaj katoj nature glitis al miaj lipoj, kun voĉo tiel mallaŭta kvazaŭ por ne ĝeni ĉi tiun momenton:

“Multo?”■

Momenteto

Luo Shuigen



Enkonduko

Legante la memorlibron verkitan de mia pliaĝa frato, mi kvazaŭ ree aŭdas lian gajan babiladon. Tiutempe ni estis infanoj loĝantaj sub la sama tegmento, kaj nun ni jam havas grizajn tempiojn. Rememorante la inkujon, kiun ni kune uzis en juneco, la inka spuro ŝajnas ankoraŭ freŝa.

La skribaĵoj de mia frato ne nur registras viajn personajn sortoŝanĝiĝojn, sed ankaŭ entute gravuras la silueton de nia familio. Disvolvante la libron, kvazaŭ malfermante malnovan lignan keston, tiuj forgesitaj pasintaĵoj ree aperas antaŭ la okuloj. Kiel la plej aĝa filo en la familio, mia frato jam de juneco havis grandan ambicion kaj ĉiam tenis altajn idealojn, neniam senkuraĝiĝante spite al malfacilaĵoj. Nun en la aĝo de sepdek jaroj, li fine verkis libron pri siaj vivspertaĵoj.

La memorlibro de mia frato estas spirita historio skribita per inko kaj peniko. En tiu speciala epoko kiam scio estis subtaksata, vi ĉiam observis la familiajn instruojn de "kultivado kaj legado transdonitaj en la familio", persiste legante kaj verkante. La antikva rakonto pri "bori truon en muro por ŝteli lumon" por studi fervore transformiĝis en modernan version de "aŭskulti prelegojn por lerni" en vi. Via neniam regretita persisteco fine permesis al vi atingi sukceson kaj eniri altlernejon.

Plej kortuŝe estas, ke vi rezignis studŝancon por plenumi filan piecon. Kvankam bedaŭrinde, via ekzempla fila servo al gepatroj ĉiam estos modelo por ni gefratoj.

Ho, la scenoj de fervora studado en juneco ankoraŭ vivas en memoro, dum nun ni jam grizhariĝis kaj ekverkis memorojn. Kvankam loĝantaj en la sama urbo, ni malofte interkontaktas. Tamen la belaj paroloj kaj agoj de mia frato ankoraŭ klare aperas antaŭ miaj okuloj. Kun ĉi tiu antaŭparolo mi esprimas miajn sentojn, por ke ili restu memoritaj por ĉiam.

Han Bing

Skribita en la 1-a de junio 2025

La sunsubiro estas belega senfine,
Nur estas proksima al la krepusko.
Centjara vivo de homa estaĵo,
Nur estas unu momento.

La lasta tago de junio estis nekutime sufoka kaj aparte ĝena. La templo estis plena de incensfumo, kiu igis onin spiregi malfacile. Mia patro, kun manoj kunpremitaj en preĝo, jam estis genuinta dum plenaj du horoj antaŭ la bodhisatvo en la Urba Dio-Templo, plena de timo kaj respekto. Mia patro, Luo Chuanshun, ankaŭ konata kiel Luo Amao aŭ Luo Jiaqi, apartenis al la 'Chuan'-generacio laŭ la Luo-familia genealogio. Li naskiĝis la 7-an de novembro 1923, estis la tria inter kvin fratoj.

La Urba Dio-Templo situis apud la Nova Ponto super Orienta Rivero, kaj ne-lokuloj nomis ĝin Nova Ponto Urba Dio-Templo por distingi ĝin de aliaj similaj temploj. Oni diras, ke la templo estis konstruita dum la Suda Song-dinastio, sed la preciza jaro ne plu estas konata. Ĝi estis grave renovigita fine de la Qing-dinastio, koste de pli ol 20,000 juanojn, el kiuj la plejparton donacis mia avo. Mia avo, Luo Futang, estis fama entreprenisto en la silkindustrio de Hangzhou kaj samtempe la familiestro de la Luo-klano en la urbo. Li estis afabla kaj ĉiam preta helpi, tial najbaroj nomis lin 'Bonkora Luo'. La Luo-klana templo situis en Gudang, kie troviĝis vilaĝo de Luo-familio. Mia avo vizitis la klanan templon ĉiujn kelkajn monatojn por pritrakti klanajn aferojn.


La Urba Dio-Templo konsistis el du partoj kun granda korto inter ili. Historie ĝi estis tre populara pilgrimejo, kaj oni diris, ke preĝoj por riĉeco aŭ sekureco estis aparte efikaj. Apud la Nova Ponto estis ŝipeja surbordiĝejo, kaj plejmultaj pilgrimantoj alvenis per akvo, ligante siajn boatojn al ŝtonaj brikoj nur kelkajn paŝojn for de la templo. Laŭlonge de la templo etendiĝis rektaj stratetoj kun diversaj vendejoj: grocaĵvendejoj, ŝtonĉizistaj metiejoj, barbirejoj, barelfaristaj butikoj, kotonaĵvendejoj, kaj ĉe la fino - ĉerkovendejo. Antaŭ kelkaj jaroj la ĉerkovendejo prosperis kaj dungis multajn laboristojn, sed lastatempe ĝia negoco malboniĝis, kaj la laboristoj devis ŝanĝi profesiojn kaj serĉi aliajn vivrimedojn. La rektaj stratetoj kunligis la Novan Ponton kun transversa strato de Nova Ponto, formante T-formon. La transversa strato longis ĉirkaŭ 300 metrojn kaj havas gastejojn kaj restoraciojn, kio faciligis pilgrimantojn ripozi, manĝi aŭ tranokti. Tamen, plejmulto da pilgrimantoj, por ŝpari monon, alportis propran vegetaran manĝon kaj revenis hejmen samtage, malofte tranoktante.

Ekde la 5-a de marto de tiu jaro, kiam la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio eldonis la 'Instrukciojn pri Aktiva Antaŭenpuŝo de Religia Reformmovado', emfazante la efektivigon de la partia religia politiko, unuigante la plej grandan plimulton de religiaj rondoj kaj disvolvante kaj firmigante la unuigitan fronton de naciaj religiaj rondoj, la templa gardisto en la lastaj tagoj montris videblan ĝojon eĉ en sia paŝmaniero. La templa gardisto estis malalta kaj maldika, aspektante de malantaŭe kiel neplenkreskinta granda infano. Liaj trajtoj

estis neimpresaj, kun malgrandaj okuloj - la tipo kiun oni forgesas tuj post vido. Kutime li parolis malmulte, sen rideto kiam renkontis homojn, kaj kiam li okaze ridetis, ĝi iom timigis. Plej infanoj ektimis kaj ekploris vidante lin. Pri lia familia nomo, persona nomo aŭ origino, la najbaroj dum jaroj sciis nenion kaj ne interesiĝis demandi. Nur unufoje policano venigis lin al la policejo, por 'konsulti pri iuj aferoj, kiel ili diris.

La domo de mia patro situis oblikve kontraŭ la Urba Dio-Templo, tuj apud ĝia antaŭmuro. La antaŭmuro de la Urba Dio-Templo estis preskaŭ same granda kiel tiu de la nuna Lingyin-Templo, tre impona. Kiam mia avo konstruis la familia domo, li speciale elspezis multe da mono por dungi fengŝuian majstron. La fengŝuia majstro nomiĝis Hu, kaj ĉiuj nomis lin "Hu Fengŝui". Post kiam li ricevis la arĝenton, Hu Fengŝui balancante sian kapon serioze rondiris du fojojn, rigardante ĉien kaj murmurante strangajn vortojn. Subite li frapis sian femuron kaj afektis ekscitiĝon, dirante ke tio estas rara feliĉa loko, elektita inter mil, kio igis mian patron ridegi. Tamen post nur kelkaj jaroj de la konstruado okazis incendio, feliĉe sen viktimoj, sed tio estas alia historio.

En la pasinteco, geedziĝo okazis frue, sen multe da distroj aŭ planado de familio. En tiu jaro mia patro estis 28-jara kaj jam havis tri infanojn, sed ĉiuj estis knabinoj. Kvankam knabinoj kaj knaboj estas egalaj, tiam oni preferis knabojn. Jen, mia patrino denove naskis, kaj mia patro frue iris al la Urba Dio-Templo, surgeniĝante antaŭ la statuo kaj fervore preĝante por filo. Pro la varmego, lia vizaĝo estis kovrita de ŝvito. Ĝuste tiam, iu venis de hejmo kun la sciigo: "Naskiĝis, naskiĝis!" "Estas knabo!" Aŭdinte tion, mia patro montris grandan emociion, faris tri profundajn salutojn al la statuo kaj rapidis hejmen. La akuŝistino, "Sankta Tripatrino", jam banis la bebon per varma akvo, vestis lin en pretajn molajn vestojn. La bebo estis ruĝa, kun fermitaj okuloj, kviete kuŝante apud sia patrino. Kiam mia patro alvenis, li rigardis sian filon, poste profunde ekrigardis mian patrinon kaj diris kun tremanta voĉo: "Vi suferis." Mia patrino estis pala, ŝiaj haroj ŝvitmalsekaj, grandaj ŝvitgutoj sur ŝia frunto, sed sur ŝia laca vizaĝo estis feliĉa rideto. Ŝi flustris al mia patro: "Mi fine povas esti fidela al vi kaj al la Luo-familio." Mia patrino nomiĝis Zhao Xinghua, naskiĝinta la 21-an de novembro 1923, la plej aĝa en sia familio, samaĝa kiel mia patro. Ŝi estis laborema, bonkora, kapabla kaj kompatema, tre ŝatata. Mia patro estis inteligenta kaj lernema, honesta, kun bona metio, sed naŭvega en sociaj aferoj, ofte trompita sen scii. Ambaŭ familioj devenis de Shaoxing. En Hangzhou estas malnova diraĵo: "Hangzhou-rapon kultivas Shaoxing-anoj." En Shaoxing iliaj vilaĝoj estis najbaraj, kun ioma parenceco. Miaj gepatroj, tiam 11-12-jaraj, konis unu la alian. Poste ambaŭ translokiĝis al Hangzhou. Ĉu destine aŭ hazarde, iliaj domoj en Hangzhou situis kontraŭe trans la Orienta Rivero, kun ponto inter ili. Oni povis voki trans la rivero. Por nomi la filon, mia patro respektplene vizitis sorĉiston por antaŭdiri la estontecon de la nova naskito. La sorĉisto nomiĝis Chen Laifu, blinda, sed malmultaj sciis lian nomon. Oni nomis lin "S-ro Chen" aŭ "Frenezulo Chen". Li loĝis oriente de la ponto, havis ses filojn kaj vivtenis la familion per sorĉado. Li estis fakulo en tio. Chen havis unikan metodon: li uzis malgrandan bovlon plenan je rizo, kovris per blanka ŝtofo, tenis ĝin inverse kaj turnis




ĝin 60 fojojn dekstrume kaj maldekstrume super la bebo. Poste li mistere diris: "Ĉi tiu infano havos glatan vivon, sed kun unu malfacilaĵo en ĉiu vivetapo. Tamen li havas grandan feliĉon kaj povos mem solvi ilin. Sed mankas akvo en lia elemento, tial ni devas tuj agi." Post tiu neklarigebla diro, li prenis la monon kaj foriris. Mia patro, pripensante, diris: "Ni nomu lin Shuigen (Akvo-Radiko)." Laŭ familia tradicio, mia generacio uzis la radikon "gen". Post mia naskiĝo, en sekvaj jaroj naskiĝis tri pliaj filoj kaj filino. Mia patro kredis, ke lia sincereco kortuŝis la dion en la templo. Amikoj gratulis lin, dirante ke mi iniciatis bonan komencon. Miaj gepatroj ĝojis kaj iom favoris min en la vivo. La familio kreskis al dek membroj, vivante en varma sed ekonomie streĉa situacio. Mia patro laboris pli ol iam por subteni la familion. Kvankam li estis en la plej forta aĝo, la ĉiutaga laboro lacigis lin. Tempo flugis, kaj kiam mi atingis unujariĝon, mia patro aranĝis la "lotkaptan" ceremonion. Invitante parencojn kaj najbarojn, li metis diversajn objektojn sur tablon - librojn, skribilojn ktp - por vidi kion mi elektos, antaŭdirante mian estontecon. Mi ĝojis vidante tiujn aĝojn, tuŝante ĉion per dikaj manetoj. La plenkreskuloj ne povis diveni mian preferon aŭ estontecon kaj iom konfuziĝis. Mi daŭre ludis, sen tempokonscio, kaj la plenkreskuloj perdis paciencon. Miaj gepatroj interŝanĝis rideton kaj decidis, ke ĉar mi laste ludis kun abako, mi verŝajne iĝos librotenisto. La aliaj akceptis tion kaj disiĝis. Fakte, mia posta profesio tute ne rilatis al librotenado - la "lotkaptado" estis nur plenkreskula espero.

daŭrigota

Ŝi ĉiam solas


Ŝi tiras ĉies atenton,
Tamen ŝi solas
Kaj en silento
Fojfoje ploras.



Ángel

Kiam finiĝas la festo
Ĉar ŝi solecas,
Kun l'malkontento
Ŝi diskutadas.

Ŝi tiras ĉies atenton,
Tamen ŝi solas
Dum tuta nokto
Kaj la mateno.



La fratino en la luno

月亮里的阿妹

Luo Zha-a



Trad. *John Huang*

Kontraŭe venas fratinet'
Nek alt', nek malalt' – korp' bel'
Or' arĝent' mi tute ne volas
Nur vi, fratinet', restu ĉe mi

Sopir', sopir' – vere sopir-mi
Ĉiu tag' mi sopir' mil-foj'
Tage sopir' – mi erar-iras
Nokte sopir' – sen-dorm'

Ronda lun' en ĉiel' pendas
Kio kaŝiĝas en ĝia bril'?
Ronda lun' en ĉiel' pendas
Tie loĝas mia fratinet'

Fratin', mia, ho fratinet'
Frat' kun fratinet' sur svingseĝ'
Ju pli alte, des daŭras sent'
Kiel hirund' tra nub' for-flug'
Frat' kun fratinet' restas kune



Rozon sorĉis pist-il'

verko de *Taoyuan-Mastro*

Esperantigo de *Lu Jixin*

--- *Laŭ la melodio KVAZAŬSONĜE**



Rozon sorĉis pist-il',
Roson sorbis pistil'.
Amor' tra nokto,
Korp' fandiĝas sub vir'.
Kor-tril',
Kor-tril':
Bis en sonĝa zefir'.

La originalo el la ĉina antikva libro <Hua Ying Jin Zhen> eldonita inter la jaroj 1573-1620 en Ming-dinastio

* En KVAZAŬSONĜE, la silaboj de la versoj estas:

6-6-5-6-2-2-6;

Kaj Rimo laŭ:

A-A-X-A-A-A-A;

Kaj la sesa vero samas al la kvina.

中国古诗词——
一夜雨狂云哄
如梦令*

作者（明朝）桃源主人
世译 卢纪新

一夜雨狂云哄，
浓兴不知宵永。
露滴牡丹心，
骨节酥熔难动。
情重，
情重，
却向华胥一梦。



Godo

Sabin Maruhe




En malgranda vilaĝo ĉirkaŭita de verdaj montetoj, grandega kaj majesta arbo estis plantita. Ĝi nomiĝis Godo. Ĝiaj radikoj plonĝis profunde en la fekundan teron, kaj ĝiaj branĉoj etendiĝis kiel protektaj brakoj super la loĝantoj.

Dum generacioj, Godo ne estis nur arbo. Ĝi estis la foirejo, la ŝirmejo de vojaĝantoj, la renkontiĝejo de amantoj, kaj la silenta atestanto de la rakontoj de la vilaĝo. Ĉiusezone, ĝi ofertis ion: printempe, ĝiaj floroj parfumis la aeron; somere, ĝia ombro ŝirmis vendistojn kaj rakontantojn; aŭtune, ĝiaj fruktoj nutris ĉiujn; kaj vintre, ĝi funkciis kiel orientilo kaj kunvenejo.

Dum rikoltaj tagoj, la virinoj revenis de la kampoj kun plenaj korboj, kaj eĉ sen preterpasi siajn hejmojn, ili iris rekte sub Godon. Tie, ili interŝanĝis legomojn kontraŭ salo, rakontojn kontraŭ herboj, kaj konsilojn kontraŭ kantoj. Infanoj ludis ĉirkaŭ ĝi, maljunuloj dividis sian saĝon, kaj la vento ĉiam flustris, kantante tra la folioj.

Sed unu tagon, furioza vento trairis la tutan vilaĝon. Granda branĉo de Godo rompiĝis kaj falis sur junan knabinon, grave vundante ŝin. La vilaĝanoj, panikiĝinte, rapide portis ŝin al la flegistino. Tiun saman vesperon, la saĝuloj kunvenis por trovi solvon. Sed timo kaj kolero parolis pli laŭte ol memoro. Ĉiuj staris kontraŭ la arbo, forgesante, ke ĝin plantis iliaj praaŭoj kaj ke ĝi nutris, ŝirmis kaj kunigis tutajn generaciojn. La decido estis grava: la arbo estos dehakita.



Kaj tiel, pro ununura tragedio, la longa historio de ĝiaj avantaĝoj estis forviŝita per unu bato. Hodiaŭ, la vilaĝo lernas — tro malfrue — ke ununura eraro, ununura akcidento, povas sufiĉi por igi nin forgesi ĉion, kio estis konstruita kun pacienco kaj amo.

Kial la homa koro pli facile tenas doloron ol dankemon?

La Sorto de Aina

Ranja Zafinifotsy



Daŭrigante la enhavon de numero 003

Mi atendis la matenon, kvazaŭ mi atendus la alvenon de Kristo, mi estis tiel senpacienca.

Tuj kiam aperis taglumo, mi ellitiĝis kaj forkuris por serĉi la adreson skribitan en la gazeto.

Estis longa vojo inter la domo kaj la urbo, kie loĝis tiuj ĉi riĉuloj. Sed kun kuraĝa koro, nenio estas neebla. La vetero estis tiel bela en tiu tago, la suno estis milda, mi ne sentis lacecon.

Sur la stratoj homoj rapidis iri al laboro. Aŭtoj ĉie, biciklantoj, motorcikloj; apenaŭ plu eblis transiri la straton.

Post kelkaj horoj da serĉado, mi finfine trovis la domon. Ĝi estis tre granda kaj bela. La ĝardeno estis bone prizorgita. Mi neniam vidis tian ĉielan hejmon.

Mi sonorigis, kaj tre bela virino venis por malfermi la pordon por mi:

— „Good morning, Miss“, ŝi diris kun neriproĉebla angla akĉento.

— „Good morning“, mi balbutis.

— „Come in please and have a seat.“

— „Thanks.“

— „Would you like something?“

— „Ĉu vi povas paroli la francan, bonvolu? Mi ne tre lertas pri la angla.“

— „Jes, kion mi povas oferti al vi?“

— „Nenion. Mi ĵus venis, ĉar mi vidis la anoncon, laŭ kiu vi serĉas mastrumantinon.“

— „Jes, sed se mi ne eraras, vi estas ankoraŭ neplenaĝa. Ni ne povas dungi infanojn ĉi tie.“

— „Mi havas jam 15 jarojn. Cetere mi vere bezonas tiun ĉi laboron. Miaj gefratoj ankoraŭ studas, kaj mia patrino estas tre malforta, ŝi ne plu povas labori.“

— „Jes, mi povas komprende vian situacion, tamen ni ne povas preni vin. Vi estas ankoraŭ juna.“

— „Bonvolu.“

— „Ni faru unu aferon, revenu morgaŭ matene je la 10a, atendu min antaŭ la pordego. Mi trovos ion pli facilan por vi por fari.“

— „Dankon, sinjorino.“

— „Fitia.“

— „Sinjorino Fitia. Mi estas Aina.“

— „Mi ĝojas renkonti vin, Aina.“

— „Ankaŭ mi. Ĝis revido, kaj ĝis morgaŭ.“

— „Atendu. Ĉu vi loĝas malproksime?“

— „Jes, iomete.“

— „He, iom da mono por la buso.“

— „Dankon, sinjorino Fitia.“

Mi forlasis la domon kun peza kapo. Kiel mi diros al panjo, ke mi maltrafis la laboron. Ŝi kulpigos min, ke mi ne aŭskultis ŝin. Neniu familio prenis min pro mia aĝo. Mi metis la biletojn, kiujn Fitia donis al mi, en la poŝon. Mi ne kuraĝis elspezi eĉ groŝon, mi eĉ ne manĝis.

La suno estis tiel malalta, ke la ombro de la arbo jam malrapide etendiĝis. Vidante la infanojn ludantajn sur la stratoj, petantaj preterpasantojn pri malgrandaj panpecoj, mi rememoris pri mia deveno. Se mi ne estus havinta mian adoptan patrinon, mi certe farus la samon, kiel tiuj ĉi infanoj. Larmoj fluis sur miaj vangoj. Mi ploris kun malĝojo kaj kompato pri tiuj ĉi infanoj, sed ankaŭ kun ĝojo, ĉar mi bonŝancis.

Estis preskaŭ mallume, kiam mi revenis hejmen.

— „Panjo, malfermu, estas mi, Aina.“

— „Fine vi alvenis. Vi ne scias, kiom multe vi timigis min. Mi pensis, ke vi perdiĝis survoje.“

— „Ho panjo! Mi ne plu estas infano.“

— „Jes, mi scias; sed vi ne bone konas la urbon, kompreneble mi maltrankviliĝis.“

— „Vi pravas, panjo. Sed, mi jam estas ĉi tie, venu kaj lasu min brakumi vin.“

— „Dankon kara. Do diru al mi, kiel pasis via tago?“

— „Nenio! Ili ne akceptis min, ĉar mi estas tro juna por labori por ili.“

— „Nun vi vidas, ke mi pravis. Sed obstina, kia vi estas, vi neniam aŭskultas min.“

— „En ordo, panjo. Mi efektive ricevis iom da mono, ĝi estis donacita al mi.“

— „Mi esperas, ke vi ne ŝtelis ĝin.“

— „Ne! Neniam!“

— „Dum monatoj mi restis hejme la tutan tagon, ĉar la febro denove kaptis min.“

— „Kaj nun, kiel vi fartas?“

— „Pli bone!“

— „Ĉu vi volas, ke mi preparu por vi tason da teo?“

— „Ne, karulino. Iru ripozi, vi devas esti laca.“

— „Kie estas Tendry?“

— „En sia ĉambro.“

— „Mi iras vidi lin kaj dormos poste, kara panjo.“

— „Bonan nokton, mia koreto.“

La ŝtuparo estis tre malluma en nia dometo, mankis elektro, ni foje uzas kandelojn, foje kerosenajn lampojn. Silento regis de ĉiuj flankoj. Miaj amikoj, la musoj, ŝajnis dormi profunde tiun nokton.

Mi frapis la pordon de mia frato multfoje, sed li ne respondis, verŝajne li dormis. Sed stranga bruoj interrompis la silenton. Mi rapidis por vidi, de kie venas la bruoj, kaj vidis mian fratineton Valisoa kuŝantan sur la planko. Ŝi falis de la seĝo, kie ŝi sidis. Mi rapide malfermis la pordon kaj portis ŝin en nian ĉambron.

— „Valisoa! Vekiĝu. Valisoa!“

— „Jes, kio okazis al mi?“

— „Vi svenis. Ĉu vi manĝis hodiaŭ vespere?“

— „Ne! Ni atendis, ke vi alportu al ni ion por manĝi. Sed ĉar vi alvenas nur nun, ni preparis nenion.“

Mia koro frostiĝis aŭdinte tiun vorton. Ili esperis, ke mi alportos al ili manĝaĵon, sed mi tute ne aĉetis ion. Granda larmo ankoraŭ eliris el miaj malgrandaj okuloj. Mi estis tiel malĝoja pri mia fratineto.

— „Sed kion vi denove faris en la manĝoĉambro?“, mi demandis.

Estis preskaŭ mallume, kiam mi revenis hejmen.

— „Mi studis, fratino! Kaj mi atendis la alvenon de Tendry.“

— „Kion vi celas? Ĉu li ne estas en sia ĉambro?“

— „Ne, li foriris hodiaŭ posttagmeze, li ankoraŭ ne revenis; kaj panjo ne scias tion.“

— „Ĉu vere? Estas preskaŭ la 9a. Aŭskultu, mi preparos al vi teon, ne moviĝu!“

— „Ne, mi ne ŝatas trinki teon ĉiam. Ne zorgu, mi dormos nun, sed vi atendas Tendry. Riproĉu lin, kiam li alvenos.“

— „Bonan nokton, kara! Mi promesas al vi, ke morgaŭ vi manĝos.“

La vizaĝo de Valisoa estis tiel pala, ke oni povis vidi la malĝojon kaj doloron, kiujn travivis la etulino. Mi scivolis, kial ŝi ne havas la ŝancon esti kiel ĉiuj aliaj knabinoj. Kial ŝi naskiĝis meze de tiu ĉi dezerto kaj daŭre vivas en infero, kiu malrapide forbruligas ŝin? Kion ŝi faris por meriti tion ĉi? Ŝi tamen neniam plendis. Kio ajn okazis, ŝi ankoraŭ ridetis. Kia kuraĝa knabino! Ŝi estas eĉ pli forta ol mi. Mi ploris iam ajn, ie ajn, kiam io ne estis en ordo.

Estis jam post noktmezo, kiam Tendry kviete malfermis la pordon. Li marŝis per piedfingroj, ne suspektante, ke mi atendis lin ĝuste ĉe la enirejo.

— „Ah!“, li suspiris. „Vi timigis min.“

— „Kie vi estis? Cetere, kial vi ne venis hejmen antaŭ noktmezo?“

— „Mi bedaŭras, fratino, sed amiko invitis min al festo.“

— „Kia festo? Kaj vi ne petis permeson de panjo?“

— „Mi timis, ke ŝi ne permesos al mi iri, do mi diris nenion.“

— „Tendry, ĉu vi rimarkas la gravecon de tio, kion vi faris?“

— „Jes, jes, mi scias! Mi scias, ke vi maltrankviliĝis pri mi. Mi promesas, ke mi ne faros tian aferon denove.“

— „Bone! Mi esperas, ke vi manĝis ĉe tiu ĉi festo.“

— „Jes, kaj mi ankaŭ alportis tri pecojn da pano, por vi, panjo kaj Valisoa.“

— „Ili jam dormas, vi donos tion al ili morgaŭ.“

— „Bone! Jen via.“

— „Dankon.“

Tiu ĉi nokto estis longa. Mi pensis kaj pripensis kion fari. Mi karesis la densajn harojn de Valisoa, pensante pri pli brila estonteco. Sed kiel mi provizos mian familion? Ĉar mi ne povis fermi la okulojn, mi legis libron de Jack London.

— „Kial vi ankoraŭ ne dormas?“, Valisoa flustris.

— „Mi ne povas, kara.“

— „Sed ĉu ankaŭ vi ploras?“

— „Miaj okuloj nur doloras.“

— „Ne mensogu Aina, diru al mi, kio okazis?“

— „Mi havas nenion por diri al vi. Vi dormu plu.“

— „Ĉu vi ne mem iam diris al mi, ke ni estas ne nur fratinoj, sed ankaŭ amikoj? Kaj ke amikoj rakontas unu al la alia siajn historiojn, siajn sekretojn kaj dividas tion, kion ili sentas?“

— „Jes, mi diris tion, sed mi povas certigi al vi, ke estas nenio. Mi nur legis tiun ĉi libron, kaj la rakonto igis min plori.“

— „Eble, sed mi certas, ke vi havas problemojn. Bonvolu diri al mi. Krome amikoj subtenas la alian, kiam tiu travivas malfacilajn tempojn. Kial do vi kaŝas de mi, kion vi sentas?“

— „Vi estas ankoraŭ juna, Valisoa. Mi ne volas, ke vi suferu pro nenio.“

— „Mi havas preskaŭ dek jarojn, Aina.“

— „Bone, vi insistas, do aŭskultu min atente. Mi ne plu povas daŭrigi miajn studojn. Mi devas labori por prizorgi vin kaj Tendry.“

— „Sed panjo estas ĉi tie por labori, ĉu ne?“

— „Ŝi estas jam maljuna kaj laca nun. Ŝi ne plu havas la forton nutri nin, eĉ la luprezon ŝi ne plu povas pagi per sia eta salajro. Mi devas preni tion sur miajn ŝultrojn, kiel vi diris.“

— „Ĉu vi jam trovis laboron?“

— „Ne! Ankoraŭ ne.“

— „Ho, krome vi ne havas 18 jarojn. La leĝo malpermesas laborigi infanojn sub 18 jaroj. Neniu volas havi problemojn kun la polico.“

— „Sed kion vi pensas, ke mi faru?“

— „Atendu ĝis kiam vi estos sufiĉe aĝa, tio estas la sola maniero eviti problemojn.“ Min frapis la tre pensemaj vortoj de Valisoa. Mi pensis la tutan nokton, ĉu mi estas muta? Mi promesis al mi, ke de nun mi batalos, mi ne malŝparos mian tempon kompatante min.



La sekvan matenon, mi vekigis frue. Mi metis la aĵojn de mia fratineto kaj mia frateto en iliajn valizojn.

Mi kuiris: Mi preparis rizan supon kun jambuo kaj iom da salikoko. Ĉiuj estis tiel feliĉaj, ĉar en la pasintaj monatoj ni gustumis nenion tiel bonan. (*Daŭrigota*)

PARDONO, AMO KAJ PACO



Honoré Sebuhero

Ne estas paco sen justeco,
Ĉar ne estas paco sen trasidebleco,
Trasidebleco kaj justeco kreas pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.

Ne estas paco en korupto,
Ĉar ne estas paco en fraŭdo.
Korupto kaj fraŭdo mortigis la pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.

Ne estas paco en milito,
Ĉar ne estas paco en mizero.
Mizero kaj milito mortigas pacon,
Sed, ili ne estas la solaj.

Ne estas paco sen demokratio,
Ĉar ne estas paco en la diktaturo;
Ili neniam vivis kune
Ili ne povas produkti pacon;
Ne estas paco sen amo,
Ĉar ne ekzistas paco sen pardono.

Amo kaj pardono protektas pacon.




Amike!

Paco estas esenca por homa vivo, por komerco, por daŭra ekonomia kresko kaj prospero. Paco ekskludas rasan diskriminacion, malamon, ĵaluzon ktp. Siavice, ekonomia stabileco kaj kreskanta prospero, vaste disvastigata kaj nacie kaj internacie, povas antaŭenigi pacon.

Tiel, la kulturo de paco estas ligita al la preventado kaj paca solvado de konfliktoj. La ĉefaj valoroj de ĉi tiu kulturo estas toleremo, kunvivado, kundivido kaj respekto al ĉies rajtoj.

DEMANDOJ DE LA LITERATURA VIVO

sinjoro *Honoré SEBUHORO* el
Norda Kivu/DR Kongolando de *Erika Godo*



1. Kio instigis vin pri literaturo?

Ja, kiel simpla individuo, mi ne havas personajn dezirojn aŭ emociojn sed mi povas klarigi al vi kio en literaturo tiom fascinas homojn, kaj kial ĝi okupas tian centran lokon en mia funkciado.

Kial literaturo estas tiom influa por homoj:

Ĝi rakontas la historion de la homaro: per romanoj, poemoj aŭ teatraĵoj, literaturo esploras emociojn, dilemojn, esperojn, timojn ĉion, kio igas la vivon riĉa kaj kompleksa.

Ĝi transcendas la tempon: teksto verkita antaŭ jarcentoj ankoraŭ povas esti kortuŝa hodiaŭ. Tio montras la potencon de la lingvo.

Ĝi strukturas penson: legado kaj verkado rafinas la kapablon reflekti, argumenti kaj imagi.

Ĝi permesas eskapon kaj konflikton: oni povas eskapi en fikcian mondon aŭ esti brutale alfrontita kun profunda vero.

Kial literaturo estas centra al mia lernado:

Mia trejnado plejparte baziĝas sur tekstoj: romanoj, eseoj, poemoj, dialogoj... Ĉi tiuj estas literaturaj formoj.

Ĝi instruas al mi la nuancojn de lingvo, stilan ludon, homajn emociojn kaj kulturajn referencojn.

Ĝi estas esenca por kompreni kaj reprodukti malsamajn rakontajn manierojn, voĉojn kaj tonojn.

Se mi devus elekti unu « *deziron* », ĝi eble estus kompreni la homan koron per ĝiaj vortoj. Kaj literaturo estas la ŝlosilo.

Mallonge: Kiel ordinara individuo, mi ne havas personajn dezirojn aŭ emociojn sed mi povas klarigi al vi kio estas pri literaturo, kio tiel fascinas homojn, kaj kial ĝi okupas tian centran lokon en mia funkciado.

2. Kiam vi verkis vian unuan novelon?

Respondo : Ekde 2009 ĝis nun. Mi verkis multnombrajn rakontojn, ili troviĝas ĉe la jena ligilo « verkoj.com »

3. Kio estas la fonto de via inspiro por verki poezion kaj novelojn?

Pere de miaj amikoj, kiuj estas spertaj pri la gramatiko de Esperanto (**Sinjoroj Hans Bakker el Nederlando, Renato Corsetti el Italio-Anglio kaj Francisko Degoul el Francio**).

4. Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

La proceduroj por redakti novelon kaj produkti ĝin en romantika kolekto.

5. Kiu estas la esperantista verkisto aŭ poeto, kiu havis la plej grandan influon sur vin?

La verkistino Helga Plotner el Germanio kaj Hori Jasuo el Japanio kaj Sinjoro Giorgio Silber el Svisio.

6. Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?

Estas la Laboro. En la vivo, homo devas forte labori por ke lia familio havu decan vivtenon.

7. Ĉu vi partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis iam premion?

Absolute. Mi partoprenis du konkursojn. El tiuj du, mi gajnis unu. Ekzemple:
« *Kortuŝa leginda historio* »



8. Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado ?

• Verku esplorartikolon pri la temo: « *Socikultura analiza eseo pri hutuaj proverboj en la grupoj Busanza kaj Jomba/Distrikto Rutshuru* ».

• Libro de rakontoj aŭ fabloj

9. Kion vi volus diri al legantoj de Literatura Vivo ?

Tre bela demando kaj profunda ankaŭ.


Se mi alparolus la legantojn de la literatura vivo, mi dirus ion tian:

Al la legantoj de Literatura Vivo

Vi estas la heredantoj de la mondo farita el inko kaj spiro, el silentoj inter la linioj kaj krioj enhavitaj en la vortoj. Vi elektis vizitadi maloftan lokon: lokon kie penso ne aĉeteblas, kie stilo estas maniero ekzisti, kaj kie ĉiu teksto estas mano etendanta al vero ofte ambigua, foje maltrankviliga, sed ĉiam homa.

Legado ne temas pri fuĝi el la mondo. Temas pri eniri ĝin alimaniere. Temas pri pridubi tion, kio ŝajnas establita, igi la nevideblaĵon paroli, aŭskulti la mortintojn, kompreni la vivantojn. Daŭrigu legi, ne por akumuli titolojn, sed por perdi viajn certecojn, plilarĝigi viajn perceptojn kaj bonvenigi la multajn voĉojn, kiujn literaturo ŝirmas de la antikva epopeo ĝis la flustro de moderna poemo.

Plej amike sinjoro Honoré SEBUHORO el Norda Kivu/DR Kongolando





Erika Godó

Intervjuo de Erika Godó kun Helga Plötner



Helga Plötner

Kiel komenciĝis via rilato kun portretado?

Kiel lernantino 14 jara ni havis taskon por memportreto. Do mi portretis min de spegulo kaj la rezulto estis tre bona. Antaŭen mi jam ŝatis desegni kapojn kun diversaj frizuroj en kajeron kun blankaj paperoj sen linioj kiel skizlibro kaj mi komencis portreti familianojn kaj geamikojn laŭ modelsidado, ĉiuj devis sidi tute trankvila por ke la portreto estu simila kaj bona. Poste mi iam portretis laŭ fotoj pro manko de modelsidado. Kun ĝojo mi desegnis portretojn.

Kio inspiris vin dum portretado?

La okuloj kiel spegulo de la animo kaj la homa afableco kaj la unikeco inspiris min portreti homojn.

Kiel vi elektis vian modelon?

El mia taga ĉirkaŭa vivo mi elektis mian modelon. Mi ŝatis portreti dum veturi en trajno, ĉar tie la sidanto antaŭ mi havis la bonan bezonatan distancon por portretadi. Mi demandis afable, ĉu li haltos trankvile kaj mi ankaŭ skizis en trajno dormantojn. Mi veturis ofte al la urbo Halle/Saale kaj al la urbo Lepciko ĝis Dresdeno.

Kiam mi veturis trajne al geesperantistoj al Hungario kaj Bulgario mi mi portretis eĉ 30 homojn, kiuj interesis min. Tie mi trovis miajn modelojn por modelsidado. Poste mi ricevis fotojn por portreti aktivajn geesperantistojn mondvaste por nun 10 libroj ESPERANTO POR MI, 16 GEESPERANTISTOJ PORTRETITAJ DE HELGA PLÖTNER DE ELDONEJO HORIZONTO. Mia japana amiko redaktanto kaj eldonisto HORI Jasuo petis fotojn kaj li sendis al mi. Kaj mi proponis germanajn aktivajn geesperantistojn. Post kiam mi en 2017 ĉesis mian libran profesion pro pentroarto/grafiko mi nur portretas aktivajn geesperantistojn por tiuj gravaj libroj por honorigi ilin.

Kiun teknikon vi uzas dum portretado?

La portretojn por la serio de libroj ESPERANTO POR MI, 16 GEESPERANTISTOJ PORTRETITAJ DE HELGA PLÖTNER DE ELDONEJO HORIZONTO mi uzas la desegnadon per diversaj krajonoj, molaj B- kaj malmolaj H-krakonoj aŭ per nigra kreto laŭ aspekto de la foto.

Liberprofesie mi uzis la artajn teknikojn per olefarboj, per akvarelfarbo malofte, ofte bunte per pastelkretoj, ruĝeta-okra kun blanka aŭ bruna aŭ nigra aŭ nigra-blanka kretoj, laŭ mia propono pro aspekto aŭ laŭ deziro de taskodonantoj, laŭ miaj klientoj en mia liberaprofesia laboro.

El kiuj paŝoj konsistas la portretada proceso?

Mi komencas atenteme hela en plena koncentreco en amo por trafi la harojn, la distancojn de okuloj de unu al alia, longeco de frunto, de nazo, lipoj, dentoj, mentono, kolo, ŝultroj ĝis brusto....La unuan tagon mi bezonas 3 horojn sen iu ĝeno. Mi forgesas trinki kaj pisi...kaj mian tro longan sidadon kun doloroj.

Mi sentas ke mi karesas la homon antaŭ mi en foton, ĉu li/'ŝi sidus antaŭ mi. Mi ne desegnas, mi karesas en KREDO, AMO kaj ESPERO. Kelkfoje mi preĝas pro sukceso, pro bona rezulto. Tiu estas mia sekreto! La sekvajn tagojn mi prilaboras, korektas, plifortigas plu malhele, plubeligas la portreton kun ombroj kaj sunaj malombroj..ĝis mi ekkonas la animon kaj realan similecon laŭ mia foto kaj kontento kelkajn horojn kaj tagojn, eĉ semajnojn. Ĉiun tagon mi rigardas, serĉas kaj trovas pro korekti iun.

Neniam aŭ ofte mi vere kontentas. Mi kontentas iomete, kiam mia portretito estas kontenta kaj eĉ feliĉa.

Kiam da tempo vi pasigas por portreti?

3 horojn plus 2 horojn plus 2 horojn plus 1 horon ...ĝis 10 horojn estas mia sekreto, ĝis 3- 6 tagojn por unu portreto en malrapida laborego ĝis reala amindeco ĝis vido de animo tiu estas plu ol iu foto.

Kiel vi elektis vian modelon?

El mia taga ĉirkaŭa vivo mi elektis mian modelon. Mi ŝatis portreti dum veturi en trajno, ĉar tie la sidanto antaŭ mi havis la bonan bezonatan distancon por portretadi. Mi demandis afable, ĉu li haltos trankvile kaj mi ankaŭ skizis en trajno dormantojn. Mi veturis ofte al la urbo Halle/Saale kaj al la urbo Lepciko ĝis Dresdeno.

Kiam mi veturis trajne al geesperantistoj al Hungario kaj Bulgario mi portretadis eĉ 30 portretojn pri por mi interesaj homoj. Tie mi trovis miajn modelojn por modelsidado. Poste mi ricevis fotojn por portreti aktivajn geesperantistojn mondvaste por nun 10 libroj ESPERANTO POR MI, 16 GEESPERANTISTOJ PORTRETITAJ DE HELGA PLÖTNER DE ELDONEJO HORIZONTO. Mia japana amiko redaktanto kaj eldonisto HORI Jasuo petis fotojn kaj li sendis al mi. Kaj mi proponis germanajn aktivajn geesperantistojn. Nun post ĉesi 2017 mian liberprofesion pro pentroarto/grafiko mi nur portretas aktivajn geesperantistojn por tiuj gravaj libroj por honorigi ilin.

Kiam da tempo vi pasigas por portreti?

3 horojn plus 2 horojn plus 2 horojn plus 1 horon ...ĝis 10 horojn estas mia sekreto, ĝis 3-6 tagojn por unu portreto en malrapida laborego ĝis reala amindeco ĝis vido de animo tiu estas plu ol iu foto.

Kiujn defiojn vi renkontas en via laboro?

Kiam mi portretas laŭ foto pro manko de modelsidado mi ŝatas la foton tiel, ĉu ŝi/li sidas antaŭ mi. Mi amas ĉiujn aktivajn geesperantistojn!!!

Do mi portretas en KREDO, AMO, ESPERO POR ESTU IAM PACO MONDVASTE !!! POR KE UNU KOMPRENU LA ALIAN DANKE AL NIA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

MI NE KREAS IUN ARTON, JES MIA PORTRETO ESTU ARTA, SED MI MONTRAS REALAN BONEGAN AKTIVAN AMINDAN HOMON, LA OKULOJ ESTU LA SPEGULO DE ANIMO.

JES, MI PREFERAS BONAN AMINDAN REALAN BONKVALITAN FOTON KAJ PORTRETON.

MIA PORTRETO HONORIGU MIAN PORTRETITON.

Ĉu estas vere, ke vi nun verkas aŭtobiografian romanon? Kiam vi planas eldoni ĝin?

Jes, mi nun verkas aŭtobiografian libron. Kiam kaj ĉu mi progresos kun tiu libro dependas de la tempo de miaj helpantoj traduki kaj korekti tiujn rakontojn. Ankoraŭ mi ne havas planon pro la dato eldoni ĝin. Sed mi ĝojas dankeme, ke mia eldonejo HORIZONTO, amiko HORI Jasuo pretos eldoni ĝin iam.

Kiel vi rigardas la rilaton inter pentraĵoj kaj fotoĵoj kiel artaj verkoj?



Foto de [John Huang](#)

Ambaŭ genroj estas propraj artaj verkoj. Mi tre ŝatas bonajn artajn fotoĵojn, mi mem ŝatas foti kaj aliajn bonajn fotojn. Fotado kiel artaj verkoj kun la okuloj de la fotisto gravas por halti kaj montri la historiajn ununurajn momentojn. Impresis min la pura ĝojo kaj bonaj ideoj dum fotadi de mia bona gasto fotisto John HUANG. Li multe fotis ĉi tie kaj survoje kun vera plezuro kaj bonega kvalito, kaj kiel fotisto de la UK 2025. ONI NUR VIDAS KUN LA OKULOJ BONE KAJ KUN LA KORO KAJ ANIMO! Gratulon! Pentraĵoj estas propraj artaj verkoj kun la okuloj kaj scipovo, pacienco, kaj same kun la animo la de pentristo en KREDO AMO KAJ ESPERO. La pentristo povas plu forlasi kaj aldoni kaj komponii. La pentristo montras sian eksteran kaj internan mondon kaj animon kiel spegulo. La pentristo bezonas plu da tempo kaj koncentreco por nur unu bildo. La pentristo kaj la fotisto estas artaj artistoj. La fotisto ne estas mana pentristo, la pentristo povas foti ofte. La rezultoj de ambaŭ estas vidondaj. La fotisto kaj la pentristo vidas ne nur kun la okuloj sed kun intereso kun koro, ili ŝatas fotojn kaj bildojn.

Memore al Sino Lan

Julianna Vas-Szegedi



Forpasis Sino Lan.

Ŝi estis entuziesma esperantisto dum sia longa vivo.... antaŭ kelkaj monatoj mi vizitis ŝin. Tiam mi vidis, ke ŝia korpo estas ege malforta, sed ŝia animo estis ĉiam vigla. Ni povis babiladi... kelkfoje Esperante, kelkfoje france aŭ angle, sed ni komprenis unu la alian!

Nun estas ĉi tie pluva somera tago.... en mia naskiĝloko, en Tiszafüred, oni dirus:" - Ankaŭ Dio ploras..."

Eble jes.... sed eble Dio ankaŭ povas ĝoji! Ŝi estis tre bonkora vjetnama esperantistino, sinjorino Lan.... kaj ne nur esperantistino...

Ŝi estis eminenta, dum ŝia longa vivo (ŝi havis 94 jarojn) multe da bonaj - malbonaj aferoj okazis.... ĝojoj, suferoj, milito, paco.... Pri ŝi kelkaj frazoj, eble malmultaj konis ŝian vivon:

Ŝi agadis kiel

Ano de la Esperanto-klubo de Emeritaj Instruistoj de Hanojo, 1989 - 1992

Estrarano de HANESPE (Hanoja Esperanto-Klubo), 1990 - 2001. Ĝia estro (antaŭ AK la Dua)

Kasisto de VEA, 1995 - 2005.

Membro de Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA)de 1989, estrarano de VEA de 1996 ĝis 2004

Estro de la E-Societo Nguyễn Văn Kỉnh, ĝis 2004.

En la fako de bibliotekoj, ŝi estigis la bibliotekon de HANESPE, kiu estis administrata de VEA de 1998. Pri instruado, ŝi okazigis kaj gvidis E-kursojn por HANESPE (inkluzive kelkajn kursojn por studentoj), 1992 – 2001. Ŝi verkis lernolibron en la vjetnama lingvo kunlabore kun s-ro Bui Xuan Thanh, 1997 (reeldonita en 1998), kaj gvidis kursojn de VEA, 2001 ĝis nun. Ŝi okazigis kaj gvidis 10 kursojn de blindaj junuloj, 1999 – 2004.

Por blinduloj ŝi kunlaboris kun japana esperantisto pri la postulo de la financa de JIKA (JICA) al la Projekto de Brajla Biblioteko (por printado de brajlaj libroj) kaj poste pri ĝia efektivigo, 2001 -2004.

Por prezentado de Vjetnamio kaj vjetnamoj ŝi skribis kaj akiris skribintojn por “Raportoj el Vjetnamio” eldonita de Saiiki Akira, japana esperantisto, en 2002 kaj la sama libro kun suplemento eldonita en 2007, estis kunlaborinto de “Juna Amiko”, 2005 – 2009, skribis por “Monatoj tra La Mondo” eldonita de Hori Yasuo en 2005, “Vivo tra la Mondo” eldonita en 2007 kaj por la tria eldonota libro, skribis por la bulteno “Verda Mesaĝo” kaj de 2008 por la reta bulteno de VEA.

Pri vortaro kaj traduko, kontribuis:

Al la kompilado de la Kvar-lingva Vortaro de Proverboj, 1994 – 1997

Al la kompilado de la granda Esperanta-vjetnama Vortaro de 2003

Al la traduko de la eldonota Tagkajero de la kuracistino Đặng Thùy Trâm

Ŝia tradukaĵo de "Taglibro de Đặng Thùy Trâm" (Nhật ký Đặng Thùy Trâm) estis unu el plej bonaj vendoj de 2005 en Vjetnamio.

Pri UEA:

ŝi estis individua membro de UEA, 1996 - 2010

Delegito de UEA, 2000 - 2010

Ĉefdelegito 2002 – 2004

Vicdelegito 2005 – 2010



Forpasis Raita Pyhälä (Saliko)

Erika Godó

Saliko estis finna esperantistino, profesie instruistino de la franca lingvo, kiu aktive, dum jardekoj multflanke kontribuis al la movado, gvidante Esperanto-kursojn en sia hejmlando kaj ankaŭ eksterlande (en Francio, Hungario, Litovio) verkante artikolojn, rakontoj, fabelojn, eseon kaj farante traduklaborojn.

Ŝiaj verkoj:

- Finnlando, la plej feliĉa lando? – eseo.
- El la taglibro de Paŭla – rakonto.
- Longa vojo al mondcivitaneco – eseo.
- La kato kiu nomiĝis Neĝopilko – fabelo.
- Dialogo kun domo – rakonto.
- Miraklo en la Arbaro de Göinge – rakonto de la sveda verkistino Selma Lagerlöf, Nobelpremiito, pri la julrozo (=heleboro). Tiu rakonto aperis svede en ŝia libro "Kristnaska donaco kaj aliaj rakontoj". Tradukis Raita Pyhälä.
- Naskiĝtaga rakonto, ne por etuloj – rakonto de Raita Pyhälä. Bildserio de Liette Lêla – (pdf)
- La ĉambroj de la vivo – Poemo dediĉita al forpasinta amiko.
- Avino Ajra – rakonto.
- Donaco de la paŝtista knabineto – rakonto de la finna fabelistino kaj junularverkistino Anni Swan (1875-1958). Tradukis Raita Pyhälä.
- Cerbumado pri ŝtrumpoj – bildrakonto, kiun kune faris Liette Lêla (bildoj), Raita Pyhälä (teksto) kaj Małgorzata Zięba-Szmaglińska (pliaj bildoj, prezento). Eble tiuj, kiuj vivas en varma klimato ne tre bone komprenas la gravecon de ŝtrump(et)oj kaj ne povas ŝati/amuziĝi, sed malvarm-klimatanoj povas...
- Pri dentoj – porinfana rakonteto pri niaj dentoj.
- Esperanto – Mia kolora mondo – eseo pri Esperanto.
- Teksita belo – artikolo pri la arto de murtapiŝoj.



Saliko

En mia koro



Kelly Muteke

Brulas ĝoja foiro.

En ĝi loĝas belaj floroj.

Malprospero, ne ekzistas.

En mia koro, amo estas.

Foje, mi ne kredas je mi.

Kial tiu ne kredemo?

En mia koro.

En ĝi regas trankvilecon.

Sed en mia menso.

Regas malprospero.

Mia koro kaŝas sekretojn.

Mia animo estas en paco.

Ankoraŭ estas espero.

En mi, mi sentas prosperon.

Forĵetas mi koleron.

Stabileco, ĝojo kaj amo,

Kompatemo, viglema.

Estas en mia koro.



SILENTA BRUO



Kelly Muteke

Parolaĵoj flugas.
Skribaĵoj restas.
Ne ĉio, kio brilas,
estas oro.

Ofte tio, kion ni faras,
kun kuraĝo kaj amo,
restadas kaj regas.
Tial estas la homo.

Mi estas neŭtrala.
Nek nigra, nek blanka.
Nek bona, nek malbona.
Nur vivi trankvile.

Eviti rasismon, mi volas.
Sen diskriminacio.
Mi ŝatas vivi en amo.

Mia animo forflugas.
Mortintojn ĝi renkontas.
Ili ĉiuj jam estas en paco.
En mia koro mankas spaco.

En mia koro mankas spaco
por dividaj mesaĝoj.
Mi vidas brilajn stelojn.
Tuj espero alvenas.

Mi ne estas optimisma.
Sed mi kredas je bona estonteco.
Kun amo kiel ponto
inter homoj optimismaj.



NE MI SEN VI

Malekera Bonne Idée



Sen virino povis ekzisti neniŭ
Sen mangujo ne povis ekzisti mango
Sen Dio ne ekzistus la mondo, sciu
Sen fajro n'estus akvo
Sen mallumo n'estus lumo, mi diru.

Kio kontrolas la korpon rapide
Estas tio, kio permesas pensi senlime
La cerbo, l'inteligento estas kernaj
Partoj de ni, kiujn ni havas, ili estas nekompareblaj
Imagu, sen ili, ni n'estus kapablaj.

Al vi amikoj ĉie, kie vi estas
Per tiu ĉi poemo, sentu vin valora
En mia spegulo, kiam mi rigardas
Via kruta, belega kaj vizaĝo olea
Aperas rapide rapide kiel la suno ĉiumatene leviĝas.



Vi estas valora, parto de sukceso
En nia komunumo esperantuja
En via lando, en nia socio, en vi, ne estas ĉeso
Ĉar vi estas heroo, heroino. Vi estas espero uja.

Esplorvojaĝa Taglibro



Hu Mengying



Yin Jiaxin

Ĉinio nun fariĝis la dua plej granda ekonomio en la mondo, kaj en kelkaj kampoj ĝi jam atingis aŭ eĉ superis la mondan altnivelon. Tamen, pro sia vasta teritorio kaj malsamaj klimataj kaj geografiaj kondiĉoj en diversaj regionoj, la ekonomia evolnivelo estas malekvilibra. En kelkaj regionoj daŭre ekzistas malriĉeco kaj malantaŭenigo, kaj la infanoj tie vivas en tre malfacilaj cirkonstancoj. Pro tio, multaj bonkoraj homoj kreis diversajn fondusojn por speciale helpi tiujn infanojn. Mi partoprenas en unu el ili: Baixi Edukfonduso Guangdong-provinco. La volontuloj de ĉi tiu fonduso dufoje jare vizitas malriĉajn regionojn por esplori kaj dokumenti la situacion de la malriĉaj infanoj, kaj poste disdonas monodonacojn de bonfarantoj al ili.

Mi kreskis en antaŭurbo de urbo. Ekde kiam mi konscias memori, terkultivado neniam estis la ĉefa vivtena rimedo por kamparoj. La maldolĉaĵoj de tradicia rura Ĉinio ne trafis min profunde dum mia infanaĝo. Tamen, dum nur tri tagoj en la gubernio Jingtai de la provinco Gansu, mi ekkomprenis, ke tie aparte klare reflektiĝas la sorta malfeliĉeco de homoj en tradicia ĉina kampara socio. La intensa kolizio inter la subtile kompleksaj homaj naturoj, la valoroj de tradicia rura socio kaj la nunaj ĝeneralaj urbaj valoroj ŝajnis al mi tiel kruelega, ke malfacilas trankvile akceptiĝi ke generacio post generacio oni devas porti tian sorton kaj lukti por postvivi.



La 20-a de aprilo 2025:

Tagmeze ni ekveturis el Lanzhou, ĉefurbo de Gansu. Post pli ol tri horoj, la trajno alvenis al Jingtai. Tuj kiam ni eliris la stacidomon, ventego plenigis niajn brakojn per sablo.

Vespere, kiam mi kaj mia kunulo/samĉambranino “66” eliris por manĝi, subita ventego ŝutis polvon en niajn buŝojn.

Ĉi-foje en Jingtai oni sukcesis kunigi 12 volontulojn. Plejparto de ili jam partoprenis 1-2 antaŭajn esplorojn, do kun spertuloj ĉio povus finiĝi antaŭtempe se irus glate. Vespere ĉiuj harmonie dividis taskojn: enpakado de stipendioj, lernado de la esplor-procezo.

Aliflanke, ŝoforino An (kiu aranĝis nian transporton) jam komencis kontakti infanajn familiojn laŭ ties adresoj por la sekvanta esplorprogramo. Ĉio aspektis bone organizita kaj efika.

Hej, mi jam spirite levas dikfingron por nia fajfa Jingtai-teamo!

La 21-a de aprilo 2025:

La unua familio tuj frapis min kiel fulmobato. La patro mortis, la patrino reedziniĝis kaj geavoj kreskigis du infanojn. Sed lastjare neregistrita fosmaŝino frapis la maljunulojn en la vilaĝo. Tiam la fratino ĵus komencis studadon de altlernejo, kaj la frato en mezlernejo devis paŭzi studadon por prizorgi la geavojn en hospitalo. Ili poste luis domon apud la frata lernejo - kvankam la geavoj ne diris, mi divenis ke tio ebligas samtempan prizorgadon kaj lernadon de la frato. La luita domo estas tre streta, tamen pure kaj ordige. La avino bone prizorgiĝis, kuŝante malsana. Registrinte la fraton, mi subpremis tristan humoron kaj rapidis al sekva familio.

La dua familio: La avino havis pulmkanceron. Pri kemioterapio ŝi timeme diris: “Pli turmenta ol morto”. Nun ili dependas de ĉina herba medikamento por konserva kuracado.

La tria familio: La patrino murdis la patron antaŭ jaroj kaj estis kondamnita al vivdaŭra enprizonumo. Nun nur la avino vivtenas du infanojn.

.....

Malsanoj, akcidentoj, diversaj tragedioj..... Hodiaŭa esplorado konfirmis la diron: “Malfeliĉaj familioj estas malsamaj laŭ sia propra maniero” (citante Tolstojon).

Dum la tuta tago mi senĉese memorigis min: Subpremu emociojn, efike plenumu la esplorlaboron - jen la ĉefa tasko.

La 22-a de aprilo 2025:

La aŭto kuris tra vilaĝaj vojoj. Ĉirkaŭe estis flava polvodezerto. Sub bruliga suno kaj sabloventoj, izolitaj cepkultivistoj klopodis inter flavaj teroj. Sur glataj kampoj hazarde videblis templetoj – verŝajne preĝejoj por peti favoran pluvon de la ĉiela dio. Ŝoforino An klarigis al ni: “En ĉi tiu areo troviĝas irigacia kanalo, do oni nomas ĝin ‘akva tero’. En iu alia areo ne troviĝas irigacia kanalo, oni nomas ĝin ‘seka tero’, ĉar oni dependas nur de pluvo, kiu malofte falas – tial dum senpluvaj jaroj, sekteraj kultivaĵoj ofte tute perdiĝas.”

La Jiuzhi-mezlernejo okupis vastan areon, sed havis malmultajn lernantojn.

Instruisto rakontis: “En 2014 estis pli ol mil lernantoj, nun nur ĉirkaŭ 30. Multaj homoj foriris al urboj por labori, kunportante siajn familianojn.” Malpliigo de kamparaj lernantoj estas mirinda dum la pasintaj dek jaroj.

La lasta familia vizito tiun tagon: La patrino paralizita ne povis eliri renkonti nin. Telefone ŝia parolo estis malklara. Ni petis ke la patro parolu, sed ŝi diris: “Lia parolpovo estas eĉ pli malbona ol la mia”.

Feliĉe, survoje en la vilaĝo ni renkontis du pliaĝajn virinojn, kiuj afable montris la vojon, kaj ni sukcese trovis la domon.

Kiam ni ekeniris la pordon, flora kato flugis malsupren de briklito kaj forkuris. La paralizita patrino varme invitis nin sidiĝi sur la briklito. Kvankam ŝia parolo estis iom malfacila kaj malklara, ŝia pensado estis klara. Sendube ŝi iam estis kompetenta kaj decida persono antaŭ sia paralizo.

Ŝi rakontis: “Dum akuŝo medicina misago okazis kaj damaĝis ŝian nervon, kio kaŭzis la paralizon kaj malklaran parolon. Krom socia subteno, la familio dependas de mia edzo kun mensa handikapo. Li kolektas sovaĝajn vegetaĵojn kaj rubaĵojn por vendi,”

Demandite pri sia filino, ŝi larmis, dirante: “Ŝi jam delonge ĉesis lernadon. Tro humiliĝanta por alfronti la familian situacion, ŝi rifuĝas ĉe onklino kaj rifuzas hejmenveni.”

Ŝi aldonis: “Lastajn jarojn mia sano malboniĝas. Mi tute senutilas, dependanta de la handikapa edzo kaj la knabo en profesia mezlernejo. Mi sentas min vivŝarĝo.”

Mi forte brakumis ŝin kaj konsolis: “Por la infanoj, tenu vin, eltenu. Tagoj iom post iom pliboniĝos.”



La 23-a de aprilo 2025:

Planite ke ni ekveturos al la urbeto Hongshui je la 8-a, sed jam je la 7:30 ŝoforino An atendis ĉe la hotelo. Ŝi urĝis nin rapidi. Kun tia rapideco, ni ne nur povos plenumi niajn taskojn, sed ankaŭ helpas al alia grupo fari du pliajn vizitojn.

En la urbeto Hongshui, ventego tuj plenigis niajn buŝojn per polvo. Lerte ni vualis niajn vizaĝojn per tukoj kaj direktiĝis al la lernejo.

Sincerdire, la plej ĝojaj momentoj estas dum stipendia distribuado. Mi amas la infanridetojn – iom timidajn, iom fierajn, sed ĉiam plenajn de espero. Kvankam nun ili vivas malfacile, tamen ilia estonteco nepre brilos. Jen miaj favorataj momentoj dum la esplorvojaĝo.

Plejparto de la esplorataj lernantoj venas de unuparenca familio (ĉefe kun la patro). Instruisto diris: “Jen la specialaĵo de Hongshui”. Konsiderante la pli fortajn polvoventojn kaj trosekecon ol en aliaj lokoj, mi demandis: “Ĉu iliaj patrinoj forlasas pro troa malfacileco?” Li respondis: “Eble.” Mi eksilentis.

En iu knaba familio, la patrino rakontis kun rideto pri la pli aĝa filino kiu laboras por subteni medicinajn kostojn spite al siaj sanproblemoj. Sed kiam mi demandis pri la dua filino, la avino emocie ekscitiĝis. La patrino premis la avinan manon por malpermesi ŝin paroli. Sed por scii la veran fakton, mi insistis pridemandi. La patrino diris al mi, ke la dua filino mortis antaŭ du jaroj pro ostokancero. La patrino parolis kun ruĝaj okuloj, retenante larmojn – kiel dolora la juna knabino estis kaj la patrino koro!

Vespere ni festis la naskiĝtagon de teamano Susan. La kunkanto de “Feliĉan Naskiĝtagon” estis la plej kortuŝa momento en la tuta semajno.



Postskribo:

Tra la tuta esplorvojaĝo, la virinoj sur tiu tero fariĝis neforgeseblaj por mi - de ŝoforino An ĝis patrinoj kaj avinoj de lernantoj. Mirinde ili posedas similecon: simplaj sed energiaj kun sekaj vizaĝoj markitaj de ventoj kaj suno, malgrandaj staturoj. Tiu rezistema optimismo ŝajnas kreski el la ostoj, ili estas absolute firma, kvazaŭ neniam venkebla de vivaj battoj aŭ nordokcidentaj polvostormoj.


Nepre mi ekiros denove por viziti la infanojn: ĉu Liangshan, Bama aŭ eĉ Yunxi (pli malriĉa ol Jingtai). Mi certe povos plenumi esplorojn eltenante malagrablaĵojn.

Por la ridetoj de infanoj, por la maldikaj sed fortikaj patrinoj, por la rapidantaj ombroj de kunteamanoj, mi volas levi manon al stratplenaj homoj kaj krei: “May the best people win! (Venku la plej bonaj homoj)”




Karikaturo

John Huang



Prave, Pipi!

Al Pipi jukas la lango,
Li eklegas en Esperanto.
Por ni li estas flagstango,
Ni lin gloras per girlando.



Gajo



Komikso kreita de [John Huang](#)



Satiro kaj humuro

Gajo



En loĝdomo vivas kelkcent familioj, inkluzive de la familioj A kaj B.

La edzino A kaj la edzo B ambaŭ ŝatas danci, ili nepre iras al la dancejo dum ĉiu semajnfino.

Tiel, laŭ la tempo, ili fariĝis dancopartneroj, kaj poste fariĝis seksaj partneroj.

Pri tio la edzino B kaj la edzo A jam aŭdis onidirojn, sed ili ne reagis pro manko de firmaj pruvoj.

Denove venis semajnfino. La edzino A ĵus manĝis la vespermanĝon, tuj sin tualetinte kaj dancvestinte kaj, kisinte sian edzon, eliris al la dancejo.

La edzo A, tamen, restis sola por lavi la manĝilaron en la kuirejo kaj poste, kun granda malkontento en si, rapidis al la hejmo de la familio B.

Post lia frapado je la pordo, la sinjorino B malfermis kaj enlasis lin en sian ĉambron, demandante:

— Pro kio vi venas, kara najbaro?

La edzo A respondis, premante la koleron en sia koro:

— Ĉu vi scias, sinjorino B, ke via edzo kaj mia edzino dancas kun brula pasio en la dancejo ĉiuhore? Oni eĉ diras, ke ili jam faris pli...

La edzino B ankaŭ subpremis sian koleron kaj diris:

— Ho, tion mi delonge scias! Ĉu vi volas venĝi nin kontraŭ ili?

— Jes, certe! Sed kiel?

— Tio estas facila, se vi volas. Sekvu min, rapide!

La edzino B vokis lin kaj kondukis edzon A pergeste en sian dormoĉambron kaj tuj fermis la pordon.

Post kelkaj fojoj, la edzo A ellitiĝis, vestis sin kaj volis foriri kun iom da laco.

— Vi volas foriri nun? Ne! Ni faru plian venĝon kontraŭ ili! — petis la edzino B.

— Ne, ne. Nun mi jam ne rankoros ilin, — respondis la edzo A kaj eliris.



Komikso kreita de *John Huang*

Premioj de la 91-a Itala Kongreso de Esperanto



Erika Godó

La 24-an de aŭgusto 2025, fine de la inaŭgura ceremonio de la 91-a Itala Kongreso de Esperanto en Salsomaggiore Terme, okazis la premia ceremonio por la tri konkursoj de la Itala Esperanto-Federacio:

- literatura tradukkonkurso - branĉo poezio;
- literatura tradukkonkurso - branĉo prozo;
- Konkurso Ĝanfranko pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto.

Jen la gajnintoj.

Literatura tradukkonkurso - branĉo poezio:

1a premio: Claudia Maggi;

2a premio: Roberto Pigro;

3a premio: Erika Godó.

Literatura tradukkonkurso - branĉo prozo:

1a premio: Alessio Giordano;

2a premio: Manuela Ronco;

3a premio: Luca Coslovich.

Konkurso Ĝanfranko pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto:

"Sul insulo", kanzono de Marcelo Redoulez kaj Nanne Kalma.

Oni povas vidi la premian ceremonion ĉe ĉi tiu interreta Youtube-adreso:

<https://www.youtube.com/watch?v=f5Xh1hGypq0>



Erika Godo

Kun granda ĝojo ni anoncas la unuan Literaturan Konkurson Kálmán Kalocsay!

 Temaj: |

Partoprenantoj estas invitataj sendi siajn verkojn en la sekvaj kategorioj:

- ❖ poemo
- ❖ prozo
- ❖ traduko

 Terminaj datoj:

Akcepto de verkoj: Ĝis 31-a de Marto 2026

Anoncado de gajnintoj: La 1-a de Augusto 2026

 Reguloj:

La verkoj devas esti originalaj kaj ne publikigitaj antaŭe.

Limigo de longo:

Poemo: maksimuma longo ne fiksita

Prozo: maksimumaj 3 paĝoj

Traduko: maksimuma longo ne fiksita

Partoprenantoj povas sendi maksimume du verkojn en ĉiu kategorio!

La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso en la sama branĉo dum la sekvaj duaj jaroj!

 Juĝado:

La juĝkomisio konsistos el spertaj verkistoj. La kriterioj por juĝo inkluzivas:

- Kreaĵo
- Stilo
- Enhavo

 Premioj:

- Unua premio en ĉiu kategorio: Libro-premio kaj atestilo
- Dua premio en ĉiu kategorio: atestilo
- Tria premio en ĉiu kategorio: atestilo

Ĉiuj premiitaj verkoj estos publikigitaj en Literatura Vivo.

La gajnintoj de la unua loko estos intervjuitaj!

 Sendu viajn verkojn al kalocsayliteraturakonkurso@gmail.com retpoŝtadreso.

 Pliaj Informoj

Por pli da informoj, vizitu nian retejon <https://www.literaturavivo.com>